


EL POPOLA ĈINIO

N-ro 4 Aprilo 1968




“Marnavigo dependas de stiristo, kaj revoluciado dependas de la penso de Maŭ Zedong.”

Manskribaĵo de kamarado Lin Biaŭ, la 29-an de novembro, 1967.



Vivu! Longe, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!



La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko vicprezidanto Lin Biaŭ kaj ĉefministro Ĝoŭ Enlaj afable intervidiĝas kun la revoluciaj batalantoj.

Maŭ Zedong, Vi Plej Ruĝa Suno de l' Epoko Granda

DU THIEU THOI (Vjetnamio)

Ho granda Maŭ Zedong, gvidanto de l' popolo,
Ĉiam sopiris vidi Vin mi el korfundo,
De multaj jaroj Vin pripensis mi en tag' kaj sonĝis en nokthoro.
Se Vin mi povus vidi eĉ nur je sekundo,
Eternos tiu palpebrumo por mi en la koro.

Maŭ Zedong, Vi plej ruĝa suno de l'epoko granda!
Kvankam la kosma suno donas vivon al ĉio vivanta,
Ĝi tamen povas nek heligi l' koron de l' mizeraj popolanoj,
Nek sendi lumon ĝis iliaj budoj kaj kabanoj.

Maŭ Zedong, Vi plej ruĝa suno de l' epoko granda!
La granda penso Via senlime brilanta
Heligas nun la koron de l' proletoj sur la tero,
Kaj portas lumon kaj zefiron al iliaj domoj en mizero.

Maŭ Zedong, Vi granda direktilisto de la mondrevolucio!
Sur la tempesta maro furiozas ondoj kun kolero,
Ja estas Vi ti-kiu montras la navig-linion,
Laŭ kiu la revolucia ŝipo iras venke al la celo.

Azio en ŝtormego,
Afrik' en incendio,
Kaj Latinamerik' vekiĝas, hurlas....
La granda penso Via ĉie semas fajron de revolucio.


En nia bela lando Vjetnamio,
Mi vidis Vian noblan figuron kun bonkora rido.
En la libret' skarlate ruĝa de eldiroj Viaj,
Montriĝas Via tre profunda penso kaj vastega vido.


El Via bela poezio tiom grandioza
Mi aŭdas Viajn bravajn paŝojn en la Longa Marŝo,
Tondre sonantaj ili antaŭdiras pri la venk' kolosa.

Popolo granda kaj nacia festo glora.
Flirtantaj ruĝaj flagoj kaj ĉien brilanta suno ora.
Finfine Vin mi vidas, kiam Pekino feste ridas.
Tian-anmen, la majestan pordon, Vi suriras,
Via vizaĝ' radias kaj l' okuloj brilas.
Ho, kia feliĉego, esprimebla per neniu lingvo!
Kvankam ĝi daŭras nur momenton tre mallongan,
Tamen eterne restos ĝi por mi ĝis vivestingo.

Jen ruĝa sun' leviĝas el la oriento,
Muĝadas la ĝojkrioj tra la homa mar':
"Ho, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!"
Ondegas la senlima mar' bolanta de ĝojsento.
Emociiĝas mi ĝislarme je l' momento,
Kun brak' levita krias mi al la muĝanta maro en respond':
"Eterne vivu Prezidanto Maŭ!"
"Eterne vivu Maŭ Zedong!"

Kun granda emocio la laboristino de ŝpinteksa fabriko en Kamboĝo rigardas atenteme la brilan figuron de Prezidanto Maŭ, la ruĝa suno en la koro de la revoluciaj popoloj de la mondo.





Membroj de Popola Defenda Trupo de Kongolando (B.)
sentas sin feliĉaj antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ.

Starigis novan monumenton Maŭ Zedong la granda.
Ja estas li, kiu bruligis arde la proletan revolucion de kulturo —
Por la epoko nia mejloŝton' giganta
Kaj garantio ke Ĉinio estos ĉiam ruĝa sub proleta diktaturo.

Maŭ Zedong, Vi plej ruĝa suno de l' epoko granda!
Ekvidi Vin en la kultur-revoluci' mondskuanta
Estas feliĉ' por mi dum mia tuta vivo.
Jen sunradioj brilas pro mi en alia helo.
Kaj ĝojas pro mi la tempfluo en eterna sinpelo.
Ne forgesebla tiu kara vid-sekundo
Por ĉiam restos por mi en mia korfundo.

Maŭ Zedong, Vi plej ruĝa suno de l' epoko granda!
Ho kiel povus mi esprimi al Vi mian adoron senliman?
Kaj kiel povus mi esprimi al Vi mian amsenton senfinan?
Ho ruĝa suno de l' epoko, Maŭ Zedong la granda!

Prezidanto Maŭ, Esperantistoj



La Monda Popolo Varme Amas Prezidanton Maŭ

KUN triumfa disvolviĝo de la mondskua proletara kultura revolucio de Ĉinio kaj kun vasta disvastiĝo de la penso de Maŭ Zedong tra la tuta mondo, pli kaj pli multaj esperantistoj vidas, ke Prezidanto Maŭ estas granda gvidanto de la tutmondaj revoluciaj popoloj, kaj la penso de Maŭ Zedong estas kompaso direktanta la revolucion de la mondo triumfe iri antaŭen. De la komenco de la granda kultura revolucio revoluciaj esperantistoj unuj post aliaj sendas al ni leterojn, per kiuj ili esprimas siajn senliman amon, senliman adoron kaj senliman estimon al Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong.

ALTA LAŬDO KAJ VARMA GRATULO

Nia redakcio de EPĈ ofte ricevas altajn laŭdojn kaj varmajn gratulojn de revoluciaj esperantistoj de diversaj landoj en la mondo al Prezidanto Maŭ. Iu itala leganto laŭdis en sia letero kun senlima estimo: "Kamarado Maŭ Zedong estas la dua Lenin." "Estas mia devo denove fari aplaŭdojn al genio kamarado Maŭ Zedong." En la letero li plurfoje deziras longan vivon al Prezidanto Maŭ kaj krias: "Vivu la granda Maŭ Zedong, gvidanto de proletara revolucio!"

Iu albana leganto entuziasme laŭdas, ke la ruĝa Ĉinio gvidata de Prezidanto Maŭ jam fariĝis nedetruebla fortikaĵo de la monda revolucio, kaj alte taksas la grandan ĉinan proletaran kulturan revolucion. Li skribis en la letero: "La granda proletara kultura revolucio, direktata persone de la granda estimata gvidanto Prezidanto Maŭ skuas de la fundamento ĉiujn imperiistajn — reviziistajn fortojn." En la fino de la letero, li fiere krias: "Vivu niaj du gvidantoj grandaj kaj provitaj marksist-leninistoj Maŭ Zedong kaj Enver Hoxha, forĝantoj de la ĉina-albana eterna amikeco!"

Iu vjetnama esperantisto, batalanta sur la fronto por savi sian patrolandon kontraŭ la usonaj agresantoj skribis: "Permesu al mi, ke mi sendu miajn plej altajn dankojn al nia genio, granda gvidanto, granda instruanto Prezidanto Maŭ Zedong. Ĉar, ekde mia komprenaĝo, mi konscias, ke dank' al la granda kaj firma subteno de la Kompartio, la tuta popolo de Ĉinio direktataj de nia Prezidanto Maŭ Zedong, nia lando jam flue trairas multajn malfacilojn sur la vojo batalanta kontraŭ francaj agresantoj-koloniistoj antaŭe kaj usonaj imperiistoj nuntempe."

PETOJ POR INSIGNOJ DE PREZIDANTO MAŬ KAJ LIA PORTRETO

La revoluciaj esperantistoj de diversaj landoj en la mondo senlime amas Prezidanton Maŭ. Ili unuj post aliaj skribas al ĉinaj kamaradoj por ricevi insignon de Prezidanto Maŭ kaj lian portreton, rigardante insignon de Prezidanto Maŭ kaj lian portreton kiel "la plej karan donacon" kaj "la plej karan memoraĵon". Post kiam realiĝis la deziro, ili skribis al ni varmegajn leterojn por esprimi sian koran dankon.

Iu brazila revolucia esperantisto kun ekscitiĝo petis ĉinajn kamaradojn sendi al li portretojn de Marks, Engels, Lenin kaj Prezidanto Maŭ. En sia letero li diris: "Delonge mi


Revoluciaj Rigardas Vin kun Alta Estimo

volas fari al vi peton, sed hodiaŭ mi ne plu kapablas min deteni kvankam tio eble povas dangerigi min ĉe miaj samlandanoj.... Delonge mi deziras aldoni sur mia muro la bildojn de Marks, Engels kaj Lenin. Nun mi decidis apelacii al vi sed nun kiam mi jam bone konatigis kun nia kamarado Maŭ Zedong leginte liajn verkojn, mi konstatis ke li estas same inda kiel la supre menciitaj, tial ankaŭ mi volas lian portreton, al mi sukcesos per vi realigi mian gravan revon." Li skribis plue: "Ĉiufoje, kiam mi malfermas revuojn kie estas lia foto, mi estas prenata de iu stranga forto kiu ordonas min al la batalo, tiel mi opinias tre utila lian portreton sur videbla loko, kie konstante mi lin vidos kaj adoros!!!" Kiam lia deziro estas plenumita, li skribis leteron al ni por esprimi sian koran dankon.

ILI PLEJ AMAS LEGI VERKOJN DE PREZIDANTO MAŬ

La revoluciaj esperantistoj plej amas legi verkojn de Prezidanto Maŭ, en kiuj ili volas serĉi revolucian veron. Kun ekstreme malpacienca kaj sincera sento ili petas ĉinajn kamaradojn sendi al ili verkojn de Prezidanto Maŭ. Iuj bezonas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*, aliaj ĉiujn liajn verkojn tradukitajn en Esperanto, kaj triaj liajn verkojn kaj en la ĉina lingvo kaj en Esperanto. En sia letero, petanta por verkoj de Prezidanto Maŭ iu ĉilia esperantisto skribis: "Mi tre estimas la ĉinan popolon kaj ĝian revolucion, socialisman konstruadon kaj grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Mi kredas, ke oni povas trovi en verkoj de Prezidanto Maŭ respondojn al la aktualaj problemoj kaj nuntempaj aferoj." La vjetnama popolo, batalanta sur la plejfronto kontraŭ la usona imperiismo, plej bezonas la penson de Maŭ Zedong. Iu vjetnama leganto skribis en sia letero: "Mi honore postulas ke vi, se oportunas al vi, bonvole sendu al mi la libretojn de verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong (en la ĉina lingvo) kiujn nun ĉinaj revoluciaj popolamasoj lernas kaj aplikas kiel direktilon de sia agado, kaj etan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ, kiujn mi tre bezonas." Iu esperantisto de Rumanio kun senlima adoro kaj senlima estimo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ skribis leteron al ĉinaj kamaradoj, petante ke ili kiel eble plej rapide sendu al li verkojn de Prezidanto Maŭ. Li diris: "Karaj amikoj, kamaradoj kaj fratoj, kun varmaj larmoj mi skribas al vi, mi petas vin doni al mi bonvolan subtenon kaj kiel eble plej rapide, registrite sendi al mi la verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko, Pri Popol-demokratia Diktaturo, Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong* k. a. Leganto el Belgio skribis: "Mi petas vin sendi al mi librojn verkitajn de nia plej estimata Prezi-

Revoluciaj araboj ŝatas legi verkojn de Prezidanto Maŭ.



danto Maŭ." Ĉe la fino de sia letero multaj legantoj ofte atentigas ĉinajn kamaradojn: "Ne forgesu sendi al mi nove eldonitajn verkojn de Prezidanto Maŭ!" La soifo de vasta esperantista amaso pri la penso de Maŭ Zedong vivece respegulas ilian senliman amon al Prezidanto Maŭ.


Ricevinte verkojn de Prezidanto Maŭ, multaj legantoj ilin rigardas kiel valoregajn trezorojn, kaj diligente ilin studas. En sia letero iu vjetnama esperantisto skribis, ke kvankam li jam pasigis pli ol duonon de sia vivo, li tamen ankoraŭ tagnokte lernas verkojn de Prezidanto Maŭ por dediĉi sian tutan vivon al la afero de la proletara revolucio.

Iu itala 16-jara esperantisto diligente lernas la ĉinan lingvon por koni la ĉinan popolon kaj lerni verkojn de Prezidanto Maŭ. Nun li jam povas legi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj skribi leteron en la ĉina lingvo. Leginte verkojn de Prezidanto Maŭ, li skribis leteron en la ĉina lingvo, en kiu li diris: "La libroj estas tre interesaj, la lingvo ne estas malfacila, sed la penso — profunda. La amasoj varme akceptas tiujn ĉi librojn, ĉar en kiuj la penso tre kortuŝas la koron de la amasoj." Li ankoraŭ esprimis sian decidon klopodi por bone scipovi la ĉinan lingvon "por pli bone koni la ĉinan popolon".

En siaj leteroj multaj legantoj parolis pri sia kompreno pri verkoj de Prezidanto Maŭ post studo. Iu sveda maljuna leganto foje skribis, ke la verkoj de Prezidanto Maŭ helpis ilin bone orienti sin "en la nebulo de reviziismo kaj dogmismo". Alifoje li skribis, ke vortoj de Prezidanto Maŭ ĝojigis lin, ĉar ili montras, ke la Ĉina Popola Respubliko ne devios de la ĝustaj direkto kaj linio t. e. la marksism-leninismaj direkto kaj linio. Tio ege kuraĝigas nin, la laboristan klason en la kapitalisma mondo, sed teruras ĉiujn reviziistojn apartenantajn al la kapitalisma kategorio."

Sekve de la popularigo de la penso de Maŭ Zedong tra la tuta mondo, certe ĉiam pli multe da esperantistoj ĝin ekposedos. La revoluciaj esperantistoj certe faros sian meritoplenan kontribuon al la batalo por la liberiĝo de la homaro.

Jen estas la leteroj, kiujn itala amiketo kaj brazila esperantisto skribis al ni.





Sub la gvido de la penso de Maŭ Zedong, la Revolucia Komitato fondiĝis en la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko. Kun granda emocio gelaboristoj faras skriban raporton pri la ĝojindaĵo al sia plej estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ.

Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko sur la Vojo de la Penso de Maŭ Zedong



La movado por subteni la armeon kaj prizorgi la popolon ardas en la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko. Kun profunda klasa amo la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj esprimas al PLA-anoj senditaj por subteni la maldekstrulojn sian firman subtenon al la armeo.

ALTE tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj helpe de la trupo 8341 de PLA, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ. Kaj en la akra batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, ili akiris unu venkon post alia, superante diversajn malfacilojn kaj trapasante sennombrajn danĝerojn.

REVOLUCIADO DEPENDAS DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

Kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone iniciatis la grandan proletaran kulturan revolucion, kiun li mem gvidas, la proletaraj revoluciuloj de tiu fabriko tuj varme partoprenis ĝin. Ili energie ribelis kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la fabriko kaj la burĝara reakcia linio. Kiam la revolucia ŝtormo de transpreno de potenco, en januaro 1967, envolvis la tutan landon, ili transprenis la potencon el la manoj de la enpartiaj potenctenantoj de la fabriko irantaj la kapitalisman vojon.

En junio, 1967, kiam la revolucio disvolviĝis pli profunden, Prezidanto Maŭ sendis PLA-anojn por subteni la maldekstrajn revoluciulojn. Alveninte al la fabriko, la PLA-anoj tuj plenforte propagandis la penson de Maŭ Zedong, fervore prezentis bonajn spertojn de kreiva lernado kaj kreiva aplikado de liaj verkoj, kaj samtempe faris pene inter ili profundan kaj subtilan laboron politikan kaj ideologian. Tre rapide leviĝis en la tuta fabriko nova tajdo de kreiva lernado kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong.

Oni ankoraŭ klare memoras, ke antaŭ la granda kultura revolucio la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la malnova Pekina Urba Komitato de la Komunista Partio ĉiurimede subfosis kaj kontraŭstaris la amasan movadon de kreiva studado kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj, aliflanke, trudis la venenegan herbon, nigran *Memkulturon* al



Ho Prezidanto Maŭ, al Vi nia amata, ni plej kore deziras senfine longan vivon, senfine longan vivon kaj senfine longan vivon!

laboristoj, kaj devigis ilin studi ĝin, por ke ili suriru la malĝustan vojon de reviziismo.

Nun oni vere metas la lernadon de verkoj de Prezidanto Maŭ sur la lokon plej altan, plej gravan, plej antaŭan kaj plej superan. Oni persistas pri ĉiutaga legado de liaj verkoj, pri amasa studado, parkerado, propagandado kaj aplikado de liaj "tri popularaj artikoloj", kaj pri kreiva studo kaj kreiva |apliko de liaj novaj instrukcioj. Ĉie en la laborejoj, oficejoj, manĝejoj kaj loĝejoj floras studrondoj de verkoj de Prezidanto Maŭ. La vasta revolucia amaso de laboristoj kaj oficistoj en la fabriko memkonscie prenas studadon de verkoj de Prezidanto Maŭ kiel la plej gravan aferon.

Ĉiutage antaŭ ol komenci laboron, la unua afero por la laboristoj kaj oficistoj estas peti instruojn de Prezidanto Maŭ, t. e., kolektiĝi antaŭ lia portreto por lerni el liaj vortoj en ligo kun la laboroj de tiu tago kaj la efektivaj pensoj de la amaso kaj poste iri al la laborpostenoj kun la instruoj de Prezidanto Maŭ.

Komenciĝis la taglaboro. Sur ĉies maŝino pendas unu enkadrigita tabulo kun vitro, sur kiu estas skribitaj vortoj de Prezidanto Maŭ, kiuj povas doni al ili en ĉiuj okazoj saĝon kaj forton.

Post la sonado de laborfina signalo, oni denove kolektiĝas antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ por raporti pri sia laboro. Ili kontrolas siajn pensojn kaj laboron kun instruoj de Prezidanto Maŭ kiel la plej alta normo.

Ĝang Ŝukin, laboristino en ŝpinejo, profunde komprenas el sia propra vivo, ke revoluciado dependas de la penso de Maŭ Zedong.

Kiam ŝi estis nur dekjara, ŝi jam fariĝis servistineto por prizorgi infanon de iu kapitalisto; kaj kiam ŝi havis dektri jarojn, ŝi komencis labori kiel infanlaboristino. Estas Prezidanto Maŭ, kiu savis ŝin el la fundo de mizero de la malnova socio. Por tio ŝi havas profundan klasan amon al Prezidanto Maŭ. Sed antaŭe ŝi estis venenita de la nigra *Memkulturo* kaj la teorio pri "obeema ilo" fabrikita de la ĉina Ĥruŝĉov, ĉar ŝi ne bone studis verkojn de Prezidanto Maŭ en la pasinteco. En iu revolucia amasa kritika kunveno ŝi diris: "Sin



Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ la PLA-aninoj senditaj por subteni la maldekstrulojn humile lernas de la laboristino.

apartigante de la verkoj de Prezidanto Maŭ, oni ne povas distingi veron disde malvero, aroman floron disde venena herbo. Por esti senlime fidela al Prezidanto Maŭ, oni nepre devas bone studi la verkojn de Prezidanto Maŭ. Alie oni estos trompitaj de la malamiko."

Nun Ĝang Ŝukin ankoraŭ pli serioze penas studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Krome, ŝi ankaŭ instigas siajn infanojn fari la samon. Ĉunging, ŝia dekunu-jara knabo, ofte gvidas siajn tri junajn gefratojn legi hejme verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj li mem jam povas parkeri la "tri popularajn artikolojn". Cetere la tuta familio ofte okazigas "familian kunvenon por kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon".

UNUIĜO SUB LA STANDARDO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

En la granda proletara kultura revolucio la proletaraj revoluciuloj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko strikte sekvas la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj faras pintokontraŭpintan batalon kontraŭ la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Sed influate de la burĝara reakcia linio kaj de la burĝara kaj etburĝara frakciismo, la laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko dividiĝis en du organizojn: "Ruĝaj Ribeluloj" kaj "Ruĝas la Oriento". La intimaj klasaj fratoj kaj batalamikoj, kiuj kune luktis ŝultron ĉe ŝultro en la pasinteco, nun sin dividis en du grandajn grupojn.

Kaj pli kaj pli serioziĝis videble la kontraŭstaro inter la du organizoj.

Ĝuste en tiu tempo, printempa tondro ekskuis la vastan teron. Prezidanto Maŭ faris alvokon por la granda revolucia unuiĝo: **"Interne de la laborista klaso ne ekzistas konflikto en fundamentaj interesoj. Sub la diktaturo de la proletaro, la laborista klaso des pli ne devas dividiĝi en du grandajn antagonismajn organizojn."**

Tiu ĉi plej nova instrukcio de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ cirkulis ĉie en laborejoj, oficejoj, manĝejoj kaj loĝejoj. En diversaj kunvenoj grandaj kaj malgrandaj, antaŭ kaj post deĵoro, ĉiuj ripetade studis ĝin laŭ la reala stato.

Koncerne al la alvokoj de Prezidanto Maŭ la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la fabriko havas la saman deziron: plenumi ilin firme kaj komplete! Sub la helpo de la trupo 8341 ili rapide efektivigis grandan revolucian unuiĝon.

Post tio ĉie en la fabriko estas aŭdeblaj laŭdoj pri la granda unuiĝo kaj rigoraj kondamnoj kontraŭ krimoj de la burĝara kaj etburĝara frakciismo. Arde disvolviĝas la batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo.

REVOLUCIO EN LA PROFUNDO DE ANIMO

"Kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon!" Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris novan ordonon en la momento, kiam la granda proletara kultura revolucio gajnis decidan venkon.

La granda revolucia torento de batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo tralavas ĉiujn angulojn de la fabriko kaj tuŝas ĉies animon.

Iu laboristo en la tinkturejo diris: "Guto da tinkturo povas difekti la purecon de plenkaldrona akvo; iom da egoismo povas korupti la animon de homo."

Iu ekzamenisto diris: "Egoismo similas al difekto sur produktaĵo. Oni devas ĝin kapti senpreterlase tuj je la unua vido!"

"Egoismo similas al rubo sur la tero kaj malpuraĵo sur maŝino," diris iu purigisto, "oni nepre devas ilin forigi."

Komencis disvolviĝi "popola milito" de batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo tra la tuta fabriko.

La juna revoluciulo Liu Venĉuang, kiu trabatalis al si la vojon el sub teroro de la burĝara reakcia linio, opiniis unuatempe ke li mem ne havas egoismon por kontraŭbatali. Ĉu vere tia estas la fakto? Studinte la plej novajn instruojn de Prezidanto Maŭ kaj la "tri popularajn artikolojn", li rigore kontrolis sian agadon kaj trovis, ke en multaj punktoj liaj agoj ne konformas al instruoj de Prezidanto Maŭ. Ju pli li ekzamenis sin, des pli li trovis ke en lia kapo ne mankas sed eĉ abundas egoismaj konsideroj, kaj ke li tro malproksime postrestas kompare kun la brilaj figuroj de Ĝang Side kaj Bethune, ĉe kiuj tute forestis ajna konsidero pri si mem.

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko firme luktas, por ke la penso de Maŭ Zedong okupu ĉiujn postenojn. Jen juna laboristino atente skribas vortojn de Prezidanto Maŭ en la dejorkajeron post sia nokta dejoro.



Li ne timis la probablan sekvon de elmontro de sia egoismo, ke, rezulte, la amaso eble havos malbonan impreson pri li aŭ la kamaradoj de la alia grupo eble el tio kaptos lian "voston" por ataki lin, kaj li kuraĝe publikigis dazibaŭojn por ekzameni kaj kritiki sin mem, firme plenumante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **"kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon"** kaj la instrukcioj de vicprezidanto Lin Biaŭ: "En revolucio oni devas direkti ĝin ankaŭ kontraŭ sin mem, se ne, la revolucio ne povas esti bone kondukata."

En sia laborejo kaj antaŭ la amaso li daŭre malkaŝis sian


egoismon kaj kritikis ĝin. Kun profunda kompreno, li diris, ke ŝarĝita per egoismo oni ne povas sin movi antaŭen kaj strikte sekvi la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ. Kuraĝi kontraŭbatali egoismon aŭ ne estas kriterio por ekzameni la fidelecon al Prezidanto Maŭ kaj distingi verajn revoluciulojn disde la falsaj.

NOVA FIZIONOMIO DE LA PENSO

La torento de batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo tute renovigis la pensojn de Ĝang Ĉengming, vicfabrikestro, kun malriĉkamparana deveno.

Ĝang Ĉengming plenumis la burĝaran reakcian linion en la komenco de la granda proletara kultura revolucio, kaj pro tio estis serioze kritikita de la amasoj. Tamen, li ne povis konvinkiĝi en la penso, nek rekoni sian kulpon el la koro, kaj ankaŭ en sia agado elmontris antipation. Li eĉ erare opiniis, ke labori kiel kadro estas "malprofito kaj malfeliĉo", kaj ĵuris en si, ke li ne plu funkcios kiel kadro de nun.

La PLA-ano sendita por subteni la maldekstrulojn konversacias kun respondeculoj de la du kontraŭstaraj revoluciaj organizoj por helpi ilin en la lukto kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo kaj tiel realigi inter ili unuiĝon bazitan sur la penso de Maŭ Zedong.



En studa grupo de la penso de Maŭ Zedong, Ĝang Ĉengming ripetade studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan* kaj iom post iom ekkonis ke li faris seriozajn erarojn. Kirliĝis la pensaj ondegoj en lia kapo, kaj li ne povis bone dormi en kelkaj sinsekvaj noktoj. Kuŝante sur la lito, li pensis pri Ĝang Side, kiu oferis sian vivon pro la interesoj de la popolo, kaj N. Bethune, kiu sindonis al aliaj sen ajna konsidero pri si mem por subteni la revolucion de Ĉinio. Pensante pri tiuj martiroj, li trovis, ke li mem tuj ĉesis labori sole pro tio ke li renkontis tiajn puŝojn en la movado. Kia penso tio estas? Tio estas penso individuisma. Ju pli li pensis pri tio, des pli li konsciiĝis en la koro, ke li estas maldankema al Prezidanto Maŭ kaj la Partio. Li ripetade studis la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Ni ĉinaj komunistoj, kiuj prenas la plej grandajn interesojn de la plej vastaj amasoj de la ĉina popolo kiel nian elirpunkton, estas konvinkitaj pri la plena justeco de nia afero, domaĝas nenian personan oferon kaj estas ĉiam pretaj oferi la vivon por nia afero. Ĉu ni povas esti ne volontaj forĵeti iajn ajn ideojn, vidpunktojn, opiniojn aŭ metodojn, kiuj ne konformas al la bezonoj de la popolo?"** La tre intima instruo de la granda gvidanto profunde tuŝis la animon de Ĝang Ĉengming. Kial ne forĵeti la erarojn, kiuj vere ekzistas? Ĝang Ĉengming decidis batali ĝisfine kontraŭ "egoismo". En ĝenerala kunveno de la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko, Ĝang Ĉengming profunde kritikis mem siajn egoismajn konsiderojn kaj erarajn agojn.

Por komplete elimini "egoismon", li plie sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ iri en la amasojn de laborejo al laborejo tra la tuta fabriko por aŭskulti kritikojn kaj akiri ilian helpadon. Li speciale vizitis tiujn, kiuj estis plej malkontentaj pri li, kaj kiuj plej forte atakis lin.

La maljuna laboristo Vang Dianzong, kiu foje faris akran kritikon al Ĝang



La PLA-anoj por subteno al maldekstruloj en la fabriko okazigas kunsidon por kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon.

Ĉengming, tre ĝojis vidante, ke tiu ŝanĝiĝis en sia sinteno, kaj diris al li per vortoj sinceraj kaj kun koro zorgema: "Tio, kion ni malamis, estis viaj eraroj. Ni bedaŭris, ke fero ne ŝtaliĝis. De nun vi devas sekvi Prezidanton Maŭ kaj revolucii kune kun la vastaj amasoj por la tuta vivo!"

La arda klasa amo varmigis kaj stimulis Ĝang Ĉengming, kaj li kun larmo de emocio diris: "Estas Prezidanto Maŭ kaj la klasaj fratoj, kiuj min savis! Estas la penso de Maŭ Zedong, tiu ĉi ora ŝlosilo kiu malfermis mian cerbon, rustiĝintan seruron."

Ĝang Ĉengming nun estas vicestro de la revolucia komitato de la fabriko kaj plenenergie laboras por "batalo, kritiko kaj reformo" kune kun la vastaj revoluciaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj, kontribuante sian forton por fari la tutan fabrikon granda ruĝa lernejo de la penso de Maŭ Zedong.

NOVA LERNEJO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

La ondegoj de la kultura revolucio forlavadas la malpuraĵojn de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko!

La radioj de la penso de Maŭ Zedong lumigas la vojon de la fabriko al brila estonteco!

Kun la senĉesa disvolviĝado de la bonega revolucia situacio jam aperis nova alta tajdo de produktado en la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko!

Sen fonto ne elfluas akvo kaj sen kotono oni ne povas ŝpini fadenon. La nova alta tajdo de produktado en la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko devenas de la senkompare potenca penso de Maŭ Zedong.

La malgrandaj notlibroj pendantaj sur la maŝinoj ja estas historia atestanto de la terrenversa ŝanĝiĝo en la fabriko.

La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la fabriko distrumpetis tiel nomatan "mastrumadon de ekonomio per ekonomiaj rimedoj". Kiam ili tenis la potencon en la manoj, ĉiuj paĝoj de la notlibreto, de la unua ĝis la lasta, estis plenigitaj per notoj pri produkto. Sub la frazo "ĉio por produkto", fakte disvastiĝis veneno de reviziismo, kaj la notlibretoj efektive fariĝis ilia instrumento por efektivigi la politikon de "materia stimulo" kaj "mono en komando".

Sed, nun la potenco jam estas en la manoj de la proletaraj revoluciuloj. Kaj la penso de Maŭ Zedong atingis ĉiujn angulojn kaj direktas ĉiujn laborojn de la fabriko; ankaŭ la malgranda notlibreto fariĝis posteno por lerni kaj propagandi la penson de Maŭ Zedong.

Sube estas kelkaj notoj skribitaj en la libretoj de laboristoj al la sekvantaj deĵorantoj. Tiuj notoj estas saturitaj de revolucia entuziasmo:

"Hodiaŭ la maŝino funkciis tre bone, sen ia ajn incidento; fadenrompoj estis nemultaj; kaj ankaŭ borderaĵoj difektiĝis malofte. Unuvorte, ĉio estis en bona ordo. Mi deziras al vi ĉion bonan! Nun ni kune legu la plej altan instrukcion: **'Ni devas esti modestaj kaj singardemaj, sed ne fieraj kaj malpaciencaj, kaj servi al la ĉina popolo tutkore kaj tutanime....'**"

"La plej alta instrukcio: **'La komandantoj kaj batalantoj de la tuta Popola Liberiga Armeo devas absolute neniom malstreĉi sian batalvolon; ĉia penso, kiu malstreĉas la batalvolon aŭ subtaksas la malamikojn, estas erara.'** Hodiaŭ, dum mia deĵoro, mi povis glate manipuli la maŝinon en la komenco, sed, ĉar mi ne agis laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj subtaksis la 'malamikon', mi preterlasis du fadenrompojn, kiuj kaŭzis du difektojn sur la trikoto.

Ĝang Ĉengming (la dua de maldekstre), antaŭe vicestro de la fabriko, estas elektita en la revolucian gvidantaron de "triflanka kombiniĝo", post kiam li trovis komprenemon de la amasoj en sia lukto kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo. Jen li intime parolas kun gelaboristoj en laborejo.



Mi esperas, ke vi profitu nian lecionon por ne esti denove trompita de la 'malamiko'."

"Hodiaŭ la maŝino funkciis regule, sed en kunigo de interrompita fadeno mi preterlasis plurajn difektojn. Unue mi intencis ignori ilin. Poste mi ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **'Niaj vicoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo.'** Mezurante mian agadon per la normo de **'ekskluzive'** kaj **'senrezerve'**, mi trovis, ke multo mankas en mia laboro kompare al ĝi. Mi devas servi al la popolo **'ekskluzive'** kaj **'senrezerve'** kiel kamarado Ĝang Side. Tial mi firme decidis rebonigi tiujn difektojn. Fine lasu nin kune legi la plej altan instrukcion: **'Kio vere gravas en la mondo estas la vorto SERIOZECO kaj la Komunista Partio plej taksas SERIOZECON.'**"

La ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong komandas la produkton kaj elmontras sian gigantan forton.

La efektiviĝo de kolektiva funkciigado de maŝinoj en laborgrupoj de la trikejo estas venko de la granda penso de Maŭ Zedong.



La PLA-anino, kiel ĉiuj aliaj kiuj subtenas la maldekstrulojn, profundiĝas en la amason por fari subtilan ideologian kaj politikan laboron kaj propagandi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ. Ŝi vizitas la laboristajn familiojn, intime babilas kun la familianoj kaj ricevas varman akcepton de la amaso.

Iun tagon meze de oktobro, pasintjare, estis jam post la deka horo en la nokto, kiam finiĝis la deĵortempo de la laborgrupo C. La grupanoj kolektiĝis kaj denove studis kun seriozeco la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ: **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton".**

En tiu tempo ĉiujn kaptis la sama problemo: Nun la produkta tasko de la grupo estas peza, sed labormanoj malmultaj. Ĉiuj laboras nur super siaj prirespondataj maŝinoj kaj la laborefiko estas malalta. En la laborejo restas ankoraŭ maŝinoj neokupitaj, kaj fadenoj ne mankas en stoko, tamen, oni ne povas produkti pli da trikoto. Kion fari?

"Ni funkciigu la maŝinojn kolektive!"

Subite iu elĵetis la vorton, kiu trovis resonon en ĉies koro. "Prave!" ĝojkriis kelkaj homoj. "Bona ideo! Funkciigu la maŝinojn kolektive!" Sed ankaŭ iuj hezitis pro tio, ke en la pasinteco oni jam faris tian provon, sed malsukcesis antaŭ ol paso de kelkaj tagoj.

Efektive, antaŭ la kultura revolucio, oni provis kolektivan funkciigon de la maŝinoj fare de la tuta laborgrupo. Sub la brilo de la tri ruĝaj standardoj de la ĝenerala linio, granda antaŭensaltego kaj popola komunumo, la laboristoj iniciatis por anstataŭi individuan funkciigon de po kelkaj maŝinoj, kaj faris kuraĝe provadon. Sed tiu metodo rekte kontraŭstaras al la reviziisma linio de "elstarigo de personoj", "premtrudo de produkta normo al laboristoj" kaj "premio en komando" pledataj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Pri la provado tiuj potenctenantoj ne havis intereson en la komenco kaj poste komencis subfosi ĝin,

tiel ke tiu ĵus aperinta ĝermo estis enpremita en la teron de la kontraŭrevolucia reviziisma linio.

Rememoro pri la pasintaĵo vekis ĉe ili pli grandan malamon al la kontraŭrevolucia reviziisma linio kaj plifirmigis ilian volon starigi la novaĵon por anstataŭi la malnovaĵon. Ili decidis detrui la reviziismajn rutinajn regularojn kaj krei novan mondon brilantan per la penso de Maŭ Zedong. Ili diris: "Kiam ni plenumas la alvokon de Prezidanto Maŭ **'kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon'** la ideologia bazo por sukcesigi la kolektivan funkciigadon de maŝinoj estas tute preta!"

Tiel realiĝis tiu novaĵo en la laborgrupo C de la trikejo!

Tamburante kaj tamtamante, la PLA-anoj, kiuj estas senditaj por subteni la maldekstrulojn, venis al la grupo C por ĝin gratuli pro la venko de la penso de Maŭ Zedong. Ili ankaŭ komunikis tiun ĝojigan novaĵon al aliaj laborgrupoj. Tiel la kolektiva funkciigado de maŝinoj rapide disvastiĝis ankaŭ en aliaj grupoj. En la laborgrupoj elmontriĝis solidareco, interhelpemo kaj konkura alprenado de pezaj laboroj, kaj ĉiuj maŝinoj en la laborejo estis funkciigataj, tiel ke la produkto grandmezure pliiĝis. La laboristoj diris: "La sistemo de kolektiva funkciigado de maŝinoj unuigis nin pli intime kaj pli fortigis nian kolektivismon."

La nova sistemo — tiu ĉi bela ruĝa floro sane kreskas sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong!

Nova alta tajdo de batalo, kritiko kaj reformo leviĝis en la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko, kie novaj aferoj senĉese aperas unu post alia.

Ni faras nun aferon ekstreme grandan kaj gloran neniam faritan de niaj antaŭuloj.


Nia celo nepre devas esti atingita!

Nia celo certe povas esti atingita!

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, sekvante la vojon de li malfermitan, kaj kun sentima revolucia spirito, la proletaraj revoluciuloj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko nun skribas novan historian ĉapitron!

En postlaboraj horoj, gelaboristoj skribas dazibaŭojn por kritiki la reviziisman linion, kiun praktikis la ĉina Ĥruŝĉov en la ŝpinteksa industrio.





Li Venĝong, granda komunisma batalanto kaj "modelo de subteno al la maldekstruloj kaj de zorgo al la popolo".

La Heroa Plotonestro Li Venĝong

HIANG DONG

LI Venĝong estas estro de la kvara plotono de la sesa roto de iu bataliono sub la trupo 6011 de PLA. Li heroe mortis en la rivero Gangiang, Gianghi, kiam li savis dronantajn ruĝajn gvardianojn kaj revolucian amason en la akvo. Li oferis sian junan vivon por la granda revolucio, kun kiu ligiĝas la estonteco de Ĉinio kaj la sorto de la homaro.

Nia granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko vic-ĉefkomandanto Lin persone sankciis la honorigon de Li Venĝong per la titolo "modelo de subteno al maldekstruloj kaj de zorgo al la popolo".

La famo pri heroaj agoj de Li Venĝong disvastiĝis de la piedo de Ginggang-montaro — la unua revolucia bazloko starigita persone de Prezidanto Maŭ — tra la tuta Ĉinio kaj al la tuta mondo.

Multaj fremdlandaj amikoj aplaŭdas lin kaj fieras pro la revolucia heroo, kiu maturiĝis sub la nutrado de la granda penso de Maŭ Zedong. Albana kamarado diris, ke kun batalantoj kia Li Venĝong, Ĉinio neniam ŝanĝos sian koloron, kaj la proletara revolucio havas siajn plej fidindajn daŭrigantojn. Iu cejlona komunisto skribis en la notlibro de la ekspoziciejo pri la agoj de Li Venĝong: "Li Venĝong estas brila modelo por la revoluciaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko."

ŜTALA ĴURO DE LI VENĜONG KAJ LA "HEROA KVARA PLOTONO"


Mi varme amas kion Prezidanto Maŭ amas.

Mi subtenas kion Prezidanto Maŭ subtenas.

Mi plenumas kion Prezidanto Maŭ instrukcias.

Kaj mi tuj antaŭenmarŝas, kiam Prezidanto Maŭ mansignas.

La ŝtala ĵuro el la supraj kvar frazoj estas la agadprogramo de Li Venĝong kaj la batalantoj de la "Heroa Kvara Plotono".



Mia juro: Kapoperdo estas bagatelo. Grava estas nur la venk' de l'vero. Por defendi Prezidanton Maŭ, mi ne hezitas eĉ je vivofero. (Manskribaĵo de Li Venĝong).

Tuj kiam leviĝis la mondskua ruĝgvardia movado, nia plej estimata granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ jam montris al ĝi grandan zorgon kaj firman apogon.

En la 18-a de aŭgusto 1966, kiam Prezidanto Maŭ unuafoje akceptis la junajn ruĝajn gvardianojn, la kvara plotono plenumis sian taskon en montaro. En la komenco ili ne bone komprenis la ruĝgvardian movadon, sed kiam ili aŭdis, ke Prezidanto Maŭ akceptis la ruĝajn gvardianojn, ili ĉiuj vigliĝis tuj de ĝojo. Kun ekscitiĝo Li Venĝong diris: "Kamaradoj! Prezidanto Maŭ akceptis la ruĝajn gvardianojn! Kiujn la granda gvidanto Prezidanto Maŭ apogas, ankaŭ ni subtenas. Kiujn Prezidanto Maŭ amas, ankaŭ ni amas. Ni devas fari tion, kiam ni komprenas ĝian signifon. Kaj ni devas ankaŭ subteni ĝin eĉ se ni provizore ne komprenas ĝian signifon. Ne sufiĉas ke ni mem faras tion. Ni devas eduki niajn parencojn kaj amikojn por ke ankaŭ ili ĉiuj faras tion." Tiuvespere la batalantoj de la plotono kolektiĝis sub malgranda petrollampo kaj serioze skribis leterojn al siaj hejmoj. Li Congkjuan kaj Ĉen Diankuj, kiuj nur malmulte legoscias, skribis kun granda malfacilo, sed ili obstine rifuzis, ke la aliaj skribu por ili. Ili diris: "Malalta estas nia klereco, sed ne devas esti malalta nia postulo al ni mem kiam ni estas en firma sekvado al Prezidanto Maŭ. Ni povas elversi nian koron, nur se ni mem skribas." La sekvintan tagon iliaj leteroj forflugis al diversaj direktoj de la patrio, ĉiuj kunportantaj la admonon, ke la parencoj estu fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj ĝuste rilatiĝu al la revolucia amasa movado, kaj la aklamon al la nove leviĝanta ruĝgvardia movado.

Tiam en Gianghi, la gefiloj de Ginggangmontaro, havantaj gloran revolucian tradicion, jam plene mobiliziĝis, kaj plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon faris sian lastan barakton. La granda proletara kultura revolucio troviĝis en la momento de decida batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj.

La kvara plotono kaj ĝiaj frataj unuoj de la sama trupo firme staris sur la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ firme defendis kaj subtenis la maldekstrulojn en la ĝenerala ofensivo kontraŭ plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

Tuj kiam la kvara plotono elpendigis sian nomtabulon de "Akcepta Stacio por Vizitanta Amaso" en la Kotona Ŝpinteksa kaj Prestinktura Fabriko de Gianghi, plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon instigis la konservativajn fortojn por fari atakon kontraŭ ili per molaj kaj malmolaj rimedoj. Li Venĝong firme atentigis siajn batalamikojn: "Ni devas malcedi al ĉia tempesto kaj ondaro kaj frakasi ĉiujn intrigojn de la klasa malamiko!"

Tie ili restis firme sur sia starpunkto, kun klara standardo, sen timo al ĉirkaŭatako, kaj kuraĝe riskis sin al danĝero por decideme batali kune kun la revoluciaj maldekstruloj. Ili firme tenis en sia memoro la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ **"protektu la maldekstrulojn"**. Tage kaj nokte, en vento kaj pluvo, ili patrolis ĉirkaŭ la fabriko kaj gardostaris por la kunveno de revolucia amasa kritiko. Kie maldekstruloj troviĝis sub minaco, tien ili alvenis. Kie maldekstruloj renkontis malfacilon, tien ili rapidis por helpi. La mal-

dekstraj amasoj estis treege kortuŝitaj kaj diris, firme premante la manojn de la batalantoj de la "Heroa Kvara Plotono": "Vi estas vere niaj intimuloj alsenditaj de Prezidanto Maŭ kaj liaj bonaj batalantoj!" Kaj la batalantoj respondis: "Prezidanto Maŭ donis al ni klaran instrukcion, kaj ni devas subteni nur maldekstrulojn en la revolucio."

Somere en Nanĉang, la laborejoj estis tiel varmaj kiel forno. Kiam klasaj malamikoj konspiris por subfosi la produktan laboron, la batalantoj de la "Heroa Kvara Plotono" batalis kaj laboris la tutan tagon en uniformoj plene malsekigitaj de ŝvito ŝultro ĉe ŝultro kun la revolucia amaso. Li Venĝong skribis sur nigra tabulo en iu laborejo: "Tenu la revolucion, stimulu la produkton, firme restu ĉe la laborposteno, kaj preventu subfosadon de la malamiko", por instigi ŝpini kaj teksi pli multe kaj tiel doni fortan baton al la malamiko. Kune kun la batalantoj li prenis la laboristojn kiel instruistojn por lerni la laborteknikon. Kie la laboro estis plej malfacila kaj laciga, tie ili aperis. Kie mankis laborfortoj kaj la laboro estis urĝa, tie ili prenis deĵorojn.

Ili ĉiam rigardis la propagandon de la penso de Maŭ Zedong kiel fundamenton por la laboro de subteno al la maldekstruloj. En ĉiu ajn okazo, ili persistis en armado de la proletaraj revoluciuloj kaj edukado de la trompitaj amasoj per la senlime brila penso de Maŭ Zedong, donis pezajn batojn al la malamiko kaj senĉese antaŭenpuŝis la revolucion kaj produktadon en la tuta fabriko.

En la tagoj kiam tre intensa estis la laboro de subteno al la maldekstruloj, Li Venĝong iris al fabrikoj, vilaĝoj kaj lernejoj por plenumi la taskojn de subteno al la maldekstruloj, al la industrio kaj al la agrikulturo kaj de milita trejnado. Kune kun la batalantoj li iris de unu batalposteno al alia, komunikis rapide kaj komplete la grandajn strategiajn dispoziciojn kaj batalajn ordojn de Prezidanto Maŭ al la amasoj kaj faris senmortan meritplenan servon al la granda proletara kultura revolucio.

"NE ZORGU MIN, GRAVE ESTAS SAVI LA RUĜAJN GVARDIANOJN!"

En la 19-a de aŭgusto, 1967, la kvara plotono prenis sur sin novan taskon eskorti grupon da proletaraj revoluciuloj kaj junaj ruĝaj gvardianoj trans Gangiang por ke la lastaj reiru al la kamparo kaj tie revoluciu.

Kiel glora kaj grava tasko! La junaj batalantoj de la "Heroa Kvara Plotono" rigardis tion kiel novan bataltaskon asignitan de Prezidanto Maŭ. Same kiel ĉe ekplenumo de tasko de subteno al la maldekstruloj, antaŭ la ekiro, Li Venĝong plena de heroa batalspirito diris al siaj kamaradoj: "Ni batalas por

Kamarado Li Venĝong (maldekstre) studas kun siaj batalamikoj verkon de Prezidanto Maŭ.





Kiam la elsavitaj ruĝaj gvardianoj vizitas la 4-an plotonon, la plotonestro gvidas ilin voĉlegi vortojn de Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ, kiam ni vivas. Ni oferos nian vivon por Prezidanto Maŭ, kiam ni devas morti. Protekti la proletarajn revoluciulojn kaj junajn ruĝajn gvardianojn signifas protekti Prezidanton Maŭ kaj lian proletaran revolucian linion."

Tiel la dek unu batalantoj de la "Heroa Kvara Plotono" marŝis sur sia vojo kun profunda fideleco al Prezidanto Maŭ.

La aŭtobusoj fluge rapidis al la pramejo de Gangiang.

En la aŭtobusoj la proletaraj revoluciuloj kaj junaj ruĝaj gvardianoj el la tuta koro esprimis sian senkomparan amon kaj dankemon al la batalantoj, intimuloj senditaj de Prezidanto Maŭ, kaj ankaŭ la lastaj esprimis sian profundan prizorgon kaj estimon al la proletaraj revoluciuloj kaj junaj ruĝaj gvardianoj kun plej sincera klasa amo. La koroj de la PLA-anoj kaj la revoluciaj sturmantoj, senlime fidelaj al la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ, batis en plena akordo kaj restis pli proksime unuj ĉe la aliaj.

Veninte al la pramejo la plotonestro Li Venĝong kondukis la vojaĝantojn suriri la pramon, kiu tuj ekveturis al la alia bordo.

Kiam la pramo venis al la mezo de la rivero, kie estis rapida fluo, neatendite la akvo superpasis la randon de la pramo, tiel ke fine okazis katastrofo de drono.

En tiu kriza momento la batalantoj de la kvara plotono havis nur unu penson: Oni nepre savu la junajn ruĝajn gvardianojn el la akvo. Li Congkjuan, komunisto kaj vicestro de la subplotono, ne kapablis bone naĝi, sed li sukcesis savi sinsekve tri ruĝajn gvardianojn kun helpo de malgranda tabulo. Fine, kiam li trovis, ke kelkaj junaj revoluciuloj estis en granda danĝero, li senhezite puŝis la tabulon al ili kun la revolucia heroismo oferi sian propran vivon por savi aliajn, kaj mem estis forportita de la torento.

La komunisto Ĉen Diankuj forlasis malsanulejon nur antaŭ tri tagoj kaj ankoraŭ ne tute resaniĝis. Luktante kontraŭ la torenta fluo li sinforgese savis la junajn revoluciulojn unun post alia.

Disfendante la ondojn la komunisto Pang Caŭŝeng sukcesis savi ok junajn ruĝajn gvardianojn en tre mallonga tempo.

La nova batalanto Li Zunming, kiu ne povis naĝi, jam surgrimpis boaton. Sed, kun

bolanta sango, li resaltis senŝanceliĝe en la riveron por savi la ruĝajn gvardianojn, kiam li vidis siajn batalamikojn heroe batalantaj en la akvo.

La heroa plotonestro Li Venĝong tute forgesis sin en la kriza momento de la subakviĝo de la pramo kaj donis imitindan ekzemplon por siaj kamaradoj en la savado de la ruĝaj gvardianoj de Prezidanto Maŭ. Fojon post fojo li subakviĝis kaj savis sinsekve kvar ruĝajn gvardianojn kaj unu revolucian amasanon. Post tio lia energio elĉerpiĝis kaj mem glutis ne malmulte da akvo, kaj ne povis plu elteni. Sed kiam li vidis, ke kelkaj junaj ruĝaj gvardianoj estas tuj forportotaj de la turniĝanta fluo meze de la rivero, li naĝis al ili ĉion forgesante. Sed montriĝis ke li perdis plene sian forton en naĝado, kaj la batalanto Ju Dehiang rapide alnaĝis por helpi lin. Tamen, per sia lasta energio, Li Venĝong decideme ordonis: "Ne zorgu min, grave estas savi la ruĝajn gvardianojn!"

Jen estis la lasta frazo plena de brilo, kiun postlasis la heroo Li Venĝong en la lasta minuto de sia vivo. Tio plej koncentre, plej vive kaj plej profunde spegulas la senkompare noblan, senegoisman proletaran spiriton de Li Venĝong kaj la batalantoj de la kvara plotono. Kiam ili venis al la lasta sekundo de sia vivo, tio, kion ili pensis, estis Prezidanto Maŭ kaj liaj ruĝaj gvardianoj.

LA MATURIĜO DE LA HEROO

La heroo Li Venĝong devenis de malriĉkamparana familio en Vejhian, Ŝandong-provinco, kiu havas historion plenan de suferoj kaj mizeroj. Ekde sia infaneco li arde amis Prezidanton Maŭ.

"Ruĝas la oriento, leviĝas la suno, en Ĉinio aperas Maŭ Zedong..." Jam de sia juneco li aparte ŝatis la kanton *Ruĝas la Oriento.* Li komprenis, ke la malfeliĉaj suferantoj neniam povus liberigi sin el subprematec kaj sklaveco, kaj la infanoj de malriĉuloj neniam havus la ŝancon viziti lernejon, sen Prezidanto Maŭ, kiu gvidis la malriĉulojn en revolucio. Ĉiufoje, kiam li kantis la plej sonoran kanton *Ruĝas la Oriento*, tuj leviĝis en lia koro la ruĝa suno kun helaj radioj.

En sia juneco Li Venĝong plej amis aŭskulti la historiojn pri Dong Cunĵuj, Huang Giguang k. a. herooj. Foje kiam li rakontis al sia amiketo Li Hongĝu historion pri Dong Cunĵuj, kiu oferis sian vivon por detrui malamikan fortikaĵon, li subite ekstaris, imitante Dong Cunĵuj, kiu kun rondigitaj okuloj sturmis la

La tuta personaro de la "modela plotono de subteno al la maldekstruloj kaj de zorgo al la popolo" de la 6-a roto de iu ĈPLA-trupo.



fortikaĵon de la malamiko tenante eksplodaĵon en siaj manoj, kaj diris al sia amiketo: "Hongĝu, kiam mi estos plenaĝa, mi aliĝos al PLA, kaj estos same tiel kuraĝa kiel onklo Dong Cunĵuj." Tian respekton li havis por la heroo Dong Cunĵuj, kaj lia koro estis tiom emociita.



8 batalantoj el la "modela plotono", kiuj savis ruĝajn gvardianojn kaj revolucian amason el la torentanta rivero Gangiang, inter parto de la elsavitoj.

Kiam Li Venĝong studis en la lernejo, li samtempe faris fizikan laboron. Li forte amis la kolektivon, la ŝtaton kaj la proprajĵojn de la kolektivo. Kiam la produkta brigado distribuis produktaĵojn inter la membroj, li ĉiam helpis unue la familiojn de martiroj kaj PLA-anoj, al kiuj mankis laborfortoj, kaj la komunumanoj garantiataj je kvin aferoj (de la kolektivo pri manĝo, vesto, hejtaĵo, eduko de la idoj kaj senpaga enterigo post morto pro perdo de laborforto kaj manko de helpipovaj parencoj kaj amikoj) por transporto de ricevitaĵoj. Li ankaŭ starigis senpagan barbirejon kaj fervore servis al la amaso.

En la vintro de 1959, Li Venĝong meminiciate partoprenis la konstruadon de la Hiaŝan-a akvokonservejo. La vetero estis malvarmega, la tasko estis peza, kaj la laboro de terfosado kaj ĉarpuŝado estis tre laciga. Ĝuste en tiu momento venis al li letero el la hejmo sciiganta la morton de lia avino kaj petanta lin rapide hejmeniri. Kiam la gvidantoj de la konstruejo informiĝis pri tio, ili decidis post interkonsiliĝo, ke Li Venĝong tuj reiru hejmen. Sed, en sia interparolo kun gvidanta funkciulo, li decideme respondis: "Konstrui la akvokonservejon estas plenumo de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, ke ni devas energie klopodi por fortigi nin kaj rapide ŝanĝi la fizionomion de postrestinteco de nia lando: unue, malriĉeco; due, blankeco. La nuna tasko estas tiel peza, kaj ni ne havas sufiĉe da laborfortoj. Ĉu mi povus foriri pro mia privata afero? Krome, la avino jam mortis, kian veran helpon mi povus doni?" Decideme li daŭre restis, kaj intense laboris en la konstruejo.

En 1960, Li Venĝong atingis la aĝon de dek ok jaroj kaj fine efektivigis sian revon, kiun li havis de sia infaneco, aniĝi al PLA — la granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong. Li aktive respondis la alvokon de vicprezidanto Lin "Nepre ekposedu vere la penson de Maŭ Zedong", pene studis verkojn de Prezidanto Maŭ, firme agis laŭ liaj instrukcioj, kaj baldaŭ honore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

En 1961, aperis en nia lando provizoraj malfaciloj en nacia ekonomio, rezulte de na-



La patroj kaj patrino de la tri martiroj vizitas la "modelan plotonon" por esprimi siajn dankojn al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, dank' al kies edukado iliaj filoj kreskis kaj mortis kiel herooj, pro la popolo. Ili turnis sian doloron en forton kaj sendas nun aliajn filojn al la armeo kiel rekrutojn. La starantoj estas (de maldekstre) pliaĝa frato de Li Venĝong, juna frato de Ĉen Diankuj kaj pliaĝa frato de Li Congkjuan.

turaj katastrofoj okazintaj en tri sinsekvaj jaroj. La Ĥruŝĉov de Ĉinio kaj liaj agentoj, en ligo kun diversspecaj demonoj kaj diabloj de la socio, levis en la kamparo la nigran venton de "tri pliigoj kaj unu fikso" kaj "kvar liberoj" por subfosi socialismon. Kun profunda malamo kontraŭ la klasa malamiko Li Venĝong plurfoje skribis al siaj familianoj kaj parencoj kaj al la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj funkciuloj de la produkta brigado en la hejmvilaĝo kaj indigne malkovris la intrigon de la klasa malamiko. Fojon post fojo li atentigis siajn klasajn fratojn, ke ili gravuru en sian memoron la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Nur socialismo povas savi Ĉinion"**, kaj ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj senŝanceliĝe iri la vojon de socialismo. Poste kiam Li Venĝong revenis hejmen por viziti siajn familianojn, li speciale vizitis sian onklinon en la vojo, kaj parolis kun ŝi, rememorigante la pasintajn mizerojn kaj suferojn kompare kun la nuna feliĉo. Kun profunda zorgemo li diris al ŝi: "Onklino, kio suferigis nin, la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, en la pasinteco, estas la sistemo de privata posedo kaj individua mastrumo. Prezidanto Maŭ gvidas nin iri la vojon de kolektivigo ja ĝuste por forigi tiun ĉi radikon de malriĉeco kaj certigi feliĉan vivon por ĉiam. Kiom ajn granda estas la malfacilo en la nuna momento, ni nepre devas sekvi la vojon de Prezidanto Maŭ ĝis la fino." La parolo de Li Venĝong ĝislarme emociis la onklinon, kiu diris senĉese kapjesante: "Estu trankvila, Venĝong! La ruĝa koro de ni malriĉuloj fidelaj al Prezidanto Maŭ neniam ŝanĝiĝos ĝis sekiĝo de maro kaj putro de roko."

De multaj jaroj, Li Venĝong profunde komprenas el sia propra sperto en kreskado



La ekspozicio pri la tri martiroj Li Venĝong, Li Congkjuan kaj Ĉen Diankuj aranĝita de la proletaraj revoluciuloj de Gianghiang, Nanĉang, Gianghi, funebre al la batalantoj de Prezidanto Maŭ sinoferintaj pro la popolo.

kaj progresado, ke por firme sekvi Prezidanton Maŭ por revolucii kaj por ekskluzive kaj senrezerve servi al la popolo, oni devas klopodi kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ, detrui egoismon kaj starigi kolektivismon kaj ĝisfunde reformi sian mondkoncepton. Li ofte diris al siaj kamaradoj: "Se oni ne batalas kontraŭ egoismo, kiam li trovas ĝin ĉe si, tio estas malfideleco al Prezidanto Maŭ. Ĉu oni volas aŭ ne volas batali kontraŭ egoismo — tio distingas veran revoluciulon dis de malvera...

En lastaj jaroj, precipe dum la granda proletara kultura revolucio, kiam agante laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri ligo de teorio kun praktiko, Li Venĝong kreive studis, kreive aplikis verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj aktive batalis kontraŭ la egoismo en sia kapo uzante la penson de Maŭ Zedong kiel sian batalilon, li trovis bazan vojon por plirapidigi la revoluciigon de sia ideologio. Tio estas la frazo, kiun Li Venĝong skribis en la skizo de raporto pri sia penso: "Alte tenu la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, kaj ĝisfunde malkaŝu, akre kontraŭbatalu kaj decide forigu la proprajn burĝajn egoismajn pensojn".

Post sia aniĝo al la armeo Li Venĝong renkontis multajn demandojn en sia batalado. Li rigardis sian traktadon de tiuj demandoj kiel spegulon de sia mondkoncepto kaj kiel batalo inter kolektivismo kaj egoismo. Uzante la penson de Maŭ Zedong kiel batalilon kaj per malkaŝado, kontraŭbatalo kaj forigo de egoismo li solvis tiujn demandojn unun post alia kaj senĉese revoluciigis sian ideologion.

Iam en kunveno pri kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, Li Venĝong iniciatis malkaŝi sian egoismon. Li komplete, ĝisfunde elmontris siajn egoismajn pensojn kaŝitajn en la profundo de sia animo kaj diris: "Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke **'Ni ne timas eldiri niajn mankojn.'** Kiam ni malkaŝas egoismon, ni devas malkaŝi ĉion malpuran en la profundo de la animo."

Foje en kunveno de demokratia vivo, la batalantoj de la plotono faris kritikojn al Li Venĝong, kiu tiam ĵus fariĝis plotonestro, kaj kelkaj el tiuj kritikoj estis sufiĉe akraj. Li esprimis bonvenigon al tiuj kritikoj en la kunvenejo, kaj post la kunveno li skribis speciale leteron sur ruĝa papero por danki al tiuj, kiuj helpis lin per kritikoj. En la kunveno iu batalanto kritikis iom troe, kaj la aliaj kritikis lian eksceson. Li Venĝong poste aparte parolis kun li por liberigi lin de maltrankvilo kaj diris sincere: "Vi faras kritikojn pro la revolucio, kaj mi korektas miajn mankojn ankaŭ pro ĝi. Mi kore esperas, ke vi faros al mi pli da kritikoj en la estonteco." Li

Venĝong notis en sian kajeron ĉiujn kritikojn faritajn de la batalantoj kaj eliminis unun post alia la mankojn, kiujn li posedis, komparante siajn agojn kun la instruoj donitaj en la verkoj de Prezidanto Maŭ, kiujn li kreive studis kaj aplikis, akre batalante kontraŭ sia egoismo. La batalantoj elkore laŭdis, ke la plotonestro faras rapid-decidan kaj eksterman batalon en korektado de siaj mankoj, kaj ke li vere efektivigas kion li promesas, kaj tuj faras kion li diras.

"Niaj komunistoj devas sperti ventojn kaj pluvojn kaj iri en la mondon; tio, kion ili devas sperti, estas ŝtormoj kaj pluvegoj de amasa batalo, kaj tio, kion ili devas eniri, estas la vasta mondo de amasa batalo." Li Venĝong sekvis la instruojn de Prezidanto Maŭ, kreive studis kaj aplikis liajn verkojn en grandaj ŝtormoj de klasbatalo, energie detruis egoismon kaj plene starigis kolektivismon. Li vere indis la nomon de heroa batalanto provita de danĝeraj ondegoj.

Fidele kaj severe observante la instruon de Prezidanto Maŭ pri ekskluziva kaj senrezerva servo al la interesoj de la popolo, la heroo Li Venĝong senŝanceliĝe kaj ĝisfunde reformis sian mondkoncepton, solvis la penson de Maŭ Zedong en sia sango kaj gvidis per ĝi sian penson kaj agadon. En lia kapo ore brilis nur la kolektivismo. Li ne havis la vorton "mi" en sia penso, kiam li troviĝis antaŭ akra klasbatalo, akceptis kritikojn, kritikis aliajn, aŭ estis en rilato al sia propra familio aŭ antaŭ materia rekompenco, aŭ kiam li troviĝis en la grava momento de vivo aŭ morto.

La procezo de la maturiĝo de la heroo Li Venĝong estas tiu de lia kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj la armado de sia kapo per la penso de Maŭ Zedong. Tial, li povis ĝoje oferi sian vivon pro la revolucio kaj la popolo en la kriza momento.

Amikoj, jen estas la kaŭzo, kial amase aperas herooj en la epoko de Maŭ Zedong. Alian klarigon ni ne povas trovi.

Bravaj Vortoj*

☆ Ni kondukos la revolucion ĝis la fino, timante nek malfacilon nek morton, kaj batalos dum la tuta vivo, nek por famo nek por materia gajno.

☆ Firme ni batalu kontraŭ egoismo, ĝis ĝi disfalos, neniiĝos kaj fariĝos naŭza por ni. Ni batalu kontraŭ ĝi, ĝis ni mem sentos brulon sur la vangoj, ŝvitos sur la korpo, perdos la apetiton, kaj ne povos endormiĝi.

☆ Metu kolektivismon sur la lokon plej antaŭan, plej gravan, plej altan kaj plej superan. Ĝi superregu nian vivon je ĉiu sekundo.

☆ Rilate al revolucia laboro, ni devas esti plenaj je forta memfido, ekstrema entuziasmo, senlima fideleco, senkompara zorgemo kaj la plej granda pacienco. Nur tiamaniere ni povas nin dediĉi al ĝi "tutkore" kaj "senrezerve".

**Tio ĉi estas juroj faritaj de iu heroa modela plotono de PLA en sia kreiva studo kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ por sin stimuli.*

Propaganda Trupo de la Penso de Maŭ Zedong

"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon."

La laŭta kantado de la kanto kun teksto el vortoj de Prezidanto Maŭ superis la bruojn de ondegoj. Ĉirkaŭ dudek junaj literaturaj kaj artaj batalantoj staris en la malvarma akvo de maro, ŝultro-ĉe-ŝultre kaj brako-en-brake, por defendi la mardigon per siaj korpoj.

Ili estis membroj de propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong de iu el la pekinaj trupoj, kiuj venis por prezenti vespere la teatraĵon *Vang Gie — Bona Batalanto de Prezidanto Maŭ* en iu vilaĝo ĉe la digo. Ĝuste kiam ili alvenis al la vilaĝo, okazis impeta flusondegado, kiu minacis la vivojn kaj havaĵojn de la vilaĝanoj. Riskante sian vivon, la batalantoj luktadis kun la vilaĝanoj kvar horojn kontraŭ la furiozaj vento kaj ondoj kaj sekurigis la digon kaj la vilaĝon.



Estis jam profunda nokto, kiam la batalantoj formetis siajn malsekajn vestojn kaj provludis la improvizaĵon *Batalo kontraŭ Sisma Ondegado* kun la temo pri la defendo de la mara digo en la vespero. Post la rigardo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la vilaĝo kortuŝiĝis ĝis larmo. Ili diris kun emocio: "Kvankam ni ne vidis Vang Gie, tamen, ĉu vi mem ne estas bonaj vivantaj Vang Gie?"

Tio okazis en iu vintra nokto en 1965.

NOVTIPAJ LITERATURAJ KAJ ARTAJ BATALANTOJ

Tiu propaganda trupo armita per la penso de Maŭ Zeđong estis literatura kaj arta organizo formita el ĉirkaŭ dudek junaj batalantoj, kiuj devenis de la familioj de laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kun profunda klasa amo, ili prenis la prikantadon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la propagandon de la penso de Maŭ Zedong, la kulmino de marksism-leninismo en la nuna epoko, kiel sian bataltaskon por la tuta vivo.

Ekde sia fondiĝo en 1961, tiu propaganda trupo, jam firme respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **"literaturo kaj arto en servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj"**, profundiĝis inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kun la instruoj donitaj de Prezidanto Maŭ en siaj *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kiel armilo. Ĉie, kien venas la batalantoj kun la ruĝa libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la manoj kaj simplaj muzikiloj, ili propagandas la penson de Maŭ Zedong. Ili verkis mallongajn prezentaĵojn kun vortoj de Prezidanto Maŭ kaj la heroaj figuroj kaj modelaj agoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kiel temoj, kaj ilin prezentas ĉie. De ambaŭ flankoj de la Granda Muro ĝis la marbordo de Fugian, en kazernoj, ĉe kamprandoj, en laborejoj kaj sur kajoj kaj stacioj, ĉie sonis iliaj batalaj kantoj.

Por respondi la batalan alvokon de Prezidanto Maŭ **"servu al la tutmonda popolo"**, tiu propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong rigardas la revoluciajn batalojn de diversaj landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko kiel la siajn. La batalantoj solvis la penson de Maŭ Zedong en siajn literaturajn kaj artajn programerojn, kaj prezentas ilin kun plena entuziasmo al fremdlandaj gastoj.



Ilia prezento de *Himno al Ŝtormo*, kiu prikantas la kontraŭimperiisman batalon de la afrika popolo, ĉiam rikoltas varman manklakadon inter la spektatoroj. Multaj afrikaj amikoj diris kun emocio: "La ŝtorma manklakado en la aŭditorio hodiaŭ fariĝos intensaj pafoj en Afriko morgaŭ!"

Dum la tri jaroj de 1964 ĝis 1967, tiu trupo jam prezentis pli ol 600 fojojn por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj pli ol 200 fojojn por la amikoj el diversaj landoj en la mondo kun spektatoroj en sumo de pli ol 600,000 personfojoj. La batalantoj intime nomas ĝin "ruĝa teatra trupeto" kaj la fremdlandaj gastoj laŭdas trupanojn kiel "novtipajn literaturajn kaj artajn batalantojn de Maŭ Zedong".

STURMANTOJ EN LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO

"Nia celo estas fari literaturon kaj arton konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, fari ilin potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpi la popolon batali kontraŭ la malamiko unukore kaj unuanime."

Ĝuste sekvante tiun instruon de Prezidanto Maŭ kaj firme respondante lian grandan alvokon **"subteno al maldekstruloj", "subteno al industrio"** kaj **"subteno al agrikulturo"**, dum la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio, tiu propaganda trupo prenis plumon kiel glavon kaj pafilon, multe kaj ofte prezentas programerojn de amasa kritikado pri la ĉina Ĥruŝĉov kaj granda unuiĝo de proletaraj revoluciuloj, direktante la batalan lancpinton kontraŭ la plenmano da plej grandaj enpartiaj potencĵenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Tio forte kreskigis la batalspiriton de la proletara revoluciularo, kaj multe debatis la prestiĝon de la klasaj malamikoj.

En la frua periodo de la granda kultura revolucio, la propaganda trupo estis asignita deĵori en vagonaro sur la fervojo inter Pekino kaj Kantono, por prizorgi la gastojn de Prezidanto Maŭ, ruĝajn gvardianojn el diversaj lokoj de la lando. Sur la rapidanta vagonaro, ili organizis la gejunulojn por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, prezenti literaturajn kaj artajn programerojn kaj okazigi en vagonoj kunsidojn por interŝanĝi spertojn en la studado kaj aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Foje, la batalantoj vidis iun ruĝan gvardianon, kiu montris unu eluzitan bovlon kaj plendis pri la pasinta amara travivaĵo de almozpetado per tiu bovlo de la tri generacioj de sia familio. La batalantoj tuj okazigis en la vagono "kunsidon por rememori la amaraĵon de unu eluzita bovlo". Ĉiuj ruĝaj gvardianoj en la tuta vagono tre indignis kontraŭ la malnova socio. Iuj el ili deklaris kun larmoj: "Ni firme tenos la memoron pri la pasinta amaro, neniam reiros la malnovan vojon kaj strikte sekvos Prezidanton Maŭ por decideme konduki la grandan proletaran kulturan revolucion ĝis la fino!"

En la alta tajdo de amasa kritikado, la propaganda trupo venis en la Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko de Tiangin, kie la ĉina Ĥruŝĉov iam distrumpetis pri la absurdaĵo ke "ekspluato estas merito". Ili komparis la pasintan amaron kun la dolĉa nuntempo kune kun la maljuna laboristo Ĝang, kies gepatroj mortis sub la ekspluato kaj subpremado de la kapitalisto, kaj verkis dialogon laŭ lia malfeliĉa familia historio, refutantan komplete la diablan aserton de la ĉina Ĥruŝĉov ke "laboristoj bonvenigas ekspluaton". Post la prezento de la dialogo, ĉiuj laboristoj estis plene indignigitaj, kaj la krioj de la slogano "For la ĉinan Ĥruŝĉov" sonoris tra la tuta laborejo.

MATURIĜO TRA VENTEGOJ KAJ ONDEGOJ

En la longa revolucia militirado, la trupo, al kiu la propaganda trupo apartenas, strikte sekvis instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj sange batalis, movante sin de Tajhang-montaro al Pekino kaj de korea batalkampo al la fronto de Fugian kaj farante multajn meritojn en militoj. Dum tiu tempo, inter la batalantoj formiĝis tradicio, ke ili mem verkas kaj prezentas literaturajn kaj artajn ludaĵojn, kiaj popolkantoj, humoraj dialogoj kaj *jango*-danco. En frontaj pozicioj, ĉe gardejoj sur montpintoj kaj sur vojo de marŝado, ili ĉiam kaj ĉie povas komenci prezentadon kun akompano de tamtamo kaj tamburo.

La batalantoj heredis tiun revolucian tradicion kaj ripetade studis la saĝan instruon de Prezidanto Maŭ: **"Por venki la malamikon ni devas nin apogi, antaŭ ĉio, sur la armeo kun pafiloj en la manoj. Sed nur tia armeo ne sufiĉas; ni devas havi ankaŭ kulturan armeon, kiu estas nemalhavebla por unuigi nin mem kaj venki la malamikon."** En 1961, sub la apogo de la partia organizo kaj la superuloj, aperis en klasbatala ŝtormo tiu ĉi propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong.

Sed la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj nigraj lakeoj en la literaturaj kaj artaj rondoj provis etendi siajn ungojn por mortigi tiun novnaskitan literaturan kaj artan forton. En iu prezentado, kun ĝisosta malamo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj la batalantoj intencis ludi la programeron nomatan *Bazu Ĉiujn Agojn sur la Grundon de Batalo*. Tamen, la nigra lakeo de Lu Dingji insiste volis forstreki ĝin el la programo, absurde dirante ke "tro rigidaj estas la moviĝoj", kaj ke ĝi estas kun "tro forta pulvoodoro". La batalantoj refoje studis la eldiron de Prezidanto Maŭ en la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, ke **"En la hodiaŭa mondo, ĉiu kulturo, literaturo aŭ arto apartenas al certa klaso kaj sekvas certan politikan linion"**. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ili faris la programeron pli riĉa je revolucia kaj batala spirito.

Post multfoja intensa luktado, la intrigo de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la literaturaj kaj artaj rondoj bankrotis. Kaj tiu propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong venke antaŭenmarŝas trabatante al si vojon kaj laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ por la socialismaj literaturo kaj arto.

Post Rondira Vizito al Bazaj Unuoj



HE HIAŬTING, vicregimentestro de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo

ĈIRKAŬ la aŭtunrikolto de la lasta jaro, mi vizitis la fronton de subteno al agrikulturo por koni la aktualajn cirkonstancojn, kunportante tornistron kaj verkojn de Prezidanto Maŭ. Dum la vizito mi manĝis, dormis, lernis kaj laboris kune kun niaj batalantoj kaj komunumanoj. En la daŭro de pli ol dudek tagoj, mi piediris pli ol 250 km. en 11 komunumoj. Jam de multaj jaroj mi ne faris tiel longan piediradon, nek kontaktis kun tiel multaj amasoj, kaj mia menso estis tuŝita de multaj aferoj. Lastatempe Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"De nun la kadroj iru unu post alia al subaj unuoj kaj tie rigardu, persistu en la amasa linio, konsiliĝu pli ofte kun amasoj kaj estu iliaj lernantoj."** Reveninte de la kamparo, mi kombinis la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ kun la praktiko kaj sentis ĝin tre intima.

PROBLEMO TROVITA ĈE LA PLANDA VEZIKEGO

Je la unua tago, mi iris al najbara komunumo. La distanco de la kazerno ĝis ĝi estas nur pli ol 40 lioj, ne tre longa. Neatendite, antaŭ ol atingi la destinitan lokon, mi jam eksentis doloron je la kruroj, kiuj ne tiel obeis mian disponon. Atinginte la sidejon de la propaganda trupo, apenaŭ mi sidis kaj ekvolis venigi kadrojn de la roto por priparoli la laboron, subite la plando iom doloris min. Demetinte la piedveston, mi trovis grandan vezikon sur la plando.

Vidante la vezikon, mi sentis min maltrankvila. Antaŭ la venko de la revolucio, la trupoj tutajn tagojn militiris kaj batalis, kaj iri ĉ. cent liojn potage jam fariĝis simpla afero por ni. Kiam mi estis kuriero, miaj plandoj ĉiam portis dikajn kalojn. Tiam mi piediris en sandaloj unu-du cent liojn kaj la piedoj neniam vezikiĝis. Iutempe mankis sandaloj, mi do nudpiede iradis; kiam dornoj enpikis la piedojn, mi defrotis ilin sur tero. La gvidantoj kaj kamaradoj nomis min "ferplandulo". Post kiam mi fariĝis bazorganiza kadro, mi militiris kaj batalis kiel antaŭe kune kun batalantoj spite de vento aŭ pluvo kaj ne trovis ian ajn problemon ĉe la piedoj. Hodiaŭ estis la unua fojo, ke mi rimarkis, ke miaj piedoj fariĝis delikataj.

Vespere, trapikinte la vezikon sub petrola lampo de la dommastro, mi malfermis la verkon de Prezidanto Maŭ kaj studis ĝin ĝis profunda nokto. Mi ripetade pripensis la demandon, kial vezikiĝis miaj "ferplandoj"? En *Pri Koalicia Registaro* Prezidanto Maŭ diris: **"Nia kongreso devas alvoki la tutan partion esti singardema kaj atenti ke neniu kamarado ĉe ajna labora ĉenero disiĝu de la amasoj."** El la instruo de Prezidanto Maŭ mi trovis la kaŭzon

kial la piedoj delikatiĝis. Post la venko de la revolucio la trupoj enloĝis urbojn. Kun la disvolviĝo de la revolucio mi plipromociiĝis, kaj mi propre devis trakti tiun ŝanĝiĝon de la revolucio per revolucia vidpunkto kaj plifortigi mian respondecan senton al la revolucio por pli intime ligiĝi kun la amasoj kaj pli bone servi al la popolo. Sed mi rigardis kiel mian individuan privilegion tion, kion al mi donis la popolo. Rezulte, ju pli mi promociiĝis, des pli kreskis mia aroganteco, des pli malmultiĝis mia kontaktiĝo kun la amasoj. La piedoj delikatiĝis ĉefe pro la ŝanĝiĝo de la penso. Mi decidis iri en la amasojn por ke la perditaj kaloj rekresku.

Fininte la enketadon pri tiu komunumo, mi ekiris al alia en la kvara tago. Ĝuste en tiu tempo ekpluvegis, kamaradoj volis sendi min per veturilo aŭ ĉevalo, sed mi rifuzis. Mi pensis, ke mi firme konservos la originan naturon de veterana batalanto, nur se mi kune kun la amasoj senĉese spertas ventopluvon kaj sin hardas en laborado fojon post fojo.

MALAPERIS INCITIĜEMO POST FORIGO DE AROGANTECO

En la lastaj jaroj, en mi formiĝis malbona humoro de incitiĝemo. Vidinte ion ne laŭdeziran, mi ekkoleris kaj riproĉis aliajn. Pri tio kamaradoj plurfoje faris al mi kritikojn, sed mi ne forigis la mankon. Ĉifoje, alveninte al la propaganda trupo de la kvina roto, mi trovis la radikon de mia incitiĝemo kaj ĝin iom bridis.

Tiun tagon, aŭskultinte la raporton pri laboro fare de kadroj de la kvina roto, mi sciis, ke ili tute ne plenumas la decidon difinitan de la regimenta partia komitato pri ne-troa disigo de la personoj subtenantaj agrikulturon, sed alprenas metodon, ke du personoj respondecas al unu produkta brigado. Kaj ĉiu el ili profundiĝas en iun produktan grupon dum la alia prizorgas la tutan brigadon, tiel ili ambaŭ aktivas preskaŭ tute aparte en plejparto da tempo. Je la aŭdo ekleviĝis mia incitiĝemo. Ili klarigis, ke tia aranĝo havas multajn avantaĝojn, sed iliaj vortoj neniel eniris miajn orelojn. Mi ree volis riproĉi ilin, sed aŭdinte ke ili jam petis konsenton de la direkta oficejo pri subtenado al agrikulturo, mi devis kovri la incitiĝemon. La sekvintan tagon mi persone iris al proksima brigado por fari enketon, por ekzameni la efikecon de tiu metodo. Tio, kion mi vidis, vere estis ekster mia atendo. Estas unu rekruto kaj unu malnova batalanto, kiuj respondas pri tiu brigado. La rekruto profundiĝis en iun grupon kaj tie organizis malgrandan kurson por studi la penson de Maŭ Zedong. Unuflanke li kaptis vivajn pensojn, donis helpajn lecionojn kaj gvidis diskuton, kaj aliflanke li solvis multajn demandojn de kadroj kaj ĉefoj de amasaj organizoj de tiu brigado. Kaj ĉio iris en bona ordo. Kiam la rekruto akiris sperton, la malnova batalanto disvastigis ĝin en la tuta brigado, ili kune studadis pri kaj kunagadis en siaj laboroj, sinapogante sur la amasoj, tial ilia laboro subtenanta agrikulturon en la brigado iris en plena vigleco. La kadroj kaj amasoj unuvoĉe laŭdis ilin, dirante: "La Liberiga Armeo donis grandan helpon al nia brigado." Mi venis al propaganda trupo de alia roto por vidi, kiel iras la laboro kondukita tute laŭ la decido de la regimenta partia komitato. Tie ĉio estis alia ol en la kvina roto. Pro tio ke tri personoj kune laboris, la laboro estis en pasiveco, kaj ofte okazis ke ili prizorgis iun grupon, dum ili devis forlasi la tutan brigadon, aŭ male. Precipe post la difino pri malpermeso al unuopa decido de problemoj, ĉiuj timis fari eraron en parolado kaj laboroj, kaj la propagando estis stereotipe kondukita. La batalantoj havis akran opinion kontraŭ tiu difino, iuj diris: "Ĝi streĉe ligas niajn manojn kaj piedojn, ja estos miraklo, se ni ne dronas, kiam ni naĝas en la ŝtormoj kaj ondegoj!" Komparante la du propagandajn trupojn unu kun la alia, mi ricevis bonan lecionon kaj profunde komprenis: **"La amaso estas vera heroo, dum ni mem estas ofte infanece ridindaj".** Neniel leviĝis la incitiĝemo por riproĉi aliajn.

El tio mi trovis la kaŭzon de facila eksplodo de mia incitiĝemo. La incitiĝemo devenis de la aroganteco de "altrangulo" kaj la aroganteco ofte kaŭzis incitiĝemon. Tiun incitiĝemon ni nepre forigos, ĉar ĝi alportas tre grandan malutilon. Ĝi forbruligos nian proletaran senton, nian demokratian laborstilon, nove-naskitaĵon elkreskantan en la amasoj kaj la intiman rilaton inter ni kaj la amasoj. La sola rimedo por forigi tiun arogantecon estas forigi la teniĝon de "altrangulo" kaj modeste esti lernanto de la amasoj. La incitiĝemo malaperis post forigo de la aroganteco.

GRANDA DIFERENCO INTER MALSUPRENIRO AL BAZORGANIZAĴOJ KAJ SIDO EN SUPERA OFICEJO

Tiun tagon, mi iris de la kvina roto al la propaganda trupo de la oka roto. Antaŭ ol eniri la vilaĝon, mi vidis Sun Boven, la batalanton de la oka roto, kaj demandis kie li loĝas. Li montris

la direkton kaj kondukis min en izolitan kabanon ekster la vilaĝo. Sun Boven estis malnova korpgardisto en nia regimento, kaj en la pasinta jaro li venis al la oka roto por esti batalanto. Vidinte ke li loĝas en tiu kabano, mi rememoris lian pasintan figuron. Kiam tiu batalanto servis en la regimentejo, li estis petola, disciplinrompema en la vivo kaj ne tro serioza en la laboro. Nun, alveninte en la roton, kiel li ankoraŭ ne forigis la mankon! Mi demandis lin: "La vetero jam malvarmiĝis. Kial vi ne serĉas pli bonan domon, sed volonte ĝuas tian freŝecon?" Li respondis: "La domo estis loĝita de instruitaj junuloj en la trupo kiuj venis en la kamparon; kiam komenciĝis la granda kultura revolucio, ili revenis en la urbon, agitite de plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Mi transloĝiĝis ĉi tien por ilin konvinki. Nun jam revenis kelkaj junuloj, jen sur la terlito estas iliaj kvar litkovriloj. Por bone propagandi la penson de Maŭ Zedong, mi venkos ĉian malfacilon." La vortoj de Sun Boven arde emociis min. Je la sekvinta tago mi petis de la amasoj opiniojn pri lia laborstato. La komunumanoj unuvoĉe diris: "La batalantoj de la Liberiga Armeo venis propagandi la penson de Maŭ Zedong kvazaŭ ili sendus al ni la soifatan pluvon, ili solvis por ni multajn problemojn!" Tuj sekve, ĉiuj donis unun post alia siajn laŭdojn pri la Malgranda Sun en la laboro.

Kial mi malĝuste taksis tiel bonan batalanton? Reveninte mi meditadis pri tio. Fine, mi trovis



la respondon en verko de Prezidanto Maŭ. Li diris: **"En la amasoj latentas tiel granda socialisma entuziasmo, kial multaj gvidinstancoj ne aŭ tiel malmulte konsciis pri tio antaŭ kelkaj monatoj? Kial tiom malsame pensas la gvidantoj kaj la vastaj amasoj? Se oni prenas tion kiel lecionon, kian sintenon oni devas preni en la estonteco por trakti similajn aferon kaj problemon? La respondo estas sola, t. e. ne disiĝi de la amasoj kaj lerte trovi entuziasmon de la amasoj en esenco."** La vortoj de Prezidanto Maŭ trafis mian vundon. Kiam ni disiĝis de la amasoj, certe ni ne povis vidi ilian entuziasmon. Ĉu mi jam bone konis Sun Boven, kiam li estis korpgardisto en regimento? Li laboris ĉe mi, sed mi neniam faris kun li korversan babilon; la subplotono de korpgardistoj estis en la distanco de nur kelkdek metroj post mia domo, sed mi ne iris tien por konstati detale kiel oni opiniis pri li. Ĉar mi rigardis batalanton kun teniĝo de "altrangulo", kompreneble, mi trovis nur liajn mankojn, kiuj ne konvenis al mia gusto, kaj kun la paso de tempo, en miaj okuloj Sun Boven fariĝis difektoplena batalanto. Ĉifoje, mi alvenis en la amasojn, propraokule vidis kion faris tiu batalanto kaj aŭdis kion diris la amasoj pri li. Nun li impresas min tute alie.

ALIES PIEDOJ NE POVAS ANSTATAŬI LA MIAJN

En la sama tago mi alvenis sidejon de la propaganda trupo de la oka roto por esplori ĝian memkonstruon. En ĝia oficejo mi renkontis vicrotestron Ĝang Baŭkjuan ĵus revenintan de iu produkta grupo. Mi do petis lin paroli pri la stato koncerne tiun flankon. Ĝang diris: "Nia roto havis sperton en la memkonstruo, t. e. akceli nian propran studon de verkoj de Prezidanto Maŭ per helpo al la komunumanoj en tiu studo." Tuj sekve, li raportis al mi sperton kiel la batalantoj helpis al la komunumanoj fondi kurseton, konduki revolucian grandan kritikon kaj studi la "tri popularajn artikolojn". Aŭskultinte la raporton, mi opiniis tiun sperton bona kaj volis disvastigi ĝin post la reveno, kaj mi tute ne provis fari pli profundan esploron.



Vespere, vicestro de la armea proviza sekcio Ĝaŭ atentigis min per sia grava opinio, dirante: "La sperto de la oka roto estas bona, sed troviĝas problemo, ke la batalantoj estas tro okupataj kaj iuj eĉ ne havas tempon por memlerno post mobilizo de la amasoj. Ke ne troviĝas tempo por memlerni, tio certe influos la revoluciigon de la batalantoj." Mi demandis: "De kie vi informiĝis pri tio?" Li respondis: "Aŭskultinte la raporton, mi rondiris proksimajn produktajn grupojn kaj tion aŭdis de batalantoj." Tiu afero profunde skuis mian animon. Mi plie komprenis, ke la piedoj devas esti neniom maldiligentaj. La sekvintan tagon, imitante Ĝaŭ mi trairis kelkajn produktajn grupojn, persone interparolis kun batalantoj kaj komunumanoj kaj faris pli profundan esploron, tial mia kono pliriĉiĝis kaj la problemo estis pli klara. Dank' al nia helpo la kamaradoj de la oka roto altigis sian konon, kaj poste ili donis pli da atento al mobilizado de kaj sinapogo sur la amasoj, tiel ili ne nur bone gvidis la lernon de la amasoj sed ankaŭ garantiis al si tempon por memlerno. La sperto pliperfektiĝis kaj pliriĉiĝis.

Prezidanto Maŭ diris: **"Ĉiu, kiu respondecas pri gvida laboro, de prezidanto de subdistrikta registaro ĝis la prezidanto de la centra registaro de la tuta lando, de taĉmentestro ĝis la ĉefkomandanto, de filia sekretario ĝis la ĝenerala sekretario, nepre devas persone okupiĝi pri konkreta enketo de la socia ekonomio sed ne devas simple sinapogi sur skriba raporto, ĉar ili estas du malsamaj aferoj."** Tio estas nerefutebla vero. La esploro pri la sperto de la oka roto profunde komprenigis min, ke alies piedoj ne povas anstataŭi la miajn. Por koni ian staton, oni certe povas fari nerektan enketon pere de alies piedoj, sed pli gravas tio, ke oni devas fari rektan enketon per siaj propraj piedoj. En la pasinteco, sidante en la oficĉambro por aŭskulti raporton kaj legi materialojn, mi neglektis iron en la amasojn por rekte posedi unuamanajn materialojn. Iatempe mi iris malsupren, sed ne kun ĝusta sinteno. Ankaŭ tio estas manifestiĝo de aroganteco de "altrangulo". Nun, mi komprenis ke antaŭ ĉio, miaj piedoj devas esti diligentaj, se mi volas elkore esti servanto de la popolo; per alies piedoj oni neniam povas esti tia servanto.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Ĉiuj niaj kadroj, en kiaj ajn rangoj, estas servantoj de la popolo."** Se ni povas vivi en la amasoj kaj per niaj konkretaj agoj montras al batalantoj ke ni ne estas "ĉefoj", sed servantoj kiuj tutkore kaj tutanime servas al la popolo, nur tiam ni meritas la nomon de "ordinara soldato".

KURANTAJ AFEROJ

KEMIA FABRIKO POR PRODUKTI SINTEZAN AMONION FINKONSTRUITA EN ŜANDONG

En la bonega situacio, en kiu la granda proletara kultura revolucio jam akiris decidan venkon, la Ginan-a Kemisterka Fabriko estis finkonstruita kaj komencis sian produktadon lastatempe kun jara produkta kvanto de 45,000 tunoj da sinteza amonio.

Sinteza amonio okupas tre gravan lokon en la kemisterka industrio de nia lando, kaj el ĝi oni povas produkti amoniakan akvon, amonian bikarbonaton kaj kemisterkon malmulte kostan kaj tamen kun alta efiko. Dum la konstruado de la fabriko, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj agis laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"ŝpari ĉiun groŝon por la milito kaj la revolucia afero kaj por nia ekonomia konstruado"**, faris amase racigajn proponojn, ŝparis zorge ĉiujn bagatelojn kaj tiel ŝparis por la ŝtato nemalmulte da ŝtalo.

LA KINGHAJ-A FABRIKO DE HIDROELEKTRAJ EKIPAĴOJ KOMENCIS SIAN PRODUKTADON

La nomita fabriko, por kies konstruado oni eklaboris en la komenca periodo de la granda proletara kultura revolucio, nun jam komencis produkti hidroelektrajn ekipaĵojn por la kamparo.

La unua 12-kilovata poŝformata hidroelektra ekipaĵo produktita de tiu fabriko jam komencis bone funkcii en Hegiaĝuang-brigado de Kingŝan-komunumo en Datong-gubernio, kaj ebligis al la komunumanoj de tiu montvilaĝo uzi elektron en lumigado, draŝado, muelado, olepremado ktp. La komunumanoj ĝojkriis emociite: "Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu la granda proletara kultura revolucio!"

Tiu fabriko servas al la elektrizado de montvilaĝoj. Ĝi produktas ĉefe malgrandtipajn hidroelektrajn ekipaĵojn, taŭgajn por la vilaĝoj sur la altebenejo de Kinghaj, kie estas multaj riveroj kun granda flu-falo kaj riĉaj hidraŭlikaj riĉfontoj.

ĈAŬJANG:

Scienca Esplorado sur la "Monda Firsto"

EN la mondskua granda proletara kultura revolucio, la revoluciaj sciencaj laborantoj de nia lando entreprenis grandskalan, multfakan sciencan esploradon pri la regiono de Ĝolmo-lungma kaj akiris brilajn atingojn, sub forta subtenado kaj kunlaboro de la Popola Liberiga Armeo, revoluciaj laboristoj kaj tibetaj laborantaj popolanoj. La sukceso de tiu ĉi senprecedenca granda iniciato en la scienca historio de la homaro estas granda venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, granda venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj nova giganta frukto de la granda proletara kultura revolucio.

Ĝolmo-lungma, kiu kolose staras super la ceteraj montpintoj de Himalajo ĉe la sudokcidenta landlimo de nia lando, estas la plej alta montpinto en la mondo. Ĉar tiu regiono entenas abundegajn riĉfontojn kaj havas unikajn geografian situon kaj naturajn karakterizaĵojn, ĝi havas grandan influon al la vivo de la homaro kaj la naturaj cirkonstancoj. Kaj ĝi estas ankaŭ ŝlosila regiono por solvi multajn gravajn sciencajn problemojn. Tial, delonge ĝi jam altiras la atenton de homoj. En la lastaj pli ol cent jaroj, la imperiismaj landoj havas ambicion pri ĝi kaj sendis al ĝi unujn post aliaj "esploristojn" por "esplorado" kun la kaŝita intenco prirabi tiun regionon. Sed pro la unika alteco de Ĝolmo-lungma, la kaprica vetero kaj ekstreme danĝera topografio de tiu regiono, kaj precipe pro la putreco de la kapitalisma sistemo kaj la malbela animaĉo de la t. n. "esploristoj" de la imperiismaj landoj, iliaj ambicioj plejparte ne efektiviĝis. Iuj el ili prenis la dekmiljaran neĝejon kiel sian eternan kuŝejon kaj neniam revenis al sia lando; aliaj entreprenis ŝtelan agadon, akiris fragmentajn konojn, faris multajn ideismajn, metafizikajn erarajn asertojn kaj klopodis trompi la mondon per ili. Dum la longa pasinteco, Ĝolmo-lungma ĉiam restis vualita por la sciencistoj. Post la fondo de la Ĉina Popola Respubliko, niaj revoluciaj sciencaj laborantoj faris sciencan esploradon pri la montpinto sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. En 1960, ĉinaj junaj alpistoj unuafoje surgrimpis la pinton de Ĝolmo-lungma tra la norda deklivo kaj faris sciencan esploradon.


La senprecedenca granda proletara kultura revolucio plene detruis sklavismon, rampismon kaj likvidismon reviziismon linion de scienca esploro, freneze praktikatan de la manpleno da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kun la ĉina Ĥruŝĉov kiel la ĉefo kaj ĝiaj agentoj en la sciencaj kaj teknikaj rondoj, plene detruis la superregon de la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj kaj burĝaj reakciaj akademiaj "aŭtoritatuloj", kaj detrancis la nigran manon de la ĉina Ĥruŝĉov etenditan en la sciencan esploradon. Sub la brilo de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, sub la gvido de



La membroj de la Scienca Esplora Brigado sin okupas ne nur pri la peza tasko de scienca esplorado, sed ankaŭ pri propagando de la penso de Maŭ Zedong kaj aliaj amasaj laboroj, tiel ke ili plene unuiĝas kun la amaso kaj trovas koran bonvenon ĉe tibetaj fratoj. Jen ili kantas kune kun tibetaj fratoj Marnavigo Dependas de Stiristo *kaj deziras al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ senfine longan vivon.*

la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ke oni strecu plene la energion, strebu forte antaŭen, sin apogu sur la propraj fortoj, penu por prosperigo kaj efektivigu la altan celon atingi kaj superi la plej altan sciencan kaj teknikan nivelon de la mondo, la revoluciaj laboristoj de diversaj sciencaj fakoj faris kunan operacion sub la forta subtenado kaj helpado de la Popola Liberiga Armeo kaj laborantaj tibetanoj, kaj kun la revolucia heroeco kuraĝi batali kaj kuraĝi venki ili venkis ĉiajn malfacilojn kaj finfine konkeris la unuan plej altan montpinton en la mondo "netransflugeblan eĉ por la birdoj".

En la jaroj 1966 kaj 1967, kiam bolante progresis la granda proletara kultura revolucio de nia lando, sub la organizado de la Ĉina Akademio de Sciencoj, pli ol cent sciencaj laborantoj de ĉirkaŭ 30 fakoj el 23 sciencaj institucioj, altaj lernejoj kaj esploraj institucioj de industriaj entreprenoj kaj la Popola Liberiga Armeo formis grandan brigadon por sinteza scienca esplorado, kaj faris plenampleksan, sisteman sintezan esploradon en la regiono de Ĝolmo-lungma kun areo de pli ol 50,000 kvadrataj kilometroj, sude de la rivero Jalucampo, etendanta de Jadong en la oriento ĝis Gilong en la okcidento, kaj parte kun alteco de pli ol 7,000 metroj super la marnivelo. La enhavo de la esplorado koncernas la fakojn pri stratumoscienco, paleontologio, petrologio, struktura geologio, geologio kaj topografio de la kvara periodo, geofiziko, natura geografio, geokemio de hipergeneza procezo, agrogeologio, vegetaĵ-ekologio, regionaj vegetaĵoj, birdoj kaj bestoj, entomologio, akvaj vivestaĵoj, glacirivero, meteorologio, hidrologio, astronomia geodezio, grunda stereofotogrametria geodezio, altmonta fiziologio ktp. Dank' al tiu esplorado, oni akiris grandan serion da relative kompletaj gravaj sciencaj materialoj pri la transfor-



La sciencaj laborantoj starigis varmo-ekvilibran observejon sur Ĝolmo-lungma en loko je 6300 metroj super la marnivelo por esplori sunradiadon.

miĝo de la Himalaja Maro en la montaron Himalajo kaj la montgiganton Ĝolmo-lungma kaj pri ĝia influo al la naturo kaj la aktivado de la homaro. Tio pretigis fidindajn sciencajn donitaĵojn por la ekspluatado de la naturaj riĉfontoj kaj por socialisma konstruado de Tibeto en la estonto. Granda kvanto da nedisputebla materialo ne nur plene renversis la ideismajn, metafizikajn erarajn asertojn de la imperiistaj "esploristoj" pri tiu regiono, sed ankaŭ refoje kaj elokvente pruvis, ke granda nerefutebla vero estas la brila dialektikmateriisma penso elmetita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **"En la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo."**

La revoluciaj geologiaj laborantoj de nia lando, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, praktikis la instruon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **"Detruu la blindajn kredojn, liberigu la penson, kuraĝu pensi kaj fari kaj iru nian propran vojon."** En la meza parto de Himalajo interne de nia teritorio, ili unuafoje malkovris stratumon de la frua paleozoika erao formitan antaŭ ĉirkaŭ kvarcent miljon jaroj, trovis grandan kvanton da fosilioj de graptolitidoj, trilobitoj, naŭtiloj k. a., renversis la eraran aserton de fremduloj en la pasinteco, ke en tiu ĉi regiono eble ne ekzistas stratumo de la frua paleozoika erao, kaj pretigis sciencan materialon por koni la geologian historion de la regiono sude de Jalucampo, inter Gilong kaj Jadong. Kaj geologiaj laborantoj refoje trovis iĥtiosaŭrajn fosiliojn en stratumo de la triasa periodo formita antaŭ ĉ. cent okdek miljon jaroj. La supre diritaj malkovroj ĉiuj havas gravan signifon por plenampleksa studo pri la geologia historio de Himalajo kaj Ĝolmo-lungma, ĝenerala traserĉo de mineralaj riĉfontoj, produktado kaj konstruado. Dum la esplorado, la sciencaj laborantoj sin okupantaj pri esplorado de geologio kaj topografio de la kvara periodo ankaŭ faris grandan kvan-

ton da esploro pri la geologiaj karakterizaĵoj kaj pri la regulo de la terkrusta movado de la Ĝolmo-lungma-regiono dum la lastaj miljon jaroj, kaj ili trovis fosiliojn de rododendro, viburno, saliko, rozo, lonicero k. a. plantoj kaj fosiliojn de bobaco (*arctomys bobac*), cervo, leporo, rato k. a. animaloj kaj neolitajn ŝton-instrumentojn en multaj sedimentoj de la kvara periodo en la meza parto de Himalajo interne de nia teritorio, kun alteco de 4,300 ĝis 5,000 metroj super la marnivelo. Tiuj fruktoj el la esplorado ege valoras por koni la skalon de la leviĝo, la ŝanĝiĝon de la klimato kaj la homan aktivadon de Himalajo kaj Ĝolmo-lungma dum la lastaj miljon jaroj. La sciencaj laborantoj de natura geografio, geokemio de hipergeneza procezo, agrogeologio, botaniko, zoologio k. a. bone kunlaboris en sinteza esploro pri la komplika fenomeno de dividiĝo de naturaj zonoj kaj pristudis la dislokiĝan leĝon de la plej altaj agroj kaj paŝtejoj en Ĝolmo-lungma-regiono.

Forte subtenate de la Popola Liberiga Armeo kaj tibetaj laborantaj popolanoj kaj alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la membroj de la esplora brigado sin okupantaj pri geofiziko, altmonta radiado, termezurado kaj mapado, meteorologio, glacirivera scienco, altmonta fiziologio k. a. penlaboregis spite al laco, venkis kun neŝancelebla revolucia volo la malfacilojn, kiaj nesufiĉeco de oksigeno sur alta monto, neĝblovegoj kaj frosto, kaj triumfe plenumis la esploran taskon. La fruktoj akiritaj ĉifoje pri tergloba magnetismo kaj gravito multe superis la avangardan nivelon de la mondo kaj en kvanto kaj en kvalito. Per la esplorado, oni ne nur akiris relative kompletan konon pri la dislokiĝo kaj karakterizoj de tergloba magne-

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke "la amaso estas vera heroo", la sciencaj esplorantoj faris en intima ligiĝo kun la loka garnizono kaj tibetaj liberiĝintaj servutuloj kompleksan sciencan esploradon pri la montpinto Ĝolmo-lungma kaj la regiono de Himalajo kaj multe antaŭenpuŝis sian laboron. Jen tibetaj fratoj konigas al la sciencaj laborantoj la geologian staton de la loko.



tismo kaj gravito en la regiono de Ĝolmo-lungma, sed ankaŭ akiris materialon pri termagnetismo kaj gravito ĉe loko je 6,500 metroj super la marnivelo, kio estas rekorda alteco en la monda historio de mezurado pri tergloba magnetismo. Tiuj atingoj forte akcelis la disvolviĝon de la esplorado pri termagnetismo kaj gravito en nia lando. La sciencaj esplorantoj pri suna radiologio kun la heroa volo nepre starigi la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong sur la plej alta montpinto de la mondo, timis nek la longecon de la vojo kaj altecon de la monto, nek la malaltan temperaturon kaj nesufiĉon de oksigeno, venkis la malfacilon kaŭzitan de grandega konsumo de fizikaj fortoj, obstine batalis kontraŭ altmonta reakcio kaj akiris, en ekstreme malfacilaj cirkonstancoj, unuamanan valoregan materialon pri suna radiologio en la zono de 5,000 ĝis 7,000 metroj super la marnivelo. Tiu materialo multe superis tiun akiritan de usonaj imperiismaj elementoj en 1963, ĉe loko de malpli ol 6,000 metroj super la marnivelo, kiun ili ŝtele algrimpis tra la suda deklivo, kaj okupis pozicion por nia lando en esplorado pri altmonta sun-radiologio. La junaj geodeziaj laborantoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong kondukis ekstreme heroan batalon kontraŭ la naturo sur la plej alta monto en la mondo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon."** Ili timis nek neĝblovojn kaj froston nek la maldensecon de aero, marŝis kun mezuraj aparatoj pezantaj je dekoj da kilogramoj sur la dorso, faris astronomiajn, trigonometriajn, nivelan kaj grundan stereofotogrametrian mezuradojn, kaj kreis senprecedencan miraklon en la monda historio de geodezio.

Ankaŭ la esploristoj pri meteorologio, glaci-rivero, altmonta fiziologio agis laŭ la granda instruo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"La ĉina popolo havas fortan volon kaj grandan kapablon, kaj nepre atingos kaj superos la avangardan mondan nivelon en proksima estonteco"**, venkis ĉiajn malfacilojn, faris esploran marŝon tra la neĝ- kaj glaci-kovrataj deklivoj kaj akiris riĉan materialon koncerne al la supre menciitaj esploradoj pri la plej alta monto de la mondo.

En la unua grandskala esplorado de multaj sciencaj fakoj pri la regiono de Ĝolmo-lungma, la diversfakaj sciencaj laborantoj praktikis grandan komunisman kunlaboron, kaj ricevis fortan subtenon kaj helpon de la Popola



Jen okulgloba miksa roko formita el antaŭpaleozoika mara sendimento post metamorfismo, trovita sudokcidente de Ĝolmo-lungma.



Kun "Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong" ĉe l' korpo, oni sentas sin plenplena je noblegaj voloj. Agante laŭ la grandaj instruoj de Prezidanto Maŭ, sciencaj esplorantoj kuraĝas grimpi altajn montpintojn de neniu surgrimpitajn, batalas en la frostega montregiono spite al malfacilegoj por decideme fari novajn kontribuojn al la popolo en la granda proletara kultura revolucio.

Liberiga Armeo, revoluciaj laboristoj kaj laborantaj tibetanoj. La membroj de la esplora brigado kolektiĝis el diversaj lokoj de la lando por la sama revolucia celo, ĉiam, ĉie kaj je ĉiuj aferoj persistis ĉe kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, venkis unun post alia la malfacilojn sur sia antaŭenira vojo, kaj akiris unun post alia la venkojn, prenante la penson de Maŭ Zedong kiel sian armilon. Sur la bordo de Jalucampo, inter glaciaj pagodaroj de Ĝolmo-lungma kaj ĉe siaj kampejoj milojn da metroj super la marnivelo, ili okazigis kunvenojn por interŝanĝi sperton en kreiva studo kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ, batalis kontraŭ egoismo kaj kritikis reviziismon, kaj ĉerpis abundan saĝon kaj forton el la instruoj de Prezidanto Maŭ. Ili diris, ke oni certe povas venki ĉiajn malfacilojn kaj obstaklojn kaj akiri la finan venkon, se nur oni aŭskultas la instruojn de Prezidanto Maŭ. Oni certe povas surgrimpi la plej altan montpinton de scienco en la mondo, se nur oni agas laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ. Ni povis konduki tian grandskalan kaj laŭplanan sciencan esploradon plenan je revolucia spirito kaj impete antaŭenmarŝi en konado kaj reformado de la naturo nur pro tio, ke ni havas la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kiel lumturon, kaj ke ni havas la superecan socialisman socisistemon. La scienca afero de ĉiu ajn imperiisma kaj moderna-reviziisma lando ja estas nekomparebla kun la nia en tiu ĉi rilato. La revoluciaj sciencaj laborantoj de nia lando venke plenumis grandskalan sciencan esploradon sub ekstreme grandaj malfaciloj kaj en relative mallonga tempo, kaj elverkis triumfan kanton de la brila penso de Maŭ Zedong en la scienca historio de la homaro. La brilo de la penso de Maŭ Zedong ĉiam lumigos la antaŭeniran vojon de niaj revoluciaj sciencaj laborantoj, ke ili marŝu de venko al ankoraŭ pli granda venko kaj surgrimpu ĉiam pli altan sciencan montpinton!

La Deveno de Ĝolmo-lungma

HIMALAJO alte staranta ĉe la sudokcidenta landlimo de nia patrio estas la plej longa, plej alta kaj plej juna montaro sur la terglobo. Ĝi longas pli ol 2,400 kilometrojn kaj larĝas de la sudo ĝis la nordo pli ol 200 kilometrojn. Rigardate de sur aeroplano, ĝiaj interpremiĝantaj montpintoj similas al rigidiĝinta maro da ondegoj. Ĝolmo-lungma, la plej alta montpinto en la mondo, staras ĉe la limo inter nia lando kaj Nepalo kaj similas al giganta piramido, kiu leviĝas alte super la ceteraj neĝkovrataj pintoj de Himalajo.

Kiel formiĝis Himalajo kaj Ĝolmo-lungma?

La naturo ĉie restigis postsignojn de siaj travivaĵoj. Kiam oni eniras la montaron, oni povas vidi multe da tavolhavaj rokoj tiel sur la montpintoj kaj deklivoj kiel en la valoj, kaj en iuj el la rokoj troviĝas fosiliiĝintaj korpoj kaj signoj de animaloj kaj plantoj, kiuj vivis antaŭ centmilionoj da jaroj. Dum la lastatempa esplorado oni unuapaŝe konstatis, ke en nia lando la tavolo de metamorfaj sedimentaj rokoj formiĝintaj antaŭ kvincent miljon jaroj dikas pli ol dudek mil metrojn kaj la marfaza tavolo de sedimentaj rokoj formiĝinta antaŭ kvincent miljon ĝis dudek kvin miljon jaroj dikas pli ol dek tri mil metrojn. Kaj laŭ tiu "enciklopedio" pri la geologia historio, la sciencaj laborantoj malkaŝis la historion de Ĝolmo-lungma.

Ĝuste kiel nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"Laŭ la vidpunkto de materiisma dialektiko, la ŝanĝoj de la naturo ĉefe devenas de la disvolviĝo de la kontraŭdiroj interne de la naturo."** La montego Ĝolmo-lungma naskiĝis ĝuste de la movado de la unuiĝo de kontraŭoj de la ter-krusta materio en la regiono de Himalajo. Same kiel iu ajn alia afero, ankaŭ Himalajo havas sian procezon de estiĝo, disvolviĝo kaj nepra pereo en estonteco. Kvankam tiu procezo **"montranta siajn ŝanĝiĝojn per dekmiloj da jaroj kiel tempo-unuo"** estas ne facile klare perceptebla, ĝi tamen ja senĉese iras.

Post eksterdoma esplorado pri la geologiaj tavoloj kaj ilia strukturo, kaj post ekspertizado kaj analizado pri multaj specimenoj de ŝtonoj kaj fosilioj en laboratorio, sciencaj esplorantoj konstatis, ke en tre fora antikveco antaŭ ĉirkaŭ sescent miljon jaroj, t. e. en kriptozoika erao de la geologia historio, la regiono de la nuna Himalajo estis senĉese ŝanĝiĝanta mar-kavego, kiu grandiĝis tagon post tago kaj poste interligiĝis kun la antikva Mediteraneo, kiu formis parton de la Himalaja Maro. Dum la periodo antaŭ sescent miljon ĝis dudek kvin miljon jaroj, tra la longa tempo de la paleozoika erao, mesozoika erao, kaj la paleocena, eocena kaj oligocena epokoj de la tria periodo de la cenozoika erao, tiu ĉi baseno de antikva maro trapasis multajn komplikajn ŝanĝojn sub la influo de la leviĝ-malleviĝa movado de la terkrusto. Sekve de senĉesa malleviĝo de la baseno, ĝi akceptis la ŝlimon, sablon, ŝtonojn delavitajn de la landoj en la suda kaj norda flankoj (la Angola Lando en la nordo kaj la Gondvana Lando en la sudo) kaj la materion multfoje elŝpruciĝintan el la interno de la terkrusto tra la submaraj vulkanoj, kaj la surfundiĝintaj sablo, argilo, kalciaĵoj kaj vulkan-ŝlimo formis iom-post-iome dikan sedimentan roktavolon.

La tempo antaŭenpuŝiĝis, kaj antaŭ ĉirkaŭ tridek miljon jaroj la regiono de la Himalaja Maro trapasis la plej maltrankvilan periodon en sia historio. Unue la marakvo foriris sudokcidenten kaj sudorienten, tiel la antaŭa marfundo ŝanĝiĝis en teron kaj tiu antikva maro finis sian historion, kio unuigis la eŭropan kaj azian kontinentojn ĉe la suda kaj norda flankoj de la maro. Forta montfara movado ĉifis, rompis, ĝibigis aŭ kavigis la dikegan sedimentan tavolon ĉe iuj lokoj, kaj eksterordinare abundaj mineralaj riĉfontoj formiĝis pro invado de magmo kaj regiona metamorfozo. Tiun movadon la geologiaj laborantoj nomas la "himalaja movado". Depost tio, la plej juna montaro en la mondo Himalajo leviĝis iom post iom.

Kvankam Himalajo jam naskiĝis, tamen tiam ankoraŭ ne finiĝis la movado de la terkrusto. En la valoj de la regiono de Ĝolmo-lungma, ĝenerale disvolviĝis "valoj en valoj", nove rompiĝis la sedimento de la kvara periodo, novaj varmfontoj anstataŭis la malnovajn kaj tertremoj okazis — ĉiuj tiuj fenomenoj montris, ke la terkrusto leviĝis senĉese kaj tre aktivis la movado por novaj terkrustaj strukturoj. Laŭ la fosilioj de *Quercus semicarpifolia* kaj *Quercus pannosa* trovitaj de sciencaj esplorantoj en sabloŝtonoj el la fina parto de la tria periodo, oni konstatis, ke iuj partoj de Himalajo leviĝis je ĉirkaŭ trimil metroj dum la lastaj miljon jaroj. Dum la lasta esplorado, oni trovis fosiliojn de ramnacoj, loganiacoj, rododendroj kaj aliaj plantoj en travertino de la holocena epoko de la kvara periodo. Oni konstatis laŭ tio, ke iuj partoj de Himalajo grandmezure leviĝis en la lasta periodo. Kaj Ĝolmo-lungma estas formita de forte kaj longtempe aktiva, rompita kaj leviĝanta roktavolo de Himalajo.

La leviĝo de Himalajo havis grandegan influon al la naturo kaj la aktivado de la homaro. Plenampleksa esplorado por malkaŝi ĝiajn misterojn ja havas gravegan signifon por la kultura disvolviĝo de la homaro.



La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko, kiuj senlime amas Prezidanton Maŭ, legas lian verkon.


La Penso de Maŭ Zedong Lumigas la Pekinan Ĝeneralan Trikotan Fabrikon



La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj amase skribas dazibaŭojn por malkovri la krimojn de la Ĥruŝĉov de Ĉinio.



La kadroj laboras kune kun la laboristino kaj lernas de ŝi.



En vigla revolucia entuziasmo, la produktado senĉese progresas. Iuj laborejoj kaj laborgrupoj kreis novan produktan rekordon de la fabriko.



Kamarado el kurac-grupo de PLA donas medicinan helpon al la malsanuloj inter la oficistoj, laboristoj kaj iliaj familianoj.



La oficistoj kaj laboristoj kantas revoluciajn kantojn dum laborpaŭzo.

Venkoj de Revolucio kaj Produktado en la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo de Kingdaŭ

EN la senprecedenca granda proletara kultura revolucio, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la proletaraj revoluciuloj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo de Kingdaŭ deprenis la regpotencon de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj en la fabriko irantaj la kapitalisman vojon, kaj post tio sub la helpo de la PLA-anoj kreive studante kaj kreive aplikante verkojn de Prezidanto Maŭ ili akiris venkojn de revolucio kaj produkto.

LA PLA-ANOJ HELPAS LA REVOLUCIULOJN KREIVE STUDI KAJ KREIVE APLIKI VERKOJN DE PREZIDANTO MAŬ

En la ŝtormo de "Januara Revolucio" de la pasinta jaro la proletaraj revoluciuloj de tiu ĉi fabriko deprenis la regpotencon. Sed intrigante, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon fabrikis splitiĝon inter la revoluciaj ribeluloj. Samtempe interne de la revoluciaj ribeluloj ekzistis burĝara kaj etburĝara frakciismo, tial post veno al regpotenco la potenctenantaj revoluciuloj alfrontis novan rigoran provon unuigi la revoluciajn oficistojn kaj laboristojn de la tuta fabriko por kune batali kontraŭ la malamiko kaj pli bone teni la revolucion kaj stimuli la produkton.

Ĝuste en tiu tempo venis en la fabrikon la maldekstrulojn subtenantaj personoj de iu trupo de PLA garnizonanta Kingdaŭ. Gravurante en la koro la instrukcion de vicĉefkomandanto Lin Biaŭ "en subtenado al la maldekstruloj kaj al la lokaj laboroj estas necese antaŭ ĉio doni subtenon en ideologio", ili plenforte helpis la proletarajn revoluciulojn de la ŝpinteksejo kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ en la batalado, armi la cerbon per la penso de Maŭ Zedong kaj firme starigi la penson teni la potencon por la proletaro.

Kiam la PLA-anoj subtenantaj maldekstrulojn eniris la fabrikon, la du grandaj revoluciaj amasaj organizoj en ĝi ankoraŭ ne efektivigis grandan revolucian unuiĝon. Post profunda enketo kaj esplorado ili venis al konkludo, ke ambaŭ grandaj amasaj organizoj ĉiuj estas revoluciaj. La PLA-anoj unue helpis la respondeculojn de la fabrika revolucia komitato kaj ĝiaj filioj en la laborejoj funkciigi "kurson de la penso de Maŭ Zedong", organizis la revoluciulojn studi la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* k. a. Prezidanto Maŭ diris: **"La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra trium-**



Laboristinoj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo de Kingdaŭ legas verkon de Prezidanto Maŭ antaŭ ol ili komencas laboron.

fo de nia afero." Kaj li diris krome: **"La kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj estas antagonismaj kontraŭdiroj. Inter la laborantaj popolanoj la kontraŭdiroj interne de la popolo estas neantagonismaj."** Sekvante tiujn ĉi instrukciojn de Prezidanto Maŭ ili plie komprenis, ke la kontraŭdiroj inter la proletaraj revoluciuloj ĉe unu flanko kaj la ĉina Ĥruŝĉov kaj plenmano da enpartiaj potenctenantoj de la fabriko irantaj la kapitalisman vojon ĉe la alia estas kontraŭdiroj inter ni kaj la malamiko, dum la malakordoj en opinioj inter la frataj organizoj kaj inter la klasaj fratoj estas kontraŭdiroj interne de la popolo. Dank' al la studado ili distingis la pravon de malpravo en principaj problemoj kaj pravon de malpravo en bagateloj. Kaj tiel, ili unuflanke forte kritikis la burĝaran reakcian linion praktikitan de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj ĝiajn krimagojn inciti amasojn oponi kontraŭ amasoj, kaj aliflanke kritikis burĝaran kaj etburĝaran frakciismon kaj diversajn egoismajn pensojn en sia kapo kaj faris memkritikon antaŭ la tuta fabriko. Dank' al ilia modela agado, en la tuta fabriko oni amase organiziĝis por studi *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo*, per kio ili ĝenerale altigis sian ideologian konscion, eliminis la kontraŭstaron, kaj fine en la komenco de julio efektiviĝis la granda unuiĝo de la proletaraj revoluciuloj de la tuta fabriko.

En 1967, sub la helpo de PLA-anoj subtenantaj la maldekstrulojn, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo sinsekve starigis kvin "kursojn de la penso de Maŭ Zedong", kaj celante la ĉefajn problemojn estantajn en malsamaj periodoj de la fabriko ili kreive studis kaj kreive aplikis verkojn de Prezidanto Maŭ; ili ankaŭ fondis dekkelkajn postlaborajn "kursojn de la penso de Maŭ Zedong", kaj tio multe stimulis la memkonscion de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la tuta fabriko pri kreiva studo kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ. La "kursoj" fariĝis batalejoj de batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj diris: La kurso ja estas bona, kaj ju

pli vi studas verkojn de Prezidanto Maŭ, des pli heliĝas en via koro. En la prepar-laborejo estis laboristo nomata Vu Kingŝeng, kiu kune kun kelkaj batalamikoj prenis sur sin respondecon gvidi la revolucion kaj produkton de sia laborejo post kiam la revoluciuloj deprenis la regpotencon. Pro tio, ke li ne bone mastris verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj mankis al li en la cerbo politikoj de la Partio, li ne kapablis bone fari la gvidan laboron, iuokaze li agis laŭ sia sentimento kaj emis instrui aliajn severe, tiel ke pli kaj pli malboniĝis la rilato inter li kaj la amasoj. En la kurso li ripetade studis la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri **"senrezerva kaj kompleta"** servado al la popolo, ŝanĝis la laborstilon, kaj tiel li gajnis al si konfidon de la laboristoj kaj estis honorita kiel aktivulo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la fabriko.


Sub la rekta helpo de PLA-anoj, resuminte la sperton "ĉiutage legi" verkojn de Prezidanto Maŭ kaj studi liajn plej altajn instrukciojn antaŭ kaj post labordeĵoro post depreno de regpotenco, pli kreive studante kaj aplikante verkojn de Prezidanto Maŭ kun la problemoj en la klasa batalo kaj porprodukta batalo kaj rikoltante tujan rezulton, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo puŝis la amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ de sia fabriko al la nova etapo.

GAJNI HONORON POR PREZIDANTO MAŬ

"Teni la revolucion kaj stimuli la produkton. Ŝanĝi la penson de Maŭ Zedong en potencan materian forton!" estas bravaj vortoj de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo.

La Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo estis maljuna fabriko funkciigita de iu kapitalisto por tridek jaroj antaŭ la Liberiĝo. En ĝi kadukaj estas la konstruaĵoj kaj malnovaj la maŝinoj. Antaŭ la granda kultura revolucio, sub la kontrolado de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon la produkto ĉiam estis postrestanta. Tamen

La PLA-reprezentanto en la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo kaj gelaboristoj de la fabriko kune skribas dazibaŭojn por kritiki la damnindajn krimojn de la ĉina Ĥruŝĉov.



post kiam la proletaraj revoluciuloj ektenis la regpotencon en la komenco de 1967, oni ĉiumonate superplenumis la produktan planon sen pliiĝo de maŝinoj kaj laboristoj. En 1967 ili plene kaj antaŭdate superplenumis la ŝtatan planon de la tuta jaro.

La antaŭenmarŝa vojo de la proletaraj revoluciuloj de la ŝpinteksejo ne estis glata. En la unua monato post ilia ekteno de regpotenco la klasa malamiko kaŝe fabrikis klaĉon: "Estas dubinde, ke tiuj homoj kiel vi povas bone mastrumi la produktadon!" La revoluciaj ribeluloj komprenis en si, ke ankaŭ la administrado de produkto alfrontas seriozan klasan batalon. Kun tiu ĉi problemo ili studis la *Decidon de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proletara Kultura Revolucio* ellaboritan sub la persona prezido de Prezidanto Maŭ. Tiu dokumento montris: "La granda proletara kultura revolucio estas potenca movforto por disvolvi la sociajn produktajn fortojn en nia lando. La vidpunkto de kontraŭstarigo de la granda kultura revolucio kontraŭ la disvolvo de produkto estas erara." Ili tuj okazigis kunvenon de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj en kiu oni indigne malkaŝis la intrigon de la klasa malamiko pri subfosado de produkto. Antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ ili solene ĵuris: "Nun ni jam fariĝis la mastroj de la fabriko, estas Prezidanto Maŭ kiu donas al ni subtenon, kaj ni nepre gajnos honoron por Prezidanto Maŭ!"

Tiamaniere disvolviĝis en la fabriko la kampanjo de kompleta kritiko kontraŭ la burĝara reakcia linio kaj de entuziasma produktado. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la prestinktura laborejo pioniris kiel modelo por la tuta fabriko en tiu ĉi kampanjo. Maljuna laboristo Cuj Jonghiang estis kondamnita de la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kiel "kontraŭrevoluciulo" en la unua periodo de la movado. Li diris kun emocio en kritika kunveno: "La burĝara reakcia linio direktis la lancpinton al la revoluciuloj. Estas Prezidanto Maŭ kiu nin savis. Nun la malamiko ankoraŭ intencas subfosi la revolucion kaj produkton por skui nian regpotencon, tio estas neniel permesita! Ni nepre firme tenu la regpotencon kaj estu modelo en tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto." La revolucia amasa kritiko fariĝis movforto por antaŭenpuŝi la produkton. Ĉiufoje post la fino de kritika kunveno la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de tiu laborejo kun arda entuziasmo revenis al sia laborposteno, kaj tiamaniere garantiis la plenumon de la produkta tasko. Ankaŭ en ceteraj laborejoj la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj amase konkursis en firmdecido kaj batalvolo kaj faris revolucian interhelpon. Kiam en ŝpin-laborejo tro amasiĝis ŝpinaĵoj, la laboristoj de la kardo-laborejo tuj iris tien malgraŭ ke ili jam finis sian labordeĵoron; kiam ne sufiĉis teksmaŝinistoj, la kamaradoj riparistoj tuj elpaŝis kun helpo.

Plenaj de malamo al la ĉina Ĥruŝĉov kaj plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la tuta fabriko firme unuiĝis, pene luktis kelkajn tagnoktojn kaj fine superplenumis la produktan taskon de januaro de 1967, frakasinte la intrigon de la klasa malamiko pri subfosado de produkto.

En la pasinta jaro, nia lando akiris riĉan rikolton de kotono. Tio provizis solidan materian bazon por granda pliprodukto de ŝpinteksa industrio. Tamen, somere la klimato en Kingdaŭ estis eksterordinara, la alta temperaturo estis longdaŭra, neniam troviĝis tia varma vetero en la lastaj kelkdek jaroj. Tio malhelpis la plenumon de la produkta plano de la tria sezono. Por mobilizi la amasojn la revolucia komitato ĝustatempe okazigis la "ĵurkunvenon por teni revolucion kaj stimuli produkton" kaj konigis al la amasoj la ĉiumonatan produktan planon. Krome ili kuraĝigis ĉiujn klopodi por plenumi taskon kaj persisti ĉe stimulado de produkto per revolucio. La PLA-anoj subtenantaj la maldekstrulojn tre atentis ankaŭ pri konduko de klasa edukado al laboristoj kaj oficistoj per rememorigo pri la amara pasinteco kaj pensigo pri la nuna feliĉo. Antaŭ la Liberiĝo multaj maljunaj laboristoj de tiu ĉi fabriko suferis kruelan subpremadon kaj ekspluaton de la kapitalistoj de la Huahin-a Ŝpinteksa kaj Prestinktura Fabriko (nun la Naŭa Ŝpinteksejo). Tiam, somere laborante en laborejo kvazaŭ en vaporumujo, ili ofte svenis pro varmfrapo, kaj krome, ili suferis ankaŭ vipbatojn, dum neniu sin ĝenis pro ilia morto. Tiamaniere dum malpli ol du jaroj mortis pli ol 300 infanlaboristoj pro turmentado. Per tiaj historioj plenaj je sango kaj larmoj la maljunaj laboristoj senkompate kritikis la absurdaĵojn distrumpetitajn de la ĉina Ĥruŝĉov kiaj "laboristoj bonvenigas ekspluaton", "ekspluato estas merito", kaj kondamnis lian krimon pri restaŭro de kapitalismo. Tiuj ĉi vivaj faktoj pluapaŝe edukis la vastajn revoluciajn laboristojn kaj oficistojn. Ili diris: "Ni neniam forgesos la klasan amaron, ĉiam memoras la bonfaron de Prezidanto Maŭ, aŭskultos liajn vortojn, bone



Superplenumintaj jam la produktan taskon de 1967, la laboristinoj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo decidas akiri pli grandajn sukcesojn en 1968.

tenos produktadon kaj rebatos la malamikon per efektiva agado." Post ĉiu plenda kaj kritika kunveno la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj ĉiam energiplene sin ĵetis en la produktadon kun la vekita klasa sento, rigardante la laborejojn kiel batalejojn. Iutage, sub la stato de plej arda vetero kaj malalta laborpartoprena procento, disvolvante la sentiman revolucian spiriton de la laborista klaso, kamarado Hin Hongzaŭ, maljuna laboristo de la kardo-laborejo faris laboron de du personoj, kaj tiel garantiis la produktadon en ordo. Timante nek malfacilojn, nek lacon, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj firme tenas sian laborpostenon kaj persistas en produktado. Ili esprimis: "Varma estas la vetero, sed ne tiom kiom nia ruĝa koro fidela al Prezidanto Maŭ; granda estas la malfacilo, sed ne tiom kiom nia decido konduki la revolucion ĝis la fino." Kun la giganta forto naskita en la revolucia amasa kritikado la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko kiel la mastroj venkis la malfacilojn de altaj temperaturo kaj humideco en la produktado kaj superplenumis la ŝtatan planon de la tria sezono.

Prezidanto Maŭ diris: **"Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi decidas faligi ĉiujn malamikojn kaj neniam esti subigita de malamikoj."** Ĝuste per tiu ĉi heroa spirito la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo ŝanĝis la postiĝintecan fizionomion de sia fabriko en la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj.

LA AMASO ESTAS VERA HEROO

Prezidanto Maŭ diris: **"La revolucia milito estas milito de la amasoj; ĝi povas esti farata nur per mobilizo de la amasoj kaj dank' al ilia apogo."** Ankaŭ socialisma entrepreno povas esti bone funkciigita nur per mobilizo de la amasoj kaj dank' al ilia forto kaj saĝo, persistado ĉe sinapogo sur la propraj fortoj kaj diligenta kaj ŝparema establado de entrepreno. La plenmano da enpartiaj potenctenantoj de la ŝpinteksejo irantaj la kapitalisman vojon tamen ĉiam oponis kontraŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj praktikis burĝaran kaj reviziisman linion en funkciigado de la fabriko. Anstataŭ fari amasan movadon ili

lasis la "specialistojn direkti la fabrikon"; anstataŭ elstarigi la proletaran politikon ili prenis "materian stimulon" kaj "profiton en komando". Ili asignis specialistojn por kontroli maŝinojn kaj monopoligi teknikojn. En la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo sub ilia regado la laboristoj estis malpermesitaj ekzameni la teknologian recepton de la tinkturejaj produktaĵoj; kiam laboristo bezonis drili malgrandan truon en la ŝpin-maŝino, tiu eĉ devis peti permeson de la ĉefinĝeniero. Ili ellaboris diversajn regulojn por kateni la laboristojn kaj sufoki la saĝon de la amasoj. Kvankam ili alprenis premian stimulon, tamen ili neniel povis solvi eĉ unu el la malnovaj grandaj kaj malfacilaj problemoj de la ŝpinteksejo.

La senprecedenca granda proletara kultura revolucio liberigis la produktajn fortojn. La revoluciaj ribeluloj armitaj per la penso de Maŭ Zedong ĝisfunde kritikis la kapitalisman manieron en administrado de entrepreno kaj reviziisman linion de fabrikfunkciado praktikitajn de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj iris sian propran vojon laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Ili rekte tenis en siaj manoj la povon super la produkta laboro. Havante superstiĉon nek pri "specialisto", nek pri libroj, ili kuraĝe pensas kaj kuraĝe agas. Nun pli freŝaj kaj pli belaj estas la kolordesegnaj ŝtofoj presitaj de la laboristoj kaj oficistoj de la tinkturejo per recepto de ili mem. Dank' al kolektiva penado la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la ŝpina laborejo renovigis la aŭtomatan balonan kontrolringon de ŝpinmaŝino en malpli ol unu monato, tiel ke la pohora produktkvanto de mil spindeloj kreskis grandmezure. Ĝuste per tiu ĉi revolucia ribela spirito kuraĝe pensi kaj kuraĝe agi la proletaraj revoluciaj ribeluloj de la fabriko efektivigis pli ol 70 gravajn teknikajn renovigojn en unu jaro post kiam ili tenis la regpotencon.

En la kotonpuriga laborejo oni povas vidi unu tute novan aŭtomatan kotonpurigan maŝinon en funkcio. Kiam laboristo metas pakon post pako da kotono antaŭ pakaĵ-prenilo, la kotono estas tuj aŭtomate transsendita en miks-maŝinon, kaj fine ĝi eliras en sinsekvaj volvaĵoj. La kapablo de tiu ĉi maŝino en forigo de almiksaĵoj estas pli alta ol tiu de la importita maŝino antaŭe uzita en la fabriko. Ĝi miksas kotonon simetrie, malfortigas la laborintensecon de laboristoj kaj ege altigas la laboran produktivecon. Ĝi estas projektita kaj fabrikita de laboristoj mem en la granda kultura revolucio. Por fari la maŝinon la laboristoj, teknikistoj kaj revoluciaj kadroj de tiu laborejo organizis renovigan grupon kaj faris streĉan laboron. Kiam ili renkontis malfacilojn dum instalado pro manko de sperto kaj bluaj kopioj, ili mobilizis la amasojn por kune solvi la problemon. Dank' al disvolvo de kolektiva forto tiu ĉi kotonpuriga maŝino estis fabrikita nur en kvar monatoj.

La proletaraj revoluciuloj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo rikoltis sukceson ankaŭ en kuraĝa renovigo de teksmaŝino, tinktura ekipaĵo kaj teknologio.

Antaŭe nigra ŝtofo produktita de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo estis tinkturita per intermita rultinkturilo. Kune laborante unu tagon, kvar tiaj maŝinoj povis tinkturi nur iom pli ol 2,000 metrojn da ŝtofo. Unu prestinktura procezo bezonis unu horon. Tia tinkturado malŝparis materialon kaj laborforton, kaj krome la efiko estis ne tiel bona. Post kiam la revoluciaj ribeluloj fariĝis mastroj, por altigi la kvanton kaj plibonigi la kvaliton de produktaĵoj ili kuraĝe proponis renovigi intermitan rultinkturilon en kontinuan tinkturilon. Tamen mankis teknika direktado kaj materialo pri tiu nova ekipaĵo kaj teknologio. La personoj partoprenantaj en renovigo organiziĝis por studi la verkojn de Prezidanto Maŭ *De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo?* k. a. Prezidanto Maŭ diris: **"La korektaj ideoj de la homo nur povas veni de socia praktiko, de la produkta batalo, klasbatalo kaj scienca eksperimentado — la tri tipoj de praktiko en la socio."** Li diris krome: **"Kio vere gravas en la mondo estas la vorto 'seriozeco', kaj la Komunista Partio plej bone taksas seriozecon."** Sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ ili ripetade faris provojn, spite al malsukcesoj. Ili ne perdis memfidon, sed serioze resumis sperton kaj instruon en ĉiu provado. Tra ripetada provado ili fine renovigis tiun ĉi tinkturilon kaj bone utiligis la kapablecon de la nova ekipaĵo. Nun unu tiaspeca maŝino povas tinkturi potage pli ol 10,000 metrojn da ŝtofo, kaj ĉiu tinktura procezo bezonas nur kvin minutojn, kaj bona estas la efiko, kaj krome ĝi ŝparas helpan materialon kompare kun la malnovaj prestinkturaj maŝinoj, la labora produktiveco altiĝis ĉirkaŭ trioble, la laboristoj nomas ĝin "multe, rapide, bone kaj ŝpare laboranta kontinua tinkturilo".

La proletaraj revoluciuloj de la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo de Kingdaŭ nun triumfe antaŭenmarŝas en la nova jaro laŭ la ĝusta direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

ĈAŬ JANG:

Ja Bonaj Estas la Specialistoj Alsenditaj de Prezidanto Maŭ

LA granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"La popolo, kiu jam akiris la venkon de sia revolucio, devas doni helpon al la bataloj de tiuj popoloj klopodantaj por akiri sian liberiĝon. Tio estas nia internaciisma devo."**

Sekvante lian instruon, la specialistoj kaj laborantoj de Ĉinio, kiuj helpas la popolojn de aziaj kaj afrikaj landoj en ilia konstruado kaj prenas la grandan internaciisman batalanton Bethune kiel sian ekzemplon, rigardas la konstruan aferon de diverslandaj popoloj kiel la sian kaj la tieajn laborantajn popolojn kiel siajn klasajn fratojn, tial ili ricevis varman amon kaj bonvenigon de tiuj popoloj. Multaj aziaj kaj afrikaj amikoj diris ke ja bonaj estas la specialistoj senditaj de Prezidanto Maŭ, kiuj tutkore kaj tutanime servas al la popoloj kaj eĉ ne domaĝas sian vivon, por helpi la aziajn kaj afrikajn popolojn en ilia konstruado. Ili ja meritas esti nomataj internaciismaj batalantoj de la proletaro kaj elstaraj gefiloj de la ĉina popolo.

La tuta familio de la zanzibara kamparano, kiun resanigis ĉinaj kuracistoj, vizitas la lastajn kun portreto de Prezidanto Maŭ por esprimi sian dankon kaj amon al li.



INTERNACIISMA BATALANTO ĜANG MINCAJ

Komisiite de la patria popolo, ĉina hidrologia inĝeniero kamarado Ĝang Mincaj tri fojojn iris eksterlanden por helpi al konstruado de aziaj kaj afrikaj landoj. En aŭgusto de 1966, li venis al Tanzanio kune kun aliaj ĉinaj akvoutiligaj specialistoj.

Por helpi la popolon de tiu lando bone koni la kaŭzon de gravaj diluvoj kaj sekegeco de la baseno de la rivero Ruvu en la lastaj cent jaroj, kamarado Ĝang Mincaj kaj aliaj ĉinaj specialistoj efektive estis ekstreme respondecemaj en siaj laboroj.

Iufoje, spite al varmego, Ĝang Mincaj kaj aliaj kamaradoj venis al la koncernaj lokoj por fari enketojn. Ĉiutage ili piediradis sur senhoma stepo, ofte sen manĝo kaj trinko. En la unua tago vezikoj aperis sur la piedoj de kamarado Ĝang Mincaj, la gvidantoj konsilis al li ioman ripozon, sed li rifuzis kaj ĉiutage persistis iri por la enketo ĝis plenumiĝo de la tasko.

Alifoje Ĝang iris al kampa laboro. Kiam li revenis, la nokta kurteno falis kune kun torenta pluvego sur senliman dezerton. Malgraŭ tio, li firme paŝis en ŝtormo. Nur post la noktmezo la kamaradoj trovis kaj revenigis lin al la loĝejo. Kvankam la malsekigitaj vestoj malvarmigis lian korpon, tamen varmega estis lia koro por servi al la tanzania popolo.


Antaŭtagmeze de la 4-a de oktobro 1967, por posedi la unuamanan materialon en projektado pri Kidunda-akvokonservejo, kamarado Ĝang Mincaj kaj aliaj ĉinaj specialistoj mezuris la profilon de rivervalo en densa herbaro pli ol metron alta ĉe la malsupera Ruvu-rivero. Subite, svarme alsturmis venenvespoj, tiel furioze ke oni ne sukcesis ilin eviti. La ĉeestantaj ĉinaj specialistoj ĉiuj estis pikitaj. Kiam kamaradoj alrapidis por urĝosavado, tiuj trovis ke kamarado Ĝang Mincaj svenis en la densa herbaro pro grave venena pikado.

En malsanulĉambro de Muhimbili-hospitalo en Dar-es-Salaam kuracistoj komencis urĝan savon. La kuracistoj kaj medicinaj laborantoj de Ĉinio kaj Tanzanio en intima kunlaboro daŭrigis la urĝan kuracadon dum kvar sinsekvaj tagnoktoj, ne zorgante pri sia manĝo kaj dormo. Sed la kuracado ne efikis pro troa veneniĝo, kaj kamarado Ĝang Mincaj mortis je la 8-a de oktobro de 1967.

Antaŭ la morto kamarado Ĝang Mincaj senlace kaj sindoneme servis al la tanzania popolo. Ĝuste en la 4-a de oktobro, apenaŭ li rekonsciiĝis el svenado, antaŭ ĉio li demandis: "Kiel fartas la



Kun profunda batalamikeco ĉina specialisto en Albanio interparolas kun albanaj kamaradoj.



La ĉina specialisto klarigas al gvineaj laboristoj kiel manipuli la maŝinon.

aliaj kamaradoj, ĉu ili estas savitaj el danĝero?" Kiam li reakiris konscion, li denove rakontis al la kamaradoj de sia grupo siajn proponojn pri la sekvonta laboro. Tiaj fervolo kaj sindonema spirito profunde kortuŝis la ĉirkaŭajn kamaradojn.

Post la forpaso de kamarado Ĝang Mincaj, la tanzania popolo kun senkompara doloro enterigis lin en la Ilala-tombejo de la regiono de afrikanoj en Dar-es-Salaam, rigardante la internaciisman spiriton de kamarado Ĝang Mincaj kiel simbolon de la amikeco inter la ĉina kaj tanzania popoloj. Informiĝinte pri lia forpaso, Moses, la tanzania reprezentanto de Kidunda-akvokonservejo senprokraste alrapidis de la konstruejo pli ol 200 kilometrojn fora por ĉeesti la funebran ceremonion. Li diris kun kordoloro: "Kamarado Ĝang Mincaj oferis sian vivon en helpado al konstruado de nia lando. Lia morto estas perdo ne nur por la ĉina popolo, sed ankaŭ por ni, la tanzania popolo. Ni poreterne gravuros lin en nia koro."

LA FLORO DE AMIKECO INTER LA ĈINA KAJ SOMALIA POPOLOJ

Antaŭ unu jaro, kun la historia misio donita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ servi al la tutmondaj popoloj kaj por helpi Somalion disvolvi sian nacian kulturon, pli ol 80 ĉinaj teknikistoj pri konstruado venis al tiu ĉi lando — kabo de Afriko kaj helpis al ĝia popolo konstrui ŝtatan teatron.

Dum la konstruado la ĉinaj teknikistoj decideme fiaskigis la subfosadon de la koloniistoj kaj konkeris multajn malfacilojn.

Tuj antaŭ la komenciĝo de la konstruo, la koloniistoj, kiuj regis la somalian popolon dum pli ol 80 jaroj, solflanke disŝiris la atingitan interkonsenton provizi al la teatra konstruo 100 kilovatojn da elektroenergio, pretekstante mankon de elektropovo, kaj promesis nur 20 kilovatojn. Kion povis funkciigi 20 kilovatoj? Unu turoargano alta je 35 metroj ja bezonas 40.5 kilovatojn da elektroenergio!

Anstataŭ esti timigitaj de la koloniistoj, la ĉinaj teknikistoj senhezite faris preparon por la konstruo, spite al la malfaciloj. Ili firme decidis ne uzi eĉ unu vathoron da elektroenergio de la koloniistoj, sed utiligis la generatoron alportitan el sia patrolando, kaj tiel ili garantiis akuratan iradon de la konstruo.

Por strebi al pli frua finkonstruiĝo, ili rompis rutinon de specialistoj de aliaj landoj laborantaj en Somalio kaj persiste daŭrigis laboron en nokto dum tiuj kelkaj monatoj de intensa konstruado, spite sian tagan laboron de 10 horoj. Tiamaniere, ili jam sukcese plenumis la taskon por instalo de domframoj en 20 tagoj.

Profunda klasa amikeco inter la ĉinaj teknikistoj kaj somaliaj laboristoj kristaliĝis en la unujara kuna laborado. Iun tagon, priparolante siajn impresojn pri ĉinaj specialistoj, iu somalia laboristo sur la konstruejo diris: "Ja bonaj estas la specialistoj alsenditaj de Prezidanto Maŭ. Mi neniam vidis specialistojn de iu alia lando, kiuj persone batpremas kaj ŝultroportas teron, krom la ĉinaj specialistoj." La ĉinaj teknikistoj ne nur varme helpis la somaliajn laboristojn en tekniko, sed ankaŭ verŝis al ili sian profundan klasan senton en vivo. Kiam malsaniĝis somaliaj laboristoj, ili persone faris konsolviziton kaj portis la salajron al la malsanuloj. Vidante ĉinajn amikojn en sia dometo, la malsanuloj kortuŝiĝis ĝis larmoj. En la ĉinaj teknikistoj la somaliaj laboristoj spertis lumon kaj varmon de la granda penso de Maŭ Zedong.

La grandioza Somalia Ŝtata Teatro nun impone staras en la centro de Mogadishu, la ĉefurbo de Somalio. Kiel granda orebrila gemo inkrustita al la bordo de Hinda Oceano, ĝi altiras amasojn da vizitantoj kaj preterpasantoj per sia brila pompeco. La Somalia Ŝtata Teatro kun la nomo de "Domego de Amikeco inter Ĉinio kaj Somalio" estas simbolo de amikeco inter la ĉina kaj somalia popoloj. Tiu ĉi belega floro de amikeco inter la ĉina kaj somalia popoloj floras sub sunbrilo de la penso de Maŭ Zedong.

Ĉinaj specialistoj, kiuj helpas en konstruado de ŝpinteksa fabriko en Kongolando (B.), laboras kune kun Kongolandaj laboristoj.





La granda gvidanto Prezidanto Maŭ, lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ, kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Ĉen Boda estas kun nia urugvaja amiko Ruben Nunez kaj lia edzino.

La Feliĉa Momento

RUBEN NUNEZ (Urugvajo)

Karaj kamaradoj kaj amikoj de Latinameriko!

Ni kun plena ĝojo salutas vin de tiu ĉi glora lando, kie la unua impono al la vizitantoj estas la ĉiam iranta heroa afero de ĝia popolo.

Necesas multe da tempo kaj spaco, se oni volas priskribi, eĉ se tre koncize priskribi, multajn valorajn travivaĵojn kiujn ni spertis dronante en la emocia vigloplena atmosfero de la alta tajdo de la granda proletara kultura revolucio.

Kvankam ni estas nur ordinaraj spektantoj pri la senprecedence grandioza afero en la historio, tamen ni ĝuas raran privilegion ke ni povas meti nin en ĝin konfirmi tiom da juĝoj poseditaj de ni, kompletigi kaj pliriĉigi nian konon, pliprofundigi niajn impresojn kaj havigi al ni klaran direkton.

Jes! Tio estas vera kaj aŭtentika revolucio, en kiu la tuta ĉina popolo, la sepcentmiliona popolo konsistiganta kvaronon de la homaro, renkonte al la furioza ŝtormo kaj muĝantaj ondegoj, surgrimpis la kulminon de kulturo, efektivigis la plej plenan grandan integran demokration senprecedencan en la historio.

Ni nun volus detale rakonti pri emocia kaj neniam forgesebla momento ekstreme rara.

La atmosfero estis tre streĉa, kio antaŭsignis alvenon de unu grava evento. La ĉinaj kamaradoj kiuj nin akompanis montris ian emociiĝon eksterordinaran. Subite venis urĝa sciigo, ke ni senprokraste veturu al la Granda Halo de la Tutlanda Kongreso de la Popolaj Reprezentantoj. Ni atingis ĝin en la ĝusta tempo.

Ni, gastoj kun diversaj naciecoj, sidiĝis en vasta halo, kies tapiŝoj transsendis niajn flustrojn plenajn de respekto. Plifortiĝis la emociiĝo de atendo; ni senerare antaŭsentis, ke tuj venos grava ĝojiga novaĵo.

Fine kamarado interpretisto diris al ni ekscitite: "Prezidanto Maŭ Zedong kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj ŝtato baldaŭ vin akceptos!"

Ni simple ne povis fidi niajn orelojn. Ho! Esti akceptotaj de Prezidanto Maŭ! Tio, kion faris ni, ordinaraj civitanoj el malgranda kaj malproksima lando, estas tiom malmulta; ĉio kion ni faris estas fakte neniom priparolinda en komparo kun la meritoplenaj heroaĵoj faritaj de la miloj kaj miloj da ĉinaj kamaradoj, kiuj ankoraŭ ne havas ŝancon por vidi sian honoran instruanton kaj sian grandan stiriston!

Ni pretervole ekpensis pri la veteranaj batalantoj de la Longa Marŝo, pri la sennombraj nekonataj herooj en la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj en la batalo kontraŭ Kuomintango, pri la bravaj konstruantoj de socialisma socio, pri la ĉinaj volontuloj heroe batalintaj en la milito en Koreio, pri Liu Hulan, Lej Feng, Maj Hiande, Giaŭ Julu, Vang Gie kaj aliaj herooj, antaŭ ilia granda vivofero ni des pli sentis niajn farojn tre malgrandaj; ili oferis ĉion sian, eĉ sian vivon, en defendo de sia popolo, de la revoluciaj popoloj de la mondo kaj en defendo de la senlime brila penso de Maŭ Zedong.

Ho, venis Prezidanto Maŭ! Li, nia amata, kun firmaj paŝoj, vigloplena, vidiĝis aparte sana. Lin sekvis lia intima batalamiko vicprezidanto Lin Biaŭ kaj kamarado ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj kamarado Ĉen Boda, ĉefo de la Grupo de la Kultura Revolucio sub la Centra Komitato de la Partio.

Eksplodis ĝojkrioj nereteneblaj, kaj la famaj ruĝaj libretoj svingiĝis en la aero, kiel flagoj de la pioniroj de la revolucia afero de la kvin kontinentoj, kiel standardoj de ĝojo kaj venko.

En la longaj aplaŭdoj kaj vivukrioj Prezidanto Maŭ kaj liaj kamaradoj salutis ĉiun delegacion, kaj fotografiĝis kune kun ili. Fine venis nia vico. Subite, ni sentis kvazaŭ malaperus la homoj starantaj ĉirkaŭ nia delegacio, kvazaŭ nur ni estus kune kun li, nia amata, kaj ni dronis en la varmo de granda afableco montrita de li, nia amata.

Dum nia longdaŭra firma manpremado kun li, ni sentis varmon de lia nobla mano plena de vivforto. Ĝuste per tiu ĉi mano li realigis la senmortan kreadon de la granda penso en siaj verkoj kiel scienca marksist-leninisto kaj samtempe kiel genia poeto.

Kiam ni salutis la genian instruanton de la revoluciaj popoloj de la mondo en la nomo de la urugvaja popolo, ni rerigardis la historion de nia Ameriko, kaj en la brila penso de Maŭ Zedong ni trovis la resumon de niaj liberigaj bataloj.

Vivu la penso de Maŭ Zedong kiu lumigas la vojon de nia liberiga batalo!

Vivu internaciismo proletara!

Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!

Triumfo de la Vjetnama Popolo en la Komenco de la Printempo

DISVOLVANTE la spiriton de maltimo al ia ajn ofero kaj kuraĝo sinĵeti en bolantan akvon kaj flamantan fajron, la heroaj sudvjetnamaj armeo kaj popolo lanĉis, komence de la nova Printempa Festo, kontraŭ la malamiko atakojn sur ĉiuj frontoj kun lavanga potenco karakterizitajn per firma kunagado inter armeanoj kaj civiluloj, inter urboj kaj vilaĝoj kaj de interne kaj ekstere, kaj akiris senprecedence grandajn venkojn imponantajn montojn kaj riverojn.

En la ses tagoj de la nokto de la 29-a de januaro ĝis la 4-a de februaro, la armeo kaj la popolo de la suda Vjetnamio ekstermis pli ol 50,000 malamikojn, inkluzive pli ol 10,000 usonajn agresajn armeanojn, kaj diserigis pupajn armeojn en nombro de 200,000 personoj. Multaj usonaj kaj pupaj armeaj unuoj estis tute ekstermitaj, inkluzive de 3 kirasitaj regimentoj kaj 29 batalionoj. Ili ankaŭ surprizatakis 30 usonajn kaj pupajn aerodromojn inkluzive tiujn en Da Nang, Tan Son Nhut kaj Bien Hoa, detruis pli ol 1,500 malamikajn aviadilojn kaj pli ol 4,000 malamikajn militajn veturilojn kaj dronigis aŭ detruis 50 malamikajn militŝipojn kaj kanonboatojn.

Respondante al la batalalvoko de la Prezidantaro de la Centra Komitato de la Naciliberiga Fronto de la Suda Vjetnamio, la liberigaj armitaj fortoj de la sudvjetnama popolo, kune kun la popolamasoj kaj diversaj patriotaj armitaj fortoj, lanĉis furiozan ofensivon kontraŭ la malamikoj sur ĉiuj frontoj. Ĝis la 4-a de februaro, ili brave leviĝis al batalo kaj vaste lanĉis atakojn al 37 urboj kaj provincaj ĉefurboj inkluzive de Sajgono kaj Hue, al centoj da guberniaj kaj subguberniaj urboj kaj la vastaj areoj en kamparo kiuj estas provizore superkontrolitaj de la malamikoj.

Granda nombro da ĉefaj militaj kaj administraj instancoj de la uson-pupa kliko en diversaj urboj kiel ekzemple la usona "ambasadorejo", la domo de la pupa "prezidanto", la ĉefstabejo de la pupa armeo, la komandejo de la pupa mararmeo, la komandejo de la usona marinfanterio kaj la ĉefoficejo de la pupa policio ĉiuj estis atakitaj de la armeo kaj la popolo de la suda Vjetnamio. Ili ankaŭ atakis la komandejojn de ĉiuj kvar militaj regionoj de la pupa armeo kaj tiujn de ok el la 11 divizioj de la pupa armeo, du usonajn kampajn komandejojn ktp.

La armeo kaj la popolo de la suda Vjetnamio ankaŭ detranĉis diversajn komunikajn liniojn terajn kaj akvajn de la malamikoj tiel ke gravaj arterioj kiaj la ŝoseoj n-roj 1, 4 kaj 14 estis tute paralizitaj.

Ĉiuj malamikaj radiostacioj en la ses grandaj urboj kaj multaj stacioj de drata disaŭdigo en diversaj urboj estis detruitaj.

Ankaŭ multaj malamikaj bazlokoj por postfrontaj servoj, staploj kaj vartenejoj por strategia rezervo estis atakitaj. La armeo kaj la popolo de suda Vjetnamio militakiris aŭ detruis milionojn da tunoj da municio, benzino kaj diversaj militaj instrumentoj.



Firme tenante en la mano la iniciativon, la heroaj popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio lanĉas furiozan atakon kontraŭ uson-pupaj trupoj.

Ili ankaŭ batalakiris dekojn da miloj da diversaj armiloj, detruis centojn da kanonoj kun diversaj kalibroj.

Kunagante kun diversaj revoluciaj armitaj fortoj, la popolo el malsamaj socitavoloj en diversaj lokoj brave leviĝis por renversi la lokajn registarojn de naciperfiduloj kaj lakeoj, frakasis la katenojn de la malamika regado, mortigis la fioficistojn de la pupa registaro kies manoj estis makulitaj per la sango de la popolo, liberigis pli ol 20,000 popolanojn enkarcerigitajn de la malamikoj kaj starigis revolucian regpotencon.

En la revolucia ŝtormo, la politika kaj armita fortoj de la popolo tre rapide kreskis kaj fortiĝis. Milionoj da popolanoj, ĉu viroj ĉu virinoj, ĉu knaboj ĉu maljunuloj, kvankam apartenas al diversaj naciecoj kaj malsamaj politikaj aŭ religiaj kredoj, tamen unuiĝis kaj brave leviĝis por batalo, kontribuante siajn fortojn al la afero de liberigo de sia patrolando. Naskiĝis unu post alia la Alianco de Diversaj Nacioj kaj Pacaj Fortoj en Sajgono, la Alianco de Nacio, Demokratio kaj Paco en Hue kaj diversaj aliaj revoluciaj organizoj, kiuj prenis sur sin la gloran taskon de sia nacio. La popolaj liberigaj armitaj fortoj altgrade disvolvis la tradicion nepre firme batali por gajni venkon. Aperis unuj post aliaj diversaj armitaj memdefendaj trupoj, gerilaj taĉmentoj de milicanoj, ribelaj grupoj kaj multaj patriotaj armitaj organizoj. Ili armis sin per la armiloj militakiritaj de la malamikoj kaj batalis ŝultron ĉe ŝultro kun la popolo por savi sian patrolandon kaj ekstermi la malamikojn.

Granda skuiĝo okazis interne de la pupa armeo kaj la pupaj registaraj instancoj. Responde al la alvoko de la patrolando, multaj oficiroj kaj soldatoj, multaj kompletaj unuoj el la pupa armeo kaj multaj oficistoj de la pupa registaro transiĝis al la popolo. Laŭ la unuaj informoj, nur en 11 provincoj estis 169 apogpunktoj kaj gardejoj, kies pupaj soldatoj sin turnis kaj aliĝis al la revolucia vicaro. Multaj patriotaj soldatoj, kiuj oponas kontraŭ usonaj agresantoj kaj la kliko de Nguyen Van Thieu-Nguyen Cao Ky, starigis siajn organizojn.


Fronte al la alta tajdo de tondra milita ofensivo de diversaj revoluciaj armitaj fortoj kaj la ŝtorma brava batalo de la popolo, la usonaj rabistoj kaj iliaj lakeoj suferis pezan kaj ĉiuflankan fiaskon milite kaj politike, strategie kaj taktike. Ili falis en plenan embarason kaj grandan malfacilon. Ili estas katenitaj en ĉiu ajn loko kaj iliaj gravaj partoj estas batitaj. La usona armeo estas devigita disigi siajn fortojn kaj ĝia batalforto evidente reduktiĝis. La pupa armeo pli rapide diseriĝis. La korupta kaj senpova pupa regpotenco sin trovas en disfalo. La bazo de la usona novkoloniisma politiko en la suda Vjetnamio estas deradike frakasita.

La venkoj en la lastaj tagoj de la sudvjetnamaj armeo kaj popolo estas ekstreme grandiozaj kaj plenampleksaj venkoj kun senkompare grava signifo. Tiuj venkoj montris ke la potenco de la armeo kaj la popolo de la suda Vjetnamio estas nevenkebla. Tiu potenco venis de la unuiĝo kaj unuanimeco de la popolanoj, kiuj staras ŝultro ĉe ŝultro sub la glora standardo de la Naciliberiga Fronto.

La grandaj venkoj de la armeo kaj la popolo de la suda Vjetnamio montris ankaŭ ke kvankam la usona imperiismo posedas kolosan agresan armeon kun 1,200,000 personoj kaj uzas ĉiajn plej kruelajn kaj plej ruzajn rimedojn, tamen ĝi restas senpova antaŭ la miraklaj atakoj de la sudvjetnamaj armeo kaj popolo. Usono estas jam destinita por malvenko. Eĉ se ĝi faras obstinan kaj frenezan barakton kaj plimultigos siajn trupojn kaj militajn instrumentojn, ĝi neniel povos savi sin el la malfacila kaj danĝera situacio. Ĝi certe suferos ĝisfundan fiaskon.

Daŭras la intensa kaj sukcesplena batalo de la sudvjetnamaj armeo kaj popolo. Ili estas akirantaj novajn venkojn unu post alia.

La heroaj batalantoj de suda Vjetnamio forte batas la usonajn rabistojn.





La popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio frakase batis la ŝajne fortajn usonajn agresantojn. La foto montras ke batalantoj starigas sian venkan flagon sur la malamikan postenon.




La popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio, kiuj ĉiam pli grandiĝas en la batalado, antaŭenpuŝiĝas plue por persekuti la venkitajn malamikojn.



Batalantoj de la popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio resumas sian batalsperton kaj ridas pri la esenca malforteco de la usona imperiismo kiel papera tigro.




1
2



1. *Perfekta simbolo por la usona imperiismo kiel papera tigro: difektita ŝtata emblemo de Usono falinta antaŭ la pordo de la usona "ambasadorejo" plena de kuglosignoj.*

2. *Batita en strata batalo en Hue, suda Vjetnamio, la usona rabisto forkuregas kiel li povas.*

3. *Restaĵo de usona aviadilo en la aera bazo de Da Nang post la bombardo de la liberiga armeo de suda Vjetnamio.*

4. *Fuĝantaj soldatoj usonaj kaj pupaj sur strato de Sajgono.*



La Tagoj de la Imperiistoj, Reviziistoj kaj Reakciuloj Fariĝas Ĉiam pli Malfacilaj

PREZIDANTO Maŭ diris: **"La malamiko putriĝas tagon post tago, dum la afero por ni pliboniĝas kun ĉiu tago."** Sub la bonega situacio de la senprecedence intensa batalo kontraŭ imperiismo, la revoluciaj popoloj de la tuta mondo marŝas renkonte al pli grandaj venkoj kun plena fido kaj batalvolo. Sub la forta frapo fare de la revoluciaj ŝtormoj de la mondo, precipe de la granda venko de la ĉina granda proletara kultura revolucio kaj de ĝia granda influo al la tuta mondo, la imperiistoj, modernaj reviziistoj kaj diverslandaj reakciuloj iras al plia dissplitiĝo kun ĉiam pli da kontraŭdiroj inter si kaj vizaĝas al ĥaosa kaj senelira perspektivo. Eĉ gazetaro de la t. n. "plej potenca" en la mondo usona imperiismo vole nevole eligis malĝojan veon, ke la jaro 1967 estis "maltrankviliga jaro".

La kuranta jaro fariĝas des pli malfacila por la imperiistoj, modernaj reviziistoj kaj diverslandaj reakciuloj. La novprintempa triumfo de la sudvjetnamaj armeo kaj popolo estas plej solida bato al la imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj. Terurite de la ĉiuflanka atako fare de la sudvjetnamaj armeo kaj popolo, la ĉefo de la usona imperiismo Johnson ne endormiĝis dum kelkaj sinsekvaj noktoj kaj haste venigis militajn kaj registarajn ĉefojn por sekreta intrigo kontraŭ la "urĝa situacio" en la suda Vjetnamio. Sed, iu ĵurnalisto de la Franca Novaĵagentejo raportis, ke la sinsekvaj brilaj venkoj akiritaj de la sudvjetnamaj armeo kaj popolo multe maltrankviligis "politikdecidantojn de Vaŝingtono kaj generalojn de Pentagono, kaj tiu maltrankviliĝo multe pli superis tiun de ili konfesitan". Ankaŭ *New York Times* malĝoje veis, ke multaj bazoj, kazernoj de Usono en la suda Vjetnamio, kaj eĉ la usona "ambasadorejo" samtempe ricevis atakojn de la sudvjetnamaj armeo kaj popolo, kio estas "alia doloriga konstato, ke la fortoj de Usono en Azio estas limigitaj".

Prezidanto Maŭ diris: **"La kontraŭdiroj interne de la imperiisma sistemo multiĝas kaj estas neniel venkeblaj, kio kaŭzas al la imperiistoj tre grandan afliktiĝon."** En la jaro ĵus pasinta, iris ĉiam pli intensaj malkaŝaj kaj kaŝitaj bataloj inter la ĉefaj imperiismaj landoj, precipe inter Usono kaj Francio. Ĉe la vjetnama problemo Usono ne ricevis subtenon de Francio kaj aliaj ĉefaj "aliancoj" kaj fariĝis pli kaj pli izola. Delonge Francio havas fortan malkontenton kontraŭ Usono pro tio ke la lasta uzurpis ĝian pozicion en Hindoĉinio. Ju pli Usono trafis seriozan malvenkon en la agresa milito kontraŭ Vjetnamio, des pli Francio intensigis sian atakon kontraŭ Usono. Utiligante la embarasan staton de Usono, Francio unuflanke postulis ke Usono "retiru al sia lando" siajn agresantajn armeojn el Vjetnamio, kaj aliflanke elmetis proponon pri "neŭtraligo de la sudorienta Azio". Kial Francio prezentis tiujn proponojn? Sendube ĝi havas sian intencon. Rilate la problemon de la Meza Oriento kaj la problemon de la t.n. "pre-



vento de nuklea disvastigo", Usono kondukas intensajn batalojn kontraŭ Francio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj. En la lastaj jaroj la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo ĉiam faras komplotojn inter si ĉe traktado pri la t. n. konvencio pri "prevento de nuklea disvastigo". Francio publike riproĉis ke ilia celo estas starigi nuklean hegemonion de Usono kaj Sovetunio. Pri tio Italio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj havas grandan malkontenton. Ĉe la kunveno de 17 landoj por "armredukto" en Ĝenevo, je la 18-a de januaro de la kuranta jaro, Usono kaj Sovetunio prezentis kompletan projekton pri la t. n. konvencio pri "prevento de nuklea disvastigo", kiu kompletigis la lastjaran projekton per klaŭzoj pri "internacia kontrolo", sed Francio rifuzis ĝin partopreni. La nordatlantika agresiva kliko, kiun Usono utiligas por kontroli la okcidentan Eŭropon, nun rapide disfalas. Post la retiriĝo el militaj organizoj de tiu kliko, Francio forpelis la centralon de tiu kliko kaj usonajn armeojn el Francio en aprilo de la lasta jaro. En la vintra kunveno de ministra konsilantaro de tiu kliko, denove kiel rivalo de Usono, Francio ne nur ne partoprenis la diskuton pri milita strategio, sed ankaŭ prezentis sian militan strategion antaŭ la kunveno por oponi "dependon al Usono" en militaj aferoj. Tiu ĉi agresiva kliko, por kies funkcio penegis la usona imperiismo dum pli ol 20 jaroj, jam disfalas kaj agonias.

Kun pluapaŝa disvolviĝo de la kontraŭimperiisma batalo de la aziaj kaj afrikaj popoloj, des pli malmultiĝas la objektoj laŭdezire rabataj kaj ekspluatataj de imperiismo, kaj des pli reduktiĝas la monda merkato por kapitalismo. Depost la lastjara printempo, en Usono, Britio, la Okcidenta Germanio, Francio kaj aliaj imperiismaj landoj respektive okazis stagno aŭ malleviĝo de industria produkto, komerca stagno, grandiĝo de senlaboreco kaj inflacio, kio anticipas pli kaj pli proksimiĝon de la ekonomia krizo envolvanta la tutan kapitalisman mondon. Financaj oligarkoj en la Okcidento kun ekstrema maltrankvilo rigardas tiun malluman perspektivon, timante reaperon de la "granda ekonomia katastrofo" de la tridekaj jaroj. Ĝuste sub tia medio la imperiismaj landoj disvolvas inter si intensan batalon en la sferoj de financo kaj negoco, kaj ĉiu el ili deziras transmeti sian malfacilon al aliaj. En tiu miksbatalo la hegemonio de la usona imperiismo ŝanceliĝas kvazaŭ kaduka domo en uragano.

La triafoja devalutiĝo de pundo kaj la de tio kaŭzita granda ĥaoso en monsistemo de la tuta kapitalisma mondo estas grava signo de kompleta akriĝo de diversaj ekonomiaj kontraŭdiroj de imperiismo. Unu el la ĉefaj kaŭzoj de la devigita devalutiĝo de pundo kuŝas en tio, ke Francio, la Okcidenta Germanio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj senĉese atakas privilegian pozicion de la usona dolaro kaj pundo, kaj ĉiel klopodas kapti de Usono la hegemonion super Eŭropo. En siaj komentoj, iuj usonaj ĵurnaloj konfesis, ke la devalutiĝo de pundo efektive estas grava fiasko de Usono en la

Spite al ĉia perfortaĵo, la usona popolo el diversaj lokoj de la lando sieĝas la usonan Ministerion de Defendo por forte protesti kontraŭ la agresado fare de Johnson-registaro en Vjetnamio.



Ĉiam pli vigla fariĝas la batalo de la monda revolucia popolo kontraŭ reviziismo. La perfido de la moderna reviziismo kontrŭ marksism-leninismo renkontas ĉie oponon kaj riproĉojn de la revoluciaj popoloj. Jen britaj progresemuloj manifestacias kontraŭ Kosigin, korifeo de la sovetia reviziismo.





Alte tenante la ruĝan trezoran libreton de Prezidanto Maŭ, la japana revolucia popolo luktas heroe kaj neflekseble kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj la reviziista kliko de Mijamoto de la Japana Komunista Partio.

monbatalo. Tiu devalutiĝo kaŭzis post si monan devalutiĝon de dekkelkaj landoj, forvendon de la usona dolaro kaj konkuran aĉeton de oro, la kvanto de kiuj ambaŭ estas plej granda depost la Milito, kaj pro tio la usona dolaro trafis premon plej pezan depost la tridekaj jaroj.

Miksiĝe kun la komplika kaj akra monbatalo disvolviĝas ĉiam pli intensa batalo en komerco inter la imperiismaj landoj. Depost la lastjara komenco, bataloj por ŝtalaj materialoj, petrolo, kaŭĉuko, teksaĵoj, greno . . . leviĝas unu post alia, okazis ĥaosa fenomeno, ke monopolaj klikoj de imperiismaj landoj reciproke strangolas sian kontraŭulon por rabi eksportan merkaton. Pro sia deficita bilanco en eksterlanda komerco dum la sinsekvaj jaroj, Britio foje-refoje humile postulis partopreni la "Komunan Merkaton" de la okcidenta Eŭropo por grandigi sian eksporton al la okcidenta Eŭropo, sed ĝia postulo refoje estis decideme rifuzita de Francio, kiu konkuras kun Usono por superkontroli la okcidentan Eŭropon.

Pro proksimiĝo de la ekonomia krizo, la brita imperiismo devigite deklaris antaŭdatan retiron de siaj koloniismaj armeoj el la Malproksima Orienta kaj la Persia Golfo, nuligon de mendo por fuzaviadiloj al Usono, redukton de siaj armitaj fortoj kaj la financaj elspezoj por enlandaj eduko, loĝej-konstruo, ŝoseo kaj la t. n. bonstato por mildigi la ekonomian krizon. Tiu unupaka plano, kiun la brita imperiismo nomas "ĉagrena decido", markis ke la brita imperiismo troviĝas en senelira pozicio.

Ankaŭ la modernaj reviziistoj kun sovetunia reviziismo kiel centro falas en abismon de internaj kaj eksteraj malfaciloj. La perfidula kliko de Breĵnev kaj Kosigin praktikas plenampleksan restaŭron de kapitalismo en Sovetunio kaj burĝaran diktaturon super la laboranta popolo. Ĝi ĵetis en grandan ĥaoson la unuan socialisman landon en la mondo, kiun Lenin persone fondis. Ĝi devas importi eĉ ordinarajn flankmanĝaĵojn, vestaĵojn por ornami montroŝrankojn. Pli kaj pli da sovetiaj popolanoj pluapaŝe konis renegatan vizaĝon de la sovetia reviziisma kliko. En homplena loko de Moskvo, iu sovetia civitano, spite al perforta eskorto de policanoj de la reviziisma kliko, kuraĝis krii kun plena indigno: "Faligu la modernan reviziismon de Sovetunio!" Jen la komuna voĉo de la vasta sovetia popolo. En internacia rilato la reviziisma Sovetunio jam perdis sian pozicion en "superrego" de la mondo fare de Usono kaj Sovetunio, kiun ĝi sopiras eĉ en sonĝo, sed tute genuiĝas antaŭ la usona imperiismo kaj ludas la rolon de statisto en la kontraŭrevolucia "sankta alianco" kun la usona imperiismo kiel ĝia ĉefo. Pro tio, ke la reviziisma Sovetunio malkaŝe ludas rolon de la plej granda hontinda kunkrimulo de imperiismaj agresantoj, kiu vendas revoluciojn de diverslandaj popoloj, ĝia prestiĝo estas forbalaita en la mondaj revoluciaj popoloj.

La pozicio de la reviziisma kliko de Sovetunio inter la modernaj reviziistoj pli kaj pli malstabiliĝas, kaj ĝia direktbastono pli kaj pli malefikas. Ili ne nur ruze intrigas unu kontraŭ alia por siaj interesoj en ekonomio, sed ili ankaŭ tenas siajn respektivajn fiintencojn en traktado de iuj internaciaj eventoj. En aprilo 1967 la sovetia reviziisma kliko venigis plenmanon da siaj sekvantoj al Karlovy Vary kaj okazigis tie kontraŭrevolucian kunve-

non. Por okazigo de tiu nigra kunveno, tutan jaron ĉefoj de la sovetiaj reviziistoj ĉien iradis por serĉi subtenon. Ili intencis, per la nigra kunveno, obeigi siajn sekvantojn al la direkta bastono, sed la afero iris kontraŭ ilia volo. La kunveno en Karlovy Vary konstatis, ke kvankam la eŭropaj modernaj reviziistoj kuŝas sur la sama lito, tamen ĉiu el ili havas sian malsaman sonĝon, kaj sin trovas en dissplitiĝo. Rilate al la incidento de la Meza Oriento, la sovetiaj reviziistoj sinsekve kunvokis 4 kunvenojn, sed la kunvenantoj ankaŭ ne atingis unuaniman interkonsenton. Depost la dua duono de la lasta jaro, la sovetiaj reviziistoj senlace sin okupis pri okazigo de la t. n. konsiliĝa konferenco de frataj partioj, intencante direkti la batalan lancpinton kontraŭ Ĉinion kaj aliajn marksism-leninismajn partiojn por pluapaŝe servi al la usona imperiismo. Sed, ĉar iliaj sekvantoj respektive havis siajn proprajn kalkulojn, tiu kunveno neniam iris laŭ la antaŭdifinita intrigo.

Des pli mizera estas la stato de diverslandaj reakciuloj, kiuj rolas kiel lakeoj kaj kunkrimuloj de imperiismo kaj la moderna reviziismo.


En Azio, la reakcia Sato-registaro pluapaŝe sin apogas sur la usona imperiismo, tial granda kvanto da mezaj kaj malgrandaj entreprenoj en Japanio bankrotis unuj post aliaj kaj la nombro atingis la plej altan antaŭmilitan rekordon. La reakcia registaro nun intensigas ekonomian penetron al fremdaj landoj sub la ŝildo de teknika helpo kaj milita kompenso, intencante mildigi sian enlandan krizon per rabado de alilandaj riĉfontoj kaj dumpingo de siaj longe stagnaj varoj. Rerigardante amasojn da malfaciloj en 1967, la tagon post tago putriĝanta hinda reakciularo malĝoje veis pro malfacilaj tagoj. Priparolante la situacion kiun alfrontas Hindio, Indira Gandhi ne povas ne konfesi, ke "nun estas tre malfacila periodo". Ŝi diris kun malĝojo, ke antaŭ ili kuŝas granda nombro da malfacilaĵoj inkluzive tiujn en ekonomio. En sia artikolo aperigita je la 1-a de januaro de la kuranta jaro *Times of India* informis, ke Hindio dronos en pli serioza ekonomia krizo. Ĝi antaŭkalkulis, ke aperos kolosa deficito en la kuranta financa budĝeto valida ĝis la fino de marto 1968. Ankaŭ amasiĝas la internaj malfaciloj de Birmo kaj Indonezio sub la faŝisma regado de Ne Vin kaj Suharto-Nasution. Pro la inflacio kaj leviĝo de varprezoj, la malmulte enspezantaj laborantaj popolanoj suferas de malsato kaj manko de vestaĵoj, kaj baraktas en agonio.

La inflacio en ekonomio, serioza senlaboreco kaj pliakriĝo de kontraŭdiroj interne de la regantaj klasoj regas kiel vagantaj fantomoj super Brazilo, Ĉilio kaj aliaj latinamerikaj landoj. La brazila prezidanto origine surtroniĝis sinapogante sur la terarmeo, sed li nun estas sub la premado de militistoj. Ĉar la fremdlanda valuto tenata de Brazilo malaltiĝis ĝis plej danĝera punkto, ĝi povis mildigi la ekstreman embarason nur per mondevalutiĝo. Profitante la ŝancon de urĝa bezono por Brazilo pri fremdlanda valuto, spekulistoj de Usono, Japanio, la Okcidenta Germanio k. a. konkure alvenis al Brazilo por aĉeti teron. Laŭ iu el politika rondo de Brazilo, ne malpli ol triono de ĝia tero jam estas tenata en la manoj de fremdlandanoj.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"La popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn! La popoloj de la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu batali, ne timu malfacilojn kaj marŝu antaŭen unuj sekvante aliajn. Do la mondo nepre apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos senescepte ekstermitaj."**

La internacia situacio estas kaj estos fluge disvolviĝanta antaŭen laŭ la direkto antaŭvidita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

Antaŭ la potenca ofensivo de la heroaj vjetnamaj armeo kaj popolo la usonaj agresantoj timtreme kunpremiĝas en konfuziĝo, plene montrante la malfortecon en la naturo de imperiismo.




La Mararmeo de la Korea Popola Armeo Kaptis la Spionan Ŝipon Pueblo de la Usona Imperiismo


LA 23-an de januaro, 1968, mararmea trupo de la Korea Popola Armeo kaptis, sur la maro proksime de Vonsan, la usonan armitan spionan ŝipon Pueblo, kiu invadis la maran teritorion de Koreio por spionado. Oni mortigis kaj vundis kelkajn kaj militkaptis pli ol okdek usonajn agresantojn.

Por savi sin el la malvenko sur la vjetnama batalkampo, la usonaj agresantoj nun intrigas plivastigi la agresan militon kontraŭ Vjetnamio kaj intensigas siajn agresajn kaj militajn aktivadojn en la tuta Azio. La provoko de la usona imperiismo al la korea popolo estas konsistiga parto de ĝia krimago tiurilata. Utiligante la kaptiĝon de Pueblo la reganta kliko de Usono nun energie faras militan mobilizadon kaj militan ĉantaĝon; ĝi faras nudan militan minacon al la heroa korea popolo longe provita de milito, intensigante sian militan dispozicion unuflanke, kaj histerie kriante por milito aliflanke.

La ĉina registaro kaj la ĉina popolo firme subtenas la justan starpunkton de la korea registaro kaj la korea popolo en rebato al la freneza provoko de la usona imperiismo. Se la usona imperiismo aŭdacas fari novan militan aventuron, ĝi nepre rikoltos maldolĉan frukton el sia propra klopodo kaj ricevos ankoraŭ pli severan punon!



Lloyd Mark Bucher, kapitano de la ŝipo "Pueblo", skribe konfesas sian krimon.



Dekstre supre: *La armita spiona ŝipo" Pueblo" de la usona imperiismo estis kaptita de la korea popola mararmeo.*



Dekstre malsupre: *La usonaj agresantoj de la armita spiona ŝipo "Pueblo", estas kaptitaj vivaj de la popola mararmeo de Koreio.*

La Diplomatia "Fleksebleco" de la Sovetuniaj Reviziistoj

ANTAŬNELONGE, la ministro de eksterlandaj aferoj de la reviziisma Sovetunio A. A. Gromiko faris raporton pri diplomatio en Moskvo en kiu li multe babilaĉis pri la diplomatia "fleksebleco" de la sovetuniaj reviziistoj.

Gromiko fanfaronis, ke "regado de la eventoj, tenado de diplomatia iniciativo en la manoj, lerteco en atako sed ankaŭ en defendo kaj manovrado" estas la bone mastrataj diplomatiaj rimedoj de la sovetuniaj reviziistoj. Li aparte emfazis, ke "ĉia ajn diplomatia rimedo ne devas ne esti utiligata", nur se ĝi povas "alporti bonon" al la sovetuniaj reviziistoj. Per tiu bela parolo, Gromiko intencis kovri la hontindan kapitulacan kaj perfidan diplomatian linion de la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio. Sed tia stulta parolo por elturniĝo el embaraso nur pli bone malkaŝis la abomenan vizaĝon de la sovetuniaj reviziismaj renegatoj.

Pri la diplomatia "fleksebleco" de la sovetuniaj reviziistoj la revoluciaj popoloj de la mondo ja havas profundan komprenon el sia propra sperto.

En la Kariba Krizo de 1962, hazardlude Ĥruŝĉov enportis raketojn en Kubon por nuklea ĉantaĝo. Sed kiam ankaŭ la usona imperiismo faris tian ĉantaĝon, liaj kruroj tuj rifuzis lin porti pro timo, kaj en unu sola nokto li rampis el la marĉo de aventurismo en tiun de kapitulacismo kaj surgenue petis indulgon de Kennedy. Jen kia estas la tiel nomata "lerteco en atako sed ankaŭ en defendo"!

En 1963, ili kontraktis la Traktaton de Parta Malpermeso de Nuklea Provado kun la usona kaj brita imperiismoj tute kontraŭ sia antaŭa starpunkto. Por pravigi sian perfidon, ili diris senhonte: "Tio, kio ankoraŭ ne estis akceptebla hieraŭ, povas fariĝi hodiaŭ favora, eĉ tre favora." Tia vangfrapo al si mem ja estas "manovrado" de la sovetunia reviziisma diplomatio!

Oni povas diri, ke Breĵnev, Kosigin k. s. tre bone komprenas kaj subtenas per intima kunago la agresan intrigon de la usona imperiismo rilate al la vjetnama problemo. Ili veturas ĉien por trovi perantojn kaj plenenergie kolporti trompan pacan intertraktadon kun vera "iniciativo", timante nur tion, ke iliaj klopodoj ne efikus!

En la mezorienta evento, en komploto kun la usona imperiismo, ili trompis kaj subpremis la arabajn landojn, ĉiamaniere klopodis ligi la manojn kaj piedojn de la arabaj popoloj kaj estingi la flamojn de la kontraŭagresa milito. Ĉu tio ne klare montras, kian "eventon" ili volas "regi"?

Unuvorte, ja sufiĉe "fleksebla" estas la diplomatio de la sovetuniaj reviziistoj. Unuflanke, ili laŭte kantas pri "batalo kontraŭ imperiismo", dum aliflanke ili reciproke ĉirkaŭbrakumas kun la ĉefoj de la usona imperiismo. Hodiaŭ ili povas doni al vi ĵuron kaj promeson, sed morgaŭ ili pikos glavon al vi en la dorson. Publike ili agas kiel homoj, sed kaŝe ili intrigas kiel demonoj. Ili zorgas nur pri siaj interesoj kaj senskrupule oferas alies vivon. Kontraŭ la usona imperiismo, ili mildas kvazaŭ ŝafoj, dum kontraŭ la revoluciaj popoloj de la mondo ili ferocas kvazaŭ kruelaj lupoj. Tia "fleksebleco" ja estas nenio alia ol filistra spekulacio kaj renegata perfido!

Lenin iam montris: **"Kiam la afero tuŝas la klasajn profitojn, la burĝaro elvendas la patrion kaj agas en negoca komploto kun ĉiu ajn eksterlandano, kontraŭ sia popolo."** Ĥruŝĉov kaj liaj heredantoj Breĵnev, Kosigin k. s. estas reprezentantoj de la burĝara privilegia tavolo en Sovetunio. Por la interesoj de tiu tavolo, ili pretas fari ĉian ajn malbonon. La t. n. diplomatia "fleksebleco" de la sovetuniaj reviziistoj ja estas respegulo pri la burĝaraj interesoj de tiu plenmano da renegatoj.

EKSPOZICIO DE FOTOJ KAJ KOPIAĴOJ DE NIA ARGILA SKULPTAĴO "FARMPAGA KOLEKTEJO" EN HANOJO

Posttagmeze de la 20-a de januaro, 1968, solene malfermiĝis la Ekspozicio de Fotoj kaj Kopiaĵoj de "Farmpaga Kolektejo". En tiu argila skulptaĵo, ĉinaj revoluciaj artistoj prezentas klasan batalon per artaj figuroj. Tiu ekspozicio kune aranĝita de la Vjetnama Komisiono por Eksterlandaj Kulturaj Interrilatoj, la Asocio de Vjetnamia-Ĉinia Amikeco kaj la Federacio de Artistaj Asocioj de Vjetnamio, trovis varman akcepton ĉe la vjetnama popolo.

Meze de la ĉefa salono de la ekspoziciejo, alte pendis giganta foto pri varma manpremado de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh. Ambaŭflanke estis vortoj de Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Ho. La ekspoziciaĵoj konsistis el fotoj pri ĉiuj argilaj statuoj de la "Farmpaga Kolektejo" kaj kopiaĵoj de dek el la argilaj figuroj.

EKSPOZICIO PRI ĈINAJ LIBROJ KAJ ARTO EN KAIRO

Ekspozicio pri Ĉinaj Libroj kaj Arto venke fermiĝis je la 5-a de januaro, 1968, post duonmonata funkciado en Kairo.

En la ekspozicio, *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, *Elektitaj Primilitaj Artikoloj de Maŭ Zedong*, *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj broŝuroj de unuopaj artikoloj de Prezidanto Maŭ ricevis varman bonvenigon de la arabaj vizitantoj. Krom la plej ŝatataj trezoraj libroj de Prezidanto Maŭ, estis ekspoziciitaj ankaŭ la monata gazeto *Ĉinio en Bildoj* kaj libroj kaj bildoj pri la venke progresanta granda proletara kultura revolucio de Ĉinio.

La ekspozicio estis aranĝita de la Universala Librejo de Kairo. Popolanoj de diversaj profesioj de tiu urbo vizitis la ekspozicion kaj multaj el ili tre ĝojis pro ricevo de la ruĝa trezora libro *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj aliaj verkoj de Prezidanto Maŭ.

ĜAŬ FAN:

Proletara Revolucio en Ĉina Edukado

LA jaro 1968 estas tiu, en kiu la granda proletara kultura revolucio de nia lando gajnos kompletan venkon. Nuntempe, vigle disvolviĝas tra la tuta lando senprecedenca, proletara revolucio en edukado.

En sia parolado farita en la 7-a de majo 1966, Prezidanto Maŭ diris: **"Tiel same estas ankaŭ por lernantoj. Ili havas sian ĉefan taskon lerni en lernejoj kaj devas lerni ankaŭ aliajn aferojn. Tio estas, aldone al siaj lernejaj studoj, ili devas lerni ankaŭ industriajn, agrikulturajn kaj militajn aferojn. Ili devas ankaŭ kritiki la burĝaron. La lernotempo devas esti mallongigita, la edukado devas esti revoluciigita, kaj ne devas daŭri plu la stato, ke intelektuloj de la burĝaro regas en niaj lernejoj."**

Eduka revolucio estas grava konsistiga parto de la tuta granda proletara kultura revolucio. Pere de ĝi estos ekstermita ĉio burĝara en la sfero de edukado, kaj establita tute nova eduka sistemo disradianta la brilon de la penso de Maŭ Zedong kaj konforma al la ekonomiaj bazoj de socialismo kaj komunismo. Ĝi estas ekstreme profunda revolucio sur la eduka fronto de la proletaro en nia lando.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Antaŭ ol tute nova socia sistemo estas konstruata sur la grundo de la malnova, oni devas komplete purigi la lokon."**


Prenante la instruon de Prezidanto Maŭ kiel orientilon, la vastaj amasoj de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kondamnas kaj kritikas la kontraŭrevolucian reviziismanlinion de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj praktikitan en edukado kaj la ĝisĉielajn krimojn, kiujn la reakciaj akademiaj "aŭtoritatuloj" de la burĝaro faris dum la tempo de ilia regado en edukado.

La proletara linio de edukado estas delonge klare formulita de Prezidanto Maŭ. Li diris: **"Nia eduka politiko devas ebligi al la edukatoj disvolviĝi morale, intelekte kaj korpe kaj fariĝi kleraj laboruloj kun socialisma konscio."** Sed la ĉina Ĥruŝĉov sabotis tiun revolucian linion per ĉiuj rimedoj kun kaŝita intenco restaŭri kapitalismon en Ĉinio. Nelonge post la Liberiĝo, li tuj elsaltis por kapti regpotencon por la burĝaro. Li elbakis absurdan kontraŭrevolucian teorion, ke intelektuloj de la burĝaro "estas parto de la proletaro", kaj ke "la proletaro devas lerni de la burĝaro". Li instalis siajn agentojn sur la plej gravajn edukajn postenojn, kaj pro tio la gvidanteco de multaj lernejoj falis en la manojn de la burĝaro.

La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon efektivigis diktaturon super la proletaro, en komploto kun reakciaj "aŭtoritatuloj" de la burĝaro.

Ili faris ĉion eblan por subfosi la kreivan studon kaj kreivan aplikon de verkoj de Prezidanto Maŭ. Kiam la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj persistis en la studado, ilia agado estis kvalifikita kiel "maldekstra fanatikeco" kaj "trosimpligo". Lernantoj estis malpermesitaj afiŝi vortojn de Prezidanto Maŭ kaj tempo por studo de la penso de Maŭ Zedong estis multe reduktita. Tiuj edukaj "aŭtoritatuloj" de la burĝaro eĉ malorganizis studajn grupojn de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Ili arbitre persekutis la lernantojn devenantajn de laboristaj kaj kamparanaj familioj. Ili forrifuzis multajn tiajn lernantojn per la eniraj ekzamenoj, eĉ tiujn, kies noto ne atingis la minimuman normon nur je 0.05 poento. Kaj dum lekcioj,



Revoluciaj instruistoj kaj studentoj de la Maj-sepa Komunumo studas la verkon de Prezidanto Maŭ knue kun veteranaj laboristoj ĉe konstruejo.

eksperimentadoj, aldona helpado kaj semestrofinaj ekzamenoj, ili aplikis ĉian diskriminacion al la lernantoj de laborista aŭ kamparana deveno. Ili grandnombre elĵetis la lastajn el la pordoj de kolegioj sub la preteksto de "garantio de kvalito".

En la elektado de materialo por lekcioj, instruado kaj legado kaj en la individua helpado, la akademiaj "aŭtoritatuloj" de la burĝaro en kolegioj senbride disvastigis feŭdajn, burĝarajn kaj reviziismajn ideojn, logis junulojn al strebado al famo, profito kaj alta pozicio. Kursoj estis ŝtopitaj per nemalmulte da materialo fremdlanda, antikva kaj malprogresa, kaj la lernantoj estis ŝarĝitaj per pezaj hejmtaskoj. Ili traktis lernantojn en ekzameno kvazaŭ malamikojn, kaj la ekzamenoj prenis la formon de surprizatako, plenaj de sensencaj kaj neatenditaj aŭ strangaj kaj embarasaj demandoj. Ĉio ĉi tio ne nur koruptis la penson de la lernantoj sed ankaŭ damaĝis ilian sanon.

La fokuso de la batalo inter la proletaro kaj la burĝaro en la eduka fronto estas la problemo, kian specon de daŭrigantoj oni eduku.

Solidiganta sian socialisman sistemon kaj antaŭen marŝanta al komunismo, Ĉinio bezonas tutan generacion da novaj homoj, kiuj posedas la komunisman ideologion kaj estas armitaj per la penso de Maŭ Zedong. Ili timas nenian malfacilon kaj oferon, kaj tutkore kaj tutanime servas al la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo. La reviziisma eduka linio de la ĉina Ĥruŝĉov ne povas produkti tiajn homojn, ĝi povas elkovi nur aristokratecajn sinjorojn de la burĝaro, kiuj sin disigas de la politiko de la proletaro kaj de socia praktikado, produkta laboro kaj la laboranta popolo.

En la kultura revolucio, la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, komplete frakasis la reviziisman edukan linion praktikitan de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj!

Prezidanto Maŭ diris: **"La proletara revolucio en edukado devas dependi de la vastaj amasoj de revoluciaj lernantoj, instruistoj kaj laboristoj en la lernejoj, de la aktivuloj inter ili, nome, tiuj proletaraj revoluciuloj kiuj volas nepre konduki la grandan proletaran kulturan revolucion ĝis la fino."**

Tiu batala alvoko donis grandegajn inspiron kaj forton al la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj. Kvazaŭ printempaj fungoj post pluvo, studaj grupoj de la penso de Maŭ Zedong ĉie aperas. La studado de la verkoj kaj penso de Prezidanto Maŭ pri eduka revolucio plifortigis ilian decidon konduki la edukan revolucion ĝis la fino.

La revolucio en edukado estas nova afero, por kio ne ekzistas preta vojo, kiun oni povus sekvi. La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj agas laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: **"Se vi volas koni la guston de piro, vi devas ŝanĝi la piron, gustumi ĝin mem."** Konforme al la instruo de Prezidanto Maŭ pri kombiniĝo kun la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, ili formis multajn grupojn kaj iris al diversaj fabrikoj kaj popolkomunumoj por fari enketojn. Sur la bazo de iliaj kolektitaj materialoj, provaj projektoj por transformi edukon estas en preparado. Inter tiuj estas la projektoj proponitaj de la Ŝanhaja Tonggi-Universitato kaj de la Pekina Instruista Universitato, kiuj estis publikigitaj sur la fronta paĝo de nia *Popola Ĵurnalo* en la 3-a de novembro 1967.

En aŭgusto kaj septembro de 1967, la Ŝanhaja Tonggi-Universitato, kies specialeco estas konstruado, arkitekturo kaj konstrua inĝenierarto, organizis enketan trupon el pli ol cent instruistoj kaj lernantoj. Ili iris profunden en konstruejojn kaj projektajn departementojn kaj faris detalajn enketojn en pli ol cent unuoj, diskutante la instruojn de Prezidanto Maŭ kune kun la laboristoj, teknikistoj kaj inĝenieroj, petante diversajn sugestojn kaj opiniojn kaj tiel kolektante multon da materialo. Reveninte al la universitato, ili okazigis dekojn da kunsidoj kaj diskutadoj por koncentri siajn opiniojn. Fine ili ellaboris primaran programon de "triflanka kombiniĝo".

Tiu programo preskribas radikalan reorganizon de Tonggi-Universitato, por ke ĝi fakte fariĝu institucio de nova speco kun la karaktero de komunumo, konsistanta el universitato, konstrua sekcio kaj projekta institucio kaj kombinanta la tri funkciojn de instruado, projektado kaj konstruado en unu organo. La malnovaj instruaj kaj esploraj grupoj kaj departementoj estos abolitaj. Kaj anstataŭ ili fondiĝos profesia komitato formita de personoj el la universitato, la produktaj unuoj kaj la konstruejoj. Sub la gvidado de tiu ĉi komitato, klasoj estos organizitaj el studentoj, instruistoj, laboristoj kaj teknikistoj.

La institucio efektivigos du "triflankajn kombiniĝojn": la unua, triflanka kombiniĝo de revoluciaj gvidantaj kadroj, reprezentantoj de la revoluciaj amasaj organizoj kaj la milico; la dua, kombiniĝo de instruado, projektado kaj konstruado. La lernotempo estos mallongigita de 5 jaroj al 3 jaroj. Aldone al kursoj pri verkoj de Prezidanto Maŭ kaj militaj aferoj, jaron post jaro pliiĝos la proporcio de tempo donata al teoriaj objektoj.



Revoluciaj instruistoj kaj studentoj ĝisfunde malkaŝas kaj kritikas damnindajn krimojn de la ĉina Ĥruŝĉov pri restaŭro de kapitalismo en la sfero de alta edukado.

Produkta laboro estas regula parto en la lernoprogramo. La aŭtoroj de la programo akcentis jene ĝian superecon:

1. Ĝi metas gvidantecon firme en la manojn de la proletaraj revoluciuloj. La lernejoj estos ne plu regataj de burĝaraj intelektuloj.

2. Ĝi aplikas la politikon de Prezidanto Maŭ, ke edukado devas servi al la politiko de la proletaro kaj kombiniĝo kun produkta laboro.

3. Ĝi kombinas la enhavon de instruo kaj studo kun efektiva konstrua laboro, kaj tial tiu enhavo povas esti neta kaj koncentrita kaj esti libera de ripetoj kaj skolastika kaj superflua materialo.

4. Ĝi favoras al la ideologia remuldado de intelektuloj kaj la eliminado de la diferencoj inter urbo kaj kamparo, inter laboristoj kaj kamparanoj, kaj inter laboro mensa kaj laboro korpa.

La prova programo ellaborita de Pekina Instruista Universitato donis atenton al la ekzamena sistemo kaj la demando de eduka eskalado. Ĝi rekomendas abolon de la antaŭa ekzamena sistemo kaj insistas pri tiu de tute nova tipo, kiu elstarigas politikon, kombinas teorion kun praktika laboro, kaj emfazas kapablon de analizo kaj solvo de praktikaj problemoj. Ekzamenoj ne devas provi kapablon de memorado sed tiun de rezonado. Parkerado kaj mekanika recitado de instruita materialo estas forĵetitaj. Lernantoj estos kuraĝigataj esprimi siajn proprajn ideojn. Ekzamenoj povas preni diversajn formojn. Elekto de demandoj povas esti aplikata; tekstolibroj, notoj kaj referenca materialo povas esti uzataj dum ekzamenado; kaj lernantoj povas esti ekzamenataj lige kun praktika laboro. Lernantoj devas esti permesataj ankaŭ diskuti la demandojn inter si.

Alia rekomendo estas nuligo de la antaŭa sistemo de eniraj ekzamenoj kaj alpreno de la metodo de rekomendo kombinita kun selekto. Devas esti praktikata la klasa linio en akcepto de novaj lernantoj, kaj lernejoj devas malfermi siajn pordojn al la gefiloj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Tiuj du plej frue elmetitaj programoj estas nun en provado. La revolucio estas ankoraŭ en sia komenca stadio, sed la amasoj havas tre grandan entuziasmon. Ili tre bone komprenas, kian gravan signifon havas edukado de daŭrigantoj de la proletara revolucia afero kaj prevento de restaŭro de kapitalismo en Ĉinio. Sendube estas, ke ĝi ne nur ŝanĝos radikale la aspekton de edukado en nia lando, sed ankaŭ donos profundan influon al la tuta mondo.

ZANG MENGVEJ:

Refoja Vizito al Vilaĝo de Jaŭoj



EN aŭtuno de la lasta jaro, kiam plej intensis la kampaj laboroj, ni venis al vilaĝo enloĝata de jaŭoj en la monta areo de Motianling en gubernio Debaŭ en Guanhi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono. En aŭtuno de 1966, ni jam ĝin vizitis, sed ĉifoje ĝi multe aliiĝis ol en la antaŭa jaro. Kiom multe ŝanĝiĝis la fizionomio de la montvilaĝo en pli ol unujara granda proletara kultura revolucio!

La antaŭan fojon, kiam ni eniris en la vilaĝon, sole la kadroj de la produkta brigado nin salutis, sed la virinoj kaj geknaboj nur scivoleme rigardis nin de malproksime. La jaŭa popolo, kiu suferadis la feŭdisman subpremadon kaj ekspluatadon en la malnova socio, malofte kontaktis kun la ekstera mondo, loĝante en la montaro generacio post generacio. Kvankam la vivo de la jaŭoj multe ŝanĝiĝis post la Liberiĝo, tamen ili havis malmulte da ŝancoj por rilatiĝi kun PLA-anoj pro la fora situo de la izolita vilaĝo kaj ne kuraĝis tre proksimiĝi al PLA-anoj, malgraŭ ke ili sciis, ke tiuj estas bonaj homoj.

Ĉifoje, proksimiĝante al la vilaĝo, jam de fore ni vidis la skribaĵojn ambaŭflanke sur la alta ruĝa pordego antaŭ la vilaĝo: "Ĉiam fidele al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ; ĉiam fidele al la granda Komunista Partio de Ĉinio." Aŭdinte pri la alveno de PLA-anoj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, viraj kaj virinaj, junaj kaj maljunaj, amasiĝis svarme al la enirejo de la vilaĝo por bonvenigi nin, kun alte tenataj ruĝaj flagoj, portretoj de Prezidanto Maŭ kaj tabuloj kun vortoj de Prezidanto Maŭ kaj ĉiu kun la ruĝa libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano. Oni kriis sloganojn kaj laŭte kantis. La sonado skuis la tutan valon.

Kiam ni eniris la vilaĝon antaŭe en la unua fojo, ni trovis ke oni malofte purigis la vojojn, kaj sub la granda banjano troviĝas unu argila idolo. Kiam kelkaj volis disrompi ĝin, iu maljuna avo eĉ admonis: "Ne tuŝu ĝin senprudente! Ofendo al la dio kaŭzos al vi malfeliĉon!"

Ĉifoje, la vojoj ja estis purigitaj ĉie en la vilaĝo. La geknaboj, kiuj ne kuraĝis alproksimiĝi al ni antaŭe, nun ĉirkaŭis nin kaj volonte parkeris vortojn de Prezidanto Maŭ kaj kantis revoluciajn kantojn kun la insigno de la "ruĝaj soldatetoj" sur la brako. Muroj estis kalke blankigitaj kaj sur ili estis alskribitaj vortoj de Prezidanto Maŭ. Avinoj, avoj kaj infanoj ĉiuj invitis nin loĝi en iliaj domoj, nin puŝante kaj tirante. Iuj diris: "Venu al ni! Ni jam speciale evakuis lokon por vi." Aliaj diris: "Nia domo estas pli vasta, iru al ni." Iu avo diris sincere kun okuloj larme brilaj pro emocio: "Kamaradoj, nepre loĝu ĉe mi, ĉar ĉio estas aranĝita por vi!" Kiam ni rigardis lin, ni trovis ke li estas ĝuste tiu avo Ĝoŭ, kiu malpermesis tuŝon al la argila idolo. Probable intence li kondukis nin al la granda banjano. Malaperis la idolo, kaj sur la arbego brilis ore la vortoj: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Iu el ni intence demandis: "Avo, ĉu oni ne timas koleron de la dio, kies idolo ja estis forigita?" Kun ruĝiĝo li diris: "Mi ne kredas ĝin plu! Ni havis superstiĉon por la dio antaŭe, tamen ĝi ne povis protekti nin jaŭojn fore de la infera mizero en la malnova socio. Se Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio ne gvidus nin al liberiĝo, ni jaŭoj ne povus trovi la vojon al homa vivo. Nun, mi kredas nek la ĉielon, nek la teron, nek la diojn; mi kredas nur Prezidanton Maŭ, kiu estas nia vera savanto!"

La vortoj de la maljunulo spegulas la korsenton de la multnombraj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de jaŭa popolo. En ĉiu domo de la jaŭoj ni povis vidi portreton de Prezidanto Maŭ bonorde pendantan sur la ĉefa muro, ĉirkaŭ kiu oni algluis ankaŭ vortojn de Prezidanto Maŭ. La brilo de la penso de Prezidanto Maŭ lumigas iliajn domojn, kaj la jaŭaj geknaboj kantas:


Vortoj de la Prezidant' vidiĝas ĉie sur la muroj.
Ruĝe brilas jaŭa montvilaĝo el ĉiuj anguloj.

LU GUANG:

Ĝoja Vizito al la "Ekspozicio de Plastikaj Artoj de Albanio"

EN la lasta tagdeko de decembro de 1967 solene inaŭguriĝis en Pekino la "Ekspozicio de Plastikaj Artoj de Albanio", kiu estas nomata la lando de agloj.

Ĝi estas la unua grandtipa arta ekspozicio okazigita de Albanio en nia lando, kaj elmontris pli ol 160 pecojn da skulptajoj, modlaĵoj, olepentraĵoj, propagandaj pentraĵoj, gravuraĵoj kaj karikaturoj. Tiuj verkaĵoj kun revolucia enhavo kaj arta majstreco estas riĉaj fruktoj de la plastika kreo de albanaj artistoj en ilia profundiĝo en la vivon kaj amasojn, sub la korekta gvido de la Albana Partio de Laboro kaj la instruoj de kamarado



La socialisma laborheroo Adem Reka kaj liaj kamaradoj (lignogravuraĵo)




Enver Hoxha, la granda gvidanto de la albana popolo (skulptaĵo)

Hoxha. Ili estas ankaŭ himnoj por la heroa albana popolo, kiu triumfe antaŭenmarŝas sur la revoluciiga vojo.

La plej okulfrapa trajto de la ekspozicio estas tio, ke artistoj per siaj verkaĵoj montras la vojon de la armita batalo kaj la transformo de la tuta mondo per pafiloj. Multaj verkaĵoj varme prikantis revolucian heroismon de la heroa albana popolo kuraĝi batali, kuraĝi venki kaj ne timi oferon dum la jaroj de milito por sia nacia liberigo kaj kontraŭ faŝismo. La statuaro "Herooj ĉe Vigut" estas skulptita en memoro al gerila taĉmento, kies batalantoj heroe oferis sian vivon en la batalo kontraŭ la malamiko en 1944. La kvin bravaj gerilanoj sieĝitaj indigne rigardis la malamikojn gardante sian pozicion kun pafiloj en la manoj. La skulptaĵo plene montris la sentiman heroismon de la albana popolo "preferi morti starante ol vivi surgenue". La olepentraĵo "Skroske en Februaro 1944" reaperigis la emocian scenon ke la gerilaj batalantoj de la Unua Sturmbrigado sub la gvido de kamarado Mehmet Shehu akceptas penigan batalan taskon. La forta batalvolo de la batalantoj anticipas la nepran venkon super ĉiuj malamikoj. La pentraĵo estas verkita de veterana gerilano Fatmir, kiu aliĝis al la gerila brigado en la aĝo de dek ses jaroj kaj persone partoprenis tiun batalon, tial ĝi montriĝas aparte intima, viveca kaj emocia.

Depreni ŝtatpotencon dependas de pafiloj, kaj defendi ĝin bezonas ankaŭ pafilojn. La skulptaĵo "Kun Pioĉo en Unu Mano kaj Pafilo en la Alia" figurigis kolosan heroon, kiu simbolas grandan volon kaj decidemon de la albana popolo por konstrui kaj defendi sian patrolandon.



Kun pioĉo en unu mano kaj pafilo en la alia (skulptaĵo)

La busto "Montano ĉe la Landlimo" estas verkajo kun alta ĝeneraleco. Por defendi la patrolandon, la montanoj de Albanio ĉe la landlimo ĉiuj tenas pafilojn en la manoj kaj ĉiumomente estas pretaj por ekstermi malamikojn aŭdacajn entrudiĝi. La artisto bildigis maljunan brustelstaran montanon, kun kaptuko sur la kapo kaj pafilo sur la ŝultro, kiu kvazaŭ firma roko staras sur monto ĉe la landlimo. Ĝia bronza koloro pliigis majestan nuancon al la heroo de la lando de agloj.

En siaj verkoj la albanaj artistoj varme prikantis la batalan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Albanio. La gravuraĵo "Ŝultron ĉe Ŝultro Estas Muldistoj de Ĉinio kaj Albanio" plene montris la firman solidarecon de la ĉinaj kaj albanaj laboristoj kaj ilian heroan spiriton transformi la mondon. La ĉinaj kaj albanaj muldistoj kune muldis ne ordinarajn ŝtalingotojn, sed la ŝtalajn landojn de socialismo kaj la bazoŝtonon de komunismo.

En sia arta praktiko la albanaj artistoj vere atingis la celon servigi la arton al la proletara politiko kaj la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ni varme huraas pro la novaj atingoj de la albanaj artaj batalantoj kaj bondeziras, ke ili gajnu pligrandan venkon sur la revoluciiga vojo.

La herooj ĉe Vigut (skulptaĵo)



R. D.:

Libro pri Nacia Heroo de Albanio

ĜUSTE kiam la heroa albana popolo rememoras la 500-an datrevenon de la morto de sia glora nacia heroo Gjergj Kastrioti Skanderbeg, ni ricevis de tiu lando, la brila lampo de socialismo en Eŭropo, rekomendindan Esperantan libron pri la vivo kaj meritoj de tiu heroo, titolitan *Gjergj Kastrioti-Skanderbeg, Nacia Heroo de Albanio* (1405 — 1468). Ĝia apero estas ĝojiga afero por la tuta esperantistaro, kaj ni varme rekomendas ĝin al niaj legantoj.

La libron verkis Kristo Frasheri, eldonis la Eldonejo Naim Frasheri kaj disvendas la N. Sh. Tregetimit Librit, Tirano, Albanio. Ĝia prezo estas US $ 0.40.

En sia libro kun nur 48 paĝoj, la aŭtoro koncize rakontas la historion de Albanio antaŭ la 15-a jarcento kaj la ĝeneralan historian fonon de la 15-a jarcento, en kiu vivis Skanderbeg. Post tio li konatigas al la legantoj la turkan okupadon, la aktivadon de Skanderbeg, la ĝeneralan ribelon de 1443, la unuajn venkojn de la albanoj kaj la kreiĝo de la albana ŝtato. En la lastaj du ĉapitroj, li eksplikas la internacian influon de Skanderbeg kaj la signifon de lia agado.

La epoko, en kiu Skanderbeg vivis, kiel trafe diris Engels, estis ĝuste la decida tempo de eŭropa historio, kaj tiam jam aperis simptomoj de sociaj ŝanĝiĝoj kaj kriziĝo de feŭda regado. Tio rezultigis la formiĝon de modernaj naciaj ŝtatoj kaj la prosperiĝon de urba ekonomio kun nova strukturo de ekonomio kaj socio. Ankaŭ en tiu tempo, la Turka Imperio invadis la tutan Balkanan Duoninsulon kaj Albanion. En la daŭro de 25 jaroj (1443 — 1468), sin apogante sur la brava albana popolo, precipe sur la kamparanaro, Skanderbeg venke batalis kontraŭ la malamikoj, kiuj estis superegaj en nombro. Tio malebligis al la turkaj agresantoj rapidan efektivigon de sia ambicio ataki Italion kaj Hungarion prenante Albanion kiel ponton.

Per sia eksterordinara talento en militaj aferoj, Skanderbeg sukcese defendis la popolon, la teritorion kaj la liberecon de Albanio kontraŭ la agresantoj. Samtempe, per la fondo de la "Albana Ligo", la plej alta komanda instanco de la milito en la tuta Albanio, li kontribuis ankaŭ en oponado kontraŭ la feŭda disapartigo kaj akcelado de la unuiĝo de la popolo kaj lando.

La merito de Skanderbeg kuŝas ankaŭ en tio ke li pruvis al la agresatoj per siaj bataloj kaj venkoj en la 25 jaroj, ke oni povas dronigi la malamikojn, kiaj ajn fortaj tiuj estu, se ili nur faras persisteman armitan reziston, firme apogante sin sur la popolo, sur la vastaj amasoj de kamparanoj.

Tiu libro helpas nin ekkoni la gloran historion de la albana popolo, kiu brave kontraŭbatalis malfacile la agresantojn en la pasinteco, kaj kompreni ke gloran revolucian tradicion havas la albana popolo, kiu nun sukcese luktas por socialismo en la sieĝo de imperiismo, moderna reviziismo kaj iliaj lakeoj.

Enciklopedieto

Dazibaŭo

Prezidanto Maŭ alte taksis la revoluciajn dazibaŭojn dirante: **"Dazibaŭo estas ekstreme utila novtipa batalilo."** La revoluciaj dazibaŭoj elmetas diversajn opiniojn, malkaŝas diversajn kontraŭdirojn kaj servas ankaŭ kiel magia spegulo por prezenti ĉiajn demonojn kaj diablojn. La revoluciaj amasoj uzas tiun batalilon por bati la malamikon kaj eduki sin mem.

En la granda proletara kultura revolucio de nia lando, la revoluciaj amasoj plene utiligas la formon de dazibaŭo por akre malkaŝi kaj kritiki la kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn krimojn de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kun la ĉina Ĥruŝĉov kiel la ĉefo, kaj por malkovri kaj kritiki ĉiajn demonojn kaj diablojn en la socio. Kaj krome la amasoj uzas dazibaŭojn por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo; ili elskribas kaj publikigas siajn opiniojn sur papero, por ke multaj ilin sciu, distingu pravon de malpravo tra debatado kaj solvu la kontraŭdirojn.



Denove al J. L.

Kara amiko:

En mia lasta letero, mi skribis al vi pri heroaĵoj de ĉinaj PLA-anoj, kiuj savis sian batalamikon. Mi volus scii, kion vi pensas post legado.

Hodiaŭ, mi rakontos al vi kion mi vidis kaj aŭdis dum mia vizitado al Gangdong, fiŝista vilaĝo sur Giaŭdong-duoninsulo, Ŝandong, en la frua vintro de 1967.

Antaŭ mia eniro en la vilaĝon, mi jam estis frapita de la tiea revolucia etoso. Vicoj da ordaj brikdomoj sidis fronte al la sudo. Sur iliaj muroj kaj ĉe la kamprandoj ore brilis vortoj de Prezidanto Maŭ. Ĉie, kie laboris komunumanoj, estis videblaj ruĝaj flagoj kaj portretoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ; sonoraj kantoj sonis eĥe en la valo....

Mi pasigis kelkajn malfacile forgeseblajn tempetojn kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Gangdong.

En siaj paroloj, agadoj kaj kunvenoj la revoluciaj amasoj de Gangdong ĉiam ekzamenas sin per komparo kun la koncernaj instruoj de Prezidanto Maŭ. Oni povas diri, ke studado de verkoj de Prezidanto Maŭ jam fariĝis konscia agado de la vastaj revoluciaj amasoj. Ilin studas ne nur junuloj sed ankaŭ maljunuloj, ne nur legsciantoj sed ankaŭ analfabetoj. Liu Kajguj, sesdekjara analfabeta komunumano, igas sian nepinon voĉlegi por li la "tri popularajn artikolojn" ĉiuvespere. Nun li kaj multaj aliaj komunumanoj ne nur povas parkeri la "tri popularajn artikolojn", sed ankaŭ dekojn da eldiroj de Prezidanto Maŭ.

Ekzistas eĉ infanino, kiu ĵus komencis lernadon de parolo, jam povas ĝuste nomi: "Prezidanto Maŭ!" "Prezidanto Maŭ!", kiam ŝia patrino portas ŝin en la brakoj antaŭ portreton de Prezidanto Maŭ. Mi vidis krome, ke la revoluciaj amasoj ja malamegas la ĉinan Ĥruŝĉov ĝis ekstremeco. Sur la kampoj kaj en la domoj, ĉie fariĝas forumo por kritiki la ĉinan Ĥruŝĉov.

Iutage, post la vespermanĝo, mi iris al la domo de Liu Ĝenghi (vidu la artikolon *Familia Kunsido de la Komunumano Liu Ĝenghi por Kontraŭbatali Egoismon kaj Kritiki Reviziismon* aperintan en nia gazeto, n-ro 2, ĉijare). Jen mi vidis, ke la briklito kaj benkoj estas plene okupitaj de homoj.

Komenciĝis la kunsido, kaj mi atente aŭskultis la paroladojn de liaj familianoj junaj kaj maljunaj. Ili ne vizitis lernejon, tamen iliaj bone ordigitaj paroloj kaj zorgado pri la ŝtataj aferoj... elmontris en ĉiuj vortoj kaj frazoj sian senliman amon kaj fidelecon al Prezidanto Maŭ, lia penso kaj lia proletara revolucia linio.

Kiam la kunsido finiĝis per kuna kantado de *Marnavigo Dependas de l' Stiristo*, mi aliris al la dommastrino Liang Jumej por interparoli.

"Ho k-do!" ŝi diris. "Vi ne scias, kiom multe da paroloj ni volus verŝi el nia koro al Prezidanto Maŭ. Estas efektive: La tero kaj ĉiel' ne tiom grandas kiom la favoro de l' Partio. La patro kaj patrin' ne tiom karas kiom granda Prezidanto Maŭ. Ja estas Prezidanto Maŭ, kiu gvidis nin, malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, akiri la liberecon, tiel ke ni povas havi la hodiaŭan feliĉan vivon.

"Antaŭ la Liberiĝo, ni fiŝkaptis por la fiŝkaptaj tiranoj. Ni nutris nin per legomoj kaj brano, kaj neniu havis manĝaĵon por morgaŭo. La japanaj rabistoj, naciperfiduloj kaj kuomintangaj reakciuloj ofte perforte impostis kaj arestis nin. En iu jaro, mia bopatro estis kaptita de Kuomintango sur la maro. Kiam samvilaĝanoj informis min pri tio, mi decidis nepre vidi mian bopatron eĉ je vivrisko. Mi marŝis kaj rampis dekojn da lioj, ĝis mi fine vidis mian bopatron ĉe marbordo. Liaj manoj estis kunligitaj post la dorso kaj iuj samvilaĝanoj estis ligitaj sur la masto de velŝipo. Kelkaj kuomintangaj fiuloj gardis ilin kun pafiloj. Vidinte tion, tuj mi falis svene sur la teron..." Onklino Liang Jumej eklarmis.

Ŝia edzo Liu Juangin daŭrigis kun profunda emocio: "Kian vivvojon ni malriĉuloj povis havi en la tiama socio!

"La amarajo de nia familio estis ankaŭ tiu de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de nia vilaĝo. En la malnova socio, nia vilaĝo estis malriĉa, kie tero estis malmulta, fiŝboatoj kadukaj kaj homoj senhavaj. La japanaj rabistoj, kuomintangaj reakciuloj, bienuloj kaj fiŝkaptaj tiranoj estis tiel malicaj kaj venenaj, kiel vipuroj, kaj suĉis la sangon de la malriĉuloj ĝis la lasta guto. Post kiam la japanaj rabistoj invadis Kingdaŭ, en nia vilaĝo 8 klasaj fratoj estis mortigitaj, 32 sin mortigis sub persekutado, 45 familioj forlasis la hejmvilaĝon por trovi rifuĝon en la Nordokcidento, kaj 48 personoj estis kaptitaj de la malamiko, pri kies sorto ni aŭdis nenion ĝis nun. Krome 132 homoj vagabondis kaj almozpetis....

"Tiam cirkulis la jena popolkanto inter la amasoj:

Naŭ montoj, ses ravinoj kaj unu rivero.

Malfekundeco, manko kaj malsatmuelo.

Manĝaĵon trimonatan formas brano kaj sovaĝlegomoj,

Senŝuas la piedoj, kaj nudas la korpo sub ĉifonoj.

Sinvende kaj preĝinte, oni iras fiŝi sur la maro,

Sed kontraŭ ŝvit' kaj sang' nenio postrestas krom amaro.

En tio speguliĝas la mizereco de nia vilaĝo antaŭ la Liberiĝo.

"Sed la nuboj ne povis kovri la sunon, kiel subita eksono de printempa tondro, sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la Popola Liberiga Armeo venis kaj liberigis nin.

"Ho Prezidanto Maŭ! Ni, mizeruloj el la malnova socio, ĉiam dankos al vi! Ni sekvos vin por fari revolucion dum la tuta vivo!"

Onklo Liu Juangin iom paŭzis kaj poste daŭrigis levante sian voĉon: "Kamarado, rigardu nun nian hodiaŭan vivon!" Tuj vigliĝis la tuta ĉambro.

"Post la Liberiĝo, leviĝis la ruĝa suno en la oriento! Nia amata Prezidanto Maŭ montris al ni la direkton. Ni faligis la fiŝkaptajn tiranojn kaj bienulojn. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri organiziĝo, ni iris la vojon kolektivisman de interhelpa grupo al kooperativo. Nia amata Prezidanto Maŭ tiam ree instruis al ni: **'Ja pli bona estas la popolkomunumo'.** Ni, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, varme respondis al la alvoko kaj plenumis ĝin senŝanceliĝe. Dum la pasintaj jaroj, laŭ la principoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ sinapogi sur la propraj fortoj, strebi al prospero kaj pene labori en pionirado, dank' al la kolektiva forto, ni reformis nian mondon kaj akiris la hodiaŭan feliĉan vivon.

"De la jaro 1964, la pomua produktokvanto de greno stabile superis 400 kilogramojn, t. e. kvaroble pli multe ol tiu de 1956 en la kooperativa periodo aŭ okoblo de tiu en la antaŭvespero de la Liberiĝo. En 1966, ni vendis al la ŝtato 710,000 kg. da akvaj produktaĵoj, t. e. kvaroble pli multe ol tiu de la jaro 1965 . . ." Dirante tion, onklo Liu Juangin ekridis serene. Kaj nia interparolado finiĝis en ridoj.

Kara amiko, en la antaŭvespero de la tago, en kiu mi forlasis Gangdong, mi refoje rigardis la belan fiŝistan vilaĝon de sur la monto en la sudo. Pecoj super pecoj, strioj super strioj, la bonorde aranĝitaj ŝtuparaj kampoj etendiĝas kiel tapiŝoj sur la montdeklivoj kaj rivervalo. Kontraŭ la marakvo, defendas la vilaĝon 600 metrojn longa digo; sur la fekundaj kampoj ĉe la interna flanko de la digo tritiko prospere kreskas. Malproksime bluas la maro, sur kiu glitas en aroj fiŝkaptaj ŝipoj, renkonte al la matena suno. Sur la ŝipoj, en la vilaĝo, ĉe la kamprandoj kaj marbordo, ĉie flirtas ruĝaj flagoj . . . La vivo de la fiŝista vilaĝo estas en plena vibro.

Kun la muĝado de la ondoj, forflugas la sonoj de la kanto *Marnavigo Dependas de l' Stiristo . . .*

Kara amiko, mi ĉesu ĉi tie. Ĝis reskribo!

Via
Jong Hiangkian



Defendo de la Granda Kultura Revolucio per Sango kaj Vivo

EN la urbo Ĉengde, same kiel en la aliaj lokoj de nia lando, ĉie flamas la granda kultura revolucio. Iun post-tag-mezon, mi iris sur la plej hom-plena strato de tiu urbo por legi dazibaŭ-ojn* kaj vidis ambaŭ-flanke de la strato multe da junaj ruĝ-gvardi-anoj* kaj revoluciajn popolanojn. Iuj gluis* dazibaŭojn sur murojn, aliaj disdonis flug-foliojn aŭ diskutis en grupoj, kaj ankoraŭ aliaj kondamnis*, kun forta indigno, la krimojn* de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Subite, de la sudo, iu timig-ita ĉeval-ego tir-anta ĉaron* al-kur-egas al la amasoj. Videble okazos granda akcidento*. Tuj ekfulmis* en mia kapo la granda instruo de Prezidanto Maŭ pri "tutkora" kaj "sen-rezerva" servado al la popolo, kaj mia koro ek-plen-iĝis de forta malamo kontraŭ la enpartiaj potenc-tenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj devsento pri defendo* de la granda prolet-ara* kultura revolucio.

Mi kuris renkonte al la ĉevalo kaj kaptis ĝian bridon*. Sed la ĉe-

Maŭ Zedong Estas la Genia Gvidanto de la Ĉina Popolo

Karaj amikoj,

Preskaŭ du monatoj pasis de post mi kun danko kaj plezuro ricevis vian instruan leteron, en kiu vi tute kontente klarigis al mi kelkajn demandojn vekitajn en mia letero al vi je la 21-a de aprilo. Nun dank' al via letero mi scias, ke nur en la grado, en kiu la amasoj eligas siajn avangardajn tavolojn por "komandaj postenoj" de la socialisma konstruado kaj kulturo, nur tiomgrade, kiom tiuj ĉi tavoloj ĉiam plu kreskas, entrenante ĉiam plu novajn klasanojn en la procedon de la kulturrevolucia refariĝo, kaj iom post iom superante la interklasan dividon mem je "avangardaj" kaj "postrestintaj" prolettavoloj, — kreiĝas samtempe ankaŭ garantio de plenvenka socialisma konstruado kaj garantio kontraŭ burokratisma ekputro aŭ klasa degenero. La sukcesoj de la ĉina kultura revolucio dependas antaŭ ĉio de tio, ke ĝi levis al konscia agado neviditan multegon da batalantoj kaj naskis neordinaran vervon kaj entuziasmon de la amasoj. Sed tiaj sukcesoj ne eblus sen konforma gvidado al tiuj amasoj. Tiun ĉi gvidadon efektivigis Maŭ Zedong per la teorio kaj metodo de la revolucia marksismo. En siaj verkoj li pluprogresigas kaj perfektigas la Marksan-Leninisman instruon. Maŭ

valo sin liberigis de la brido kaj daŭrigis sian kuregon al la amasoj. La situacio ĉiam pli kriziĝis*! Kion fari? Mi pensis: Defendi la grandan kulturan revolucion ja estas sankta devo de ni PLA-anoj*. Vundiĝu aŭ mortu nur mi sola, sed nenia damaĝo* al la ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj amasoj. Nun mi firme kaptis la jugon* kaj tutforte puŝis la timonon* per mia dekstra ŝultro, por premi la ĉevalon al muro apud la vojo. Pro mia subita atako la furioza* ĉevalo home ekstaris, levante la antaŭajn piedojn en la aero, kaj mi falis teren puŝante mian kruron kontraŭ posta kruro de la ĉevalo.

La ĉevalo kun la ĉaro do ne estis halt-ig-ita ankoraŭ. Mi preferis rompi al mi ostojn* ol lasi la ĉaron kuri en la amasojn. Per ĉiuj fortoj mi min klopodis levi rapide, kaj en tiu tempo la maldekstra rado de la ĉaro surruliĝis* sur mian korpon, renvers-iĝis* la ĉaro, falis la ĉevalo, kaj mi ek-svenis* . . .

Dank' al la urĝa helpo de kuracaj laborantoj en hospitalo, mi fine vekiĝis el sveno en la sekvinta tago, kaj mi tuj demandis: "Ĉu la ĉaro vundis iun?" Oni respondis: "Neniun alian." Tiu respondo faligis la pezan ŝarĝon* de sur mia koro. Sed mi eksentis doloron tra la tuta korpo, kvazaŭ la tuta ost-aro disiĝus unu de alia, kaj mi ne kapablis eĉ moveti min. Subite mi aŭdis malklare, ke oni voĉlegas vorton post vorto: **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon."** Aŭdante la instruon de nia amata Prezidanto Maŭ, mi sentis, kvazaŭ li estus ĉe mia flanko kaj ameme admonas, ke mi venku la doloron. Mi malfermis la okulojn kaj rigardis la portreton de Prezidanto Maŭ sur la muro. Varma fluo venis en mian koron, multe malakriĝis mia doloro, kaj klariĝis ankaŭ mia kapo.

Streĉante ĉiujn miajn fortojn mi petis la fleg-istinon*, ke ŝi voĉlegu por mi la artikolon *Servu al la Popolo.* Ĉiuj vortoj de Prezidanto Maŭ min stimulis. En 5-6 sinsekvaj tagoj mi estis en duon-sveno, sed ĉiufoje kiam mi iom re-konsciiĝis, mi petis la flegistinon voĉlegi por mi vortojn de Prezidanto Maŭ. Kaj ĉiu eldiro de Prezidanto Maŭ portis al mi sen-liman forton. La ĉaro povis rompi miajn ostojn kaj vundi mian korpon, sed ne povis ŝanceli mian firman volon studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Mi scias, ke homo povas havi veran vivon, nur se li posedas la penson de Maŭ Zedong. Rigardante la portreton de Prezidanto Maŭ, mi diris al mi en la koro: Prezidanto Maŭ! Ho Prezidanto Maŭ! Mi nepre sekvos viajn instruojn, venkos la vundon kaj doloron per via granda penso, daŭre kontribuos al la granda proletara kultura revolucio, kaj pli bone servos al la popolo!

**Vortoj tiel sign-itaj estas klarigitaj en "Nia Vortareto" de tiu ĉi numero aŭ de iu el la aperintaj numeroj de EPĈ ĉi-jare.*

Nia Vortareto

akcidento — neatendita malfeliĉa okazaĵo.
brido — ilo liganta la kapon de ĉevalo por ĝin konduki.
damaĝi — difekti, malbonigi.
defendi — helpi, gardi kontraŭ atako.
flegi — pri-zorgi malsanulon.
fulmo — subita eklumo inter nuboj ofte okazanta en pluvego kaj sekvata de bruego.
furioza — sen-bride kolera.
glui — kunigi per gluo, kiu estas duonflueca aĵo.
gvardio — militista grupo komisiita por gardi.
indigni — senti kaj ekmontri justan koleron.
jugo — lignopeco kiun oni ligas al tir-besto kiam ĝi tiras ĉaron.
kondamni — deklari iun kulpa, puninda.
krimo — ago pun-inda.
krizo — grava danĝera stato de iu afero en evolu-ado.
osto — mal-mola, fortika aĵo en korpo de homo aŭ besto.
PLA-ano — ano de la Popola Liberiga Armeo.
portreto — pentraĵo prezentanta personon.
renversi — faligi ion starantan.
ruli — movi ion ĝin turn-ante.
sveni — perdi la konscion por-tempe.
ŝarĝi — meti pezan portaĵon sur ion aŭ iun.
timono — bastonego fiksita ĉe la antaŭa parto de ĉaro por alligi al ĝi tirbeston.

Zedong estas genia gvidanto de la ĉina popolo kaj kiel teoriisto li prezentas per sia agado brilajn modelojn de kunligo de revolucia teorio kaj praktiko kaj pliriĉigas la revolucian metodon de marksismo-leninismo.

G. H., Svedio

ALTE TENU LA GRANDAN RUĜAN STANDARDON DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG!

Karaj amikoj,

Bonorde mi ĵus ricevis viajn afablajn leteron kaj paketon. Koran dankon.

El tio, mi pli klare trovis kaj profunde sciiĝis kun danko, ke la Komunista Partio kaj popolo de Ĉinio elkore helpis nian popolon kontraŭ la usonaj agresantoj.

Prezidanto Maŭ diris: **"Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj."** Sub la helpo de ĉina popolo, frataj socialismaj landoj kaj progresema homaro, certe malvenkos la usonaj agresantoj, kaj certe venkos la popolo de Vjetnamio.

Mi ankaŭ treege dankas vin, ke vi sendis al mi *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.* Certe, ĝi fariĝas nia korlibro. Ĉar ĝi estas tre abunda je la enhavo, oni devas studi multajn vidpunktojn en ĝi. Alte tenu la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong!

N. M. D., Vjetnamio



FONDIĜIS LA MARKSISM-LENINISMA KOMUNISTA PARTIO DE FRANCIO

Pli ol cent reprezentantoj el diversaj organizoj de la Franca Komunisma Movado (Marksism-Leninisma) okazigis kongreson en la sudo de Francio de la 30-a ĝis la 31-a de decembro, 1967, kaj anoncis la fondiĝon de la Marksism-Leninisma Komunista Partio de Francio. En la kongreso, ili ankaŭ adoptis la statutojn kaj programon de la partio kaj elektis ĝian Centran Komitaton.

La kongreso deklaris sian decidon por konstrui "novtipan partion kian postulis la granda Lenin, partion de bolŝevik-tipo kun la senmorta teorio de marksismo kaj leninismo kaj la penso de la granda instruanto de la monda revolucio kamarado Maŭ Zedong kiel orientilo por sia agado".

PERSISTA BATALADO DE LA PANAMA POPOLO POR REAKIRI LA SUVERENECON DE LA KANALA ZONO

Dum la lasta periodo, la fokuso de la batalo fare de la panama popolo koncentriĝis en frakasado de la trompa artifiko de la usona imperiismo por denove kontrakti traktaton por konservi ĝian privilegion, kaj en persistado por repreni la de Usono delonge okupitan Kanalan Zonon de Panamo.

Depost kiam la panama popolo levis grandskalan amasan kontraŭusonan ŝtormon por reakiri la suverenecon de la Kanala Zono en januaro 1964, la feroca kaj ruza usona imperiismo, unuflanke, faris sangan subpremadon per armitaj fortoj, aliflanke, trompis la panaman popolon per artifiko de interparolado por kontrakto de nova traktato. Post tri jaroj, la usona registaro deklaris, en junio lastjare, ke ĝi jam en principo atingis interkonsenton kun la panama registaro pri kontrakto de novaj traktatoj. Laŭ informo, tiuj tri traktatoj interkonsentitaj de ambaŭ flankoj temas pri la nuna pozicio de la Panama Kanalo, starigo de militaj instalaĵoj fare de Usono en la panama teritorio kaj konstruo de nova kanalo fare de Usono en Panamo. La ellasita informo tuj elvokis fortegajn oponon kaj proteston de la panama popolo. En sia deklaro la Kontraŭmilita Patriota Komitato de Panamo diris, ke la panama popolo "juras al si defendi la suverenecon riskante sian vivon, ĉar ili ne volas esti plue trompitaj de la mistifiko de la traktato de 1903". La deklaro esprimis firmdecide: Estas necese senkondiĉe aboli la neegalan kontrakton de 1903; estas necese redoni al Panamo la panaman teritorion de la Kanala Zono; forpelu la usonajn trupojn okupantajn la teritorion de la Kanala Zono, malpermesu al plua ekzisto de militaj bazoj de Usono sur la tero de Panamo.

La justa patriota batalo de la panama popolo kontraŭ la usona imperiismo ĉiam ricevas la firmajn subtenojn de la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo. En sia *Parolado por Subteni la Panaman Popolon en Ĝia Justa Patriota Batalo kontraŭ la Usona Imperiismo* je la 12-a de januaro 1964, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam montris: **"La batalo nun heroe kondukata de la panama popolo por defendi la ŝtatan suverenecon kontraŭ la usona agresado estas granda patriota batalo. La**

ĉina popolo firme staras ĉe la flanko de la panama popolo kaj plene ilin subtenas en ilia justa agado kontraŭ la usonaj agresantoj kaj por reakiri la suverenecon de la zono de la Panama Kanalo."

LA ARMITAJ FORTOJ KAJ POPOLO DE LAOSO EKSTERMIS 16,000 MALAMIKOJN DUM UNU JARO

Disvolvante la nevenkeblan potencon de popola milito, la heroaj laosaj patriotaj armitaj fortoj kaj popolo faris, en 1967, senĉesajn fortegajn batojn al la usonaj banditoj kaj ĝiaj lakeoj en ĉiuj batalejoj de la tuta lando kaj gajnis brilegajn venkojn. Laŭ statistiko, ili ekstermis kaj detrupigis sume 16,000 malamikojn, kaj krome faligis kaj difektis pli ol 280 malamikajn aviadilojn.

ALĜERIO TRANSPRENIS LA DE FRANCIO OKUPITAN MARARMEAN BAZON

La alĝeria registaro deklaris en januaro, ke ĝi oficiale transprenis en Oran la de francaj trupoj okupitan Mers-el-Kebir mararmean bazon. Alĝeria floto kun kvin militŝipoj en februaro alnavigis por tie garnizoni.

LA JAPANAJ KAMPARANOJ DAŬRIGIS LA BATALON KONTRAŬ USONO

La kamparanoj de Sanrizuka de Ĉiba-gubernio, Japanio, okazigis kunvenon por daŭrigi la oponadon kontraŭ la krimagoj de la reakcia Sato-registaro forpreni la teron de kamparanoj por konstrui aerodromon por la usona armeo agresanta Vjetnamion, kio sonigis la unuan kanonadon de la batalo de la kamparanoj de Sanrizuka en 1968. La kunvenantoj portis sur sia brusto la insignon kun portreto de la plej plej ruĝa suno en la koroj de la mondaj popoloj Prezidanto Maŭ, kun alta batalvolo. Ili ankaŭ publikigis deklaron, en kiu ili emfazis ke la kamparanoj devas pluapaŝe unuiĝi kun la laboristoj kaj lernantoj, kaj persisti ĉe la batalo por ĝisfunde frakasi la intrigon de la usona kaj japana reakciularoj konstrui aerodromon en Ĉiba-gubernio.

LA "SPECIALA SENDITO" DE U.N. INTENSIGIS SIAN AKTIVADON EN CENTRA ORIENTO

Laŭ la volo de la usona imperiismo, la "speciala sendito" de U.N. Gunnar Jarring intensigis sian aktivadon en centra Oriento, kolportante la rezolucion pri la centraorienta problemo adoptitan en la Konsilantaro de Sekureco de U.N. en la fino de novembro lastjare sub la kuna manipulado de Usono kaj Sovetunio kaj devigantan la arabajn landojn kapitulaci al la agresantoj.

La rezolucio adoptita de la Konsilantaro de Sekureco daŭrigas sian instigadon al la izraelaj agresantoj kaj tute ne postulas Izraelon senkondiĉe fortiriĝi for de la arabaj teritorioj de ĝi okupitaj en la lastjara junio. Male, ĝi postulas ke la arabaj landoj konfesu la laŭleĝecon de la tero okupita de Izraelo kaj garantiu la tiel nomatan "liberecon de navigado" de Izraelo en Suez-kanalo kaj Tiranmarkolo, intencante realigi la celon kiun volis atingi sed ne plene realigis la usonaj kaj izraelaj agresantoj en la agresa milito.

Sur la kovrilo:

"La armeo kaj la popolo interligiĝas koro kun koro kiel samfamilianoj." Kamaradino el la propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong de la Trupo 8341 de PLA, sendita al la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko, laboras kune kun laboristino, kondutante kiel lernanto de la amaso kaj servanto de la popolo.

Sur la dorskovrilo:

La granda proletara kultura revolucio estas giganta movforto por disvolvi la socialismajn produktfortojn de nia lando. Sub la gvido de la granda politiko de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**, post la riĉa rikolto de malfrua rizo, oni akiris riĉan rikolton de fruaj mandarinoj en Huangjan kaj ambaŭborde de Ĉenggiang, Ĝegiang-provinco.

En la foto estas komunumanoj de Kianping-brigado de Ĝendong-komunumo, Huangjan, kiuj ĝoje rikoltas fruajn mandarinojn kaj elektas la plej bonajn por vendi ilin al la ŝtato.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (118) 1968

Ĉefa Enhavo

Maŭ Zedong, Vi Plej Ruĝa Suno de l'Epoko Granda (*poemo*)

Prezidanto Maŭ, Revoluciaj Esperantistoj Rigardas Vin kun Alta Estimo

Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko sur la Vojo de la Penso de Maŭ Zedong

La Heroa Plotonestro Li Venĝong

Propaganda Trupo de la Penso de Maŭ Zedong

Post Rondira Vizito al Bazaj Unuoj

Scienca Esplorado sur la "Monda Firsto"

La Deveno de Ĝolmo-lungma

Venkoj de Revolucio kaj Produktado en la Naŭa Ŝtata Ŝpinteksejo de Kingdaŭ

Ja Bonaj Estas la Specialistoj Alsenditaj de Prezidanto Maŭ

La Feliĉa Momento

Triumfo de la Vjetnama Popolo en la Komenco de la Printempo

La Tagoj de la Imperiistoj, Reviziistoj kaj Reakciuloj Fariĝas Ĉiam Pli Malfacilaj

La Mararmeo de la Korea Popola Armeo Kaptis la Spionan Ŝipon Pueblo de la Usona Imperiismo


La Diplomatia "Fleksebleco" de la Sovetuniaj Reviziistoj

Proletara Revolucio en Ĉina Edukado

Refoja Vizito al Vilaĝo de Jaŭoj


Ĝoja Vizito al la "Ekspozicio de Plastikaj Artoj de Albanio"

Libro pri Nacia Heroo de Albanio



Prezidanto Maŭ estas kune kun ni.

Senfinaj Beloj Sorĉas



Ĝolmo-lungma vidata de sur la norda montdeklivo alta je 5000 metroj super la marnivelo.



Kun senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ la sciencaj laborantoj batalantaj sur la altebenaĵo de Tibeto tenas, antaŭ sia ekiro ĉiutage, la ruĝajn libretojn "Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong" en siaj manoj kaj refoje legas instruojn de Prezidanto Maŭ.





Observado kaj esplorado pri la leĝoj de radiado de la suno ĉe loko alta je 6300 metroj super la marnivelo.

sur Montoj de Danĝero


—Fotoj pri la grandskala scienca esplorado fare de ĉinaj sciencistoj en la regiono de Ĝolmo-lungma

Dum la senprecedenca granda proletara kultura revolucio, brigado por sinteza scienca esplorado organizita de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj konsistanta el pli ol cent revoluciaj sciencaj laborantoj de ĉirkaŭ 30 fakoj el 23 institucioj efektivigis, kun la heroa volo starigi la grandan ruĝan standardon de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong sur la plej alta montpinto en la mondo, plenampleksan kaj sisteman sintezan sciencan esploradon en la regiono de Ĝolmo-lungma, kaj akiris grandkvante relative kompletan serion da gravaj sciencaj materialoj pri la montaro Himalajo kaj la monto Ĝolmo-lungma. Tio elokvente pruvas la saĝan aserton de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **"La ĉina popolo havas fortan volon kaj grandan kapablon, kaj nepre atingos kaj superos la avangardan mondan nivelon en proksima estonteco."**



La trupo de PLA garnizonanta en Tibeto fervore partoprenis la esploran laboron. La foto montras, ke la kamaradoj el PLA kaj la sciencaj laborantoj trovis biologian fosilion kaj observas ĝin kun atento.

Scienca esplorado kaj studo en regiono de glaciriveroj, alta je pli ol 5900 metroj super la marnivelo, kun la decido surgrimpi la altan montpinton de scienco por la proletaro.



Kolektado de specimenoj de vegetaĵoj kaj koncernaj materialoj en praarbaro sur la suda deklivo de Ĝolmo-lungma.

